

Serio Oriento-Okcidento, n-ro 60  
Sub Aŭspicioj de UEA  
en Konsulta Partnereco kun Unesko

# **SADIO**


# **La Florejo**

Tradukteamo:

Keyhan Sayadpour

Said Baluĉi

Renato Corsetti



Eldonejo «Impeto»



**Sadio**

**La Florejo  
(Golestan)**

**Traduka Teamo:**

Keyhan Sayadpour

Said Baluçi

Renato Corsetti

**Moskvo**

**Eldonejo «Impeto»**

**2021**

UDC 821.222.1  
S12

**Sadio**

**La Florejo**  
**(Golestan)**

**Traduka Teamo:**  
**Keyhan Sayadpour, Said Baluĉi, Renato Corsetti**

**Respondecaj redaktoroj:**  
Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko

**Provlegis** Rob Moerbeek

**Serio Oriento-Okcidento, n-ro 60**  
**Sub Aŭspicioj de UEA**  
**en Konsulta Partnereco kun Unesko**

**Sadio**

S12      La Florejo (Golestan) / Саади. Гулистан. На языке эсперанто — М.: Импэто, 2021. — 238 с.  
ISBN 978-5-7161-0319-1

UDC 821.222.1  
S12

ISBN 978-5-7161-0319-1

© Keyhan Sayadpour. Traduko, 2021  
© Said Baluĉi. Traduko, 2021  
© Renato Corsetti. Traduko, 2021  
© Eldonejo «Impeto», 2021



## **Antaŭvortoj por “La Florejo” (Golestan) de Sadio**

1969 estis kerna jaro por la pli vasta diskonigo de la persa literaturo, ĉar tiam eldoniĝis la unua volumo en ambicia projekto de Unesko, “UNESCO Introductions to Asian Literatures.” Ne aperis multo sub tiu titolo, tamen sukcesis la unua planita serio “Persian Heritage Series.” Eldoniĝis kiel enkonduka verko *An Introduction to Persian Literature*, verkita de profesoro Reuben Levy, por kiu la Universitato de Kembriĝo kreis en 1950 specialan katedron pri Persa Literaturo. Tiu verko publikiĝis sub kopirajto de Unesko mem, de Columbia University Press, unu el la plej prestiĝaj usonaj presejoj universitataj. La serion interkonsentis kunaŭspicii Unesko kaj la Reĝa Instituto de Tradukado en Tehrano, Irano. Aperis en tiu “Persian Heritage Series” entute 40 verkoj anglalingvaj, financitaj private post retiriĝo de Unesko.

Unesko jam en 1948 inaŭguris tradukprojekton, “La Unesko-Kolekto [-Katalogo] de Rezentaj Verkoj (“UNESCO Collection [Catalogue] of Representative Works”), kiu daŭris ĝis 2005, kiam Unesko ne plu kapablis financi la entreprenon. La kolekto respondecis pri pli ol mil verkoj rekomenditaj de membroŝtatoj kaj kulturaj komisionoj kiel komune reprezentaj de la valoroj de la koncernaj popoloj. Elstaris interesaj faktoj. Rezentatiĝis pli ol 65 diversaj literaturoj. Kvankam tradukoj eldoniĝis ĉefe en grandlingvoj kiel la angla kaj la franca, ili aperis ankaŭ en ekzemple la hungara kaj la indonezia. Reliefiĝis tradukoj el “Oriento” (50 aziaj lingvoj) pli ol el “Okcidento” (20 eŭropaj), kaj ne mankis verkoj el Afriko kaj Oceanio. La katalogo de la kolekto estas ankoraŭ serĉebla ĉe: <http://www.unesco.org/culture/lit/rep/>.

Universala Esperanto-Asocio, konsciante pri la kulturaj celoj de Unesko kaj la dezirindeco resti en kunlaboremaj Konsultaj Rilatoj kun mondorganizaĵo kiu dividas plurajn esencajn celojn kun UEA, decidis iniciati kaj konstante aŭspicii la eldonserion “Oriento-Okcidento” de mondliteraturaj majstroverkoj tradukindaj en Esperanton. Similcele al la Unesko-Kolekto, aperis la unua verko en la jaro 1961: *Malsata Ŝtono* de la bengallingva aŭtoro Rabindranath

Tagore, en traduko de denaska parolanto de la bengala, Lakshmi-swar Sinha. Sekvante la ekzemplon de Unesko mem, UEA favoris diversecon en la elekto de verkoj kun aparta atento al Azio kaj malpli konataj literaturoj, tiel kontribuante al la Programo de Unesko por Reciproka Studo kaj Aprezado de Kulturoj. Baldaŭ sekvis la verkon de Tagore tradukoj el la lingvoj japana, franca, itala, finna, hispana kaj angla. Japanoj kaj ĉinoj estis aparte diligentaj en la diskonigo de sia kulturo ne nur en la propra regiono sed tute intence al legantoj en la okcidenta mondo.

Tamen, kiel indikas Renato Corsetti en sia enkonduko, ĝis nun vere lamis reprezentado de verkoj kiuj por la fekunda mondliteraturema germana verkisto Gete (Johann Wolfgang von Goethe) reprezentis unu el la kvar grandaj literatur-trezorejoj de la mondo, tiu de la persa lingvo. Tamen ne plu ni havas senkulpigon por ne konatiĝi kun ties artaj vortproduktoj, ĉar en la sama jaro 2021 aperas du esencaj verkoj kies legado draste forigos grandan parton de niaj nescio kaj neglekto. Dank' al la strebado de Said Baluĉi (S.N. Mozaffari Balouchi) por malkaŝi kun kunlaborantoj ambaŭ literaturajn regalojn en Esperanta traduko, unue aperis de lia propra redaktado la *Antologia skizo de la persa literaturo*, kiun apogis elektoj de kompetentaj majstroj en tiu studkampo, n-ro 58 en la Serio Oriento-Okcidento. Temas pri panoramo de 33 elstaraj prozspecimenoj kun la verkoj de 24 poetoj. Sekvas nun la kontribuo de Sadio, kiu por multaj fakuloj kaj laikoj estas la plej notinda kaj rekomendinda el ĉiuj elekteblaj verkoj de la persa literaturo.

Ni ne sentu troan kulpon pro tiu nun forvaporiganta neglekto. La kompatindaj anglalingvaj legantoj dum longa tempo devis kontentiĝi nur pri la traduko de la *Robaioj* de Omar Ĥajjam (Umar Kajjam por Gaston Waringhien, la plej konata el almenaŭ kvin tradukintoj en Esperanton). Por ili, tiu verko estis la persa literaturo. Krome, ili eĉ ne konsciis ke la tradukinto, Edward Fitzgerald, ne nur estis relativa amato, sed ofte modifis la esencan mesaĝon de la poeto, konscie aŭ nekonscie, por speguli la propran vivfilozofion.

Jen la granda danĝero de nacilingvaj tradukoj. Malofte la tradukanto scipovas denaske la originalon, kaj tre malmultaj kontroligas sian tekston per klera denaska parolanto kiu regas la traduklingvon.

Tre lerta multlingva usona poeto kaj tradukisto foje faris gravajn erarojn en siaj tradukoj, sed oni ne rimarkis tion en liaj tradukoj el la greka lingvo. Ne surprize. Lia edzino estis grekdevena.

Por tradukoj en Esperanto, ni havas plurajn avantaĝojn. Ne nur la fakton ke plejofte tradukas nacilingvano, kvankam ne ĉiam estas tiel. Zamenhof mem donis alian modelon, kvankam kiam li plene regis la koncernan lingvon, la traduko ĝenerale pli sukcesis speguli la originalon. Tamen ne malofte okazas kunlaboro kun samlingvaj kolegoj kaj eksteraj legantoj kiuj povas ĉion kontroli, kaj stile helpi la tradukantojn. Eventuale ili utilas por deĉifri signifojn kiuj ne transiras facile al aliaj kulturoj. Potenciale tia kombino povas atingi tre altan nivelon de fideleco kaj legeblo, kaj precize tion ni havas en ĉi tiu tradukita verko de Sadio. Rilate poezion, Esperanto estas kutime pli fleksebla kaj elasta ol jam historie rigidaj etnaj lingvoj, do pli facile spegulas kaj la enhavon kaj la formon, kiuj en la persa literatura lingvo necese koincidas por maksimuma efiko, kiel tion plene ekspluatis Sadio. La tradukintoj klare pli ofte sukcesis ol en alilingvaj tradukoj. Lasta konata sed gravega atentigo estas, ke Esperanto ne emas aldoni al la teksto jam enradikiĝintajn kulturajn nuancojn. Tiujn senkonscie ricevas la leganto de vortoj senteme kaj ne nur intelekto konataj ekde la infanaĝo en la propra gepatra lingvo.

Multajn aferojn ni ne konas de Sadio kaj lia vivo, do esploristoj hezitas doni biografiajn “faktojn”, kiujn alia esploristo povas dementi uzante materialon de alia fonto aŭ postulante pruvon, ne nur hipotezon. Mankas al ni rektaj raportoj de samtempuloj. Ĉu fidinda biografio gravas por interpreto de lia verkaro? Ĉu Sadio efektive eklernis la persan lingvon kiam li estis jam 40-jara? Ne ĉiuj verkistoj produktas en sia gepatra lingvo, kiel ni bone scias kaze de Esperanto, sed jen vere escepta kazo. Ĉu gravas tiu aserto por nia interpreto de la verkoj de Sadio, kaj nia koncepto pri li kiel verkisto kaj profunda akcelanto de la esprimkapablo de la persa lingvo? Ĉu ni povas imagi ke, kio ŝajnas nekredebla en nia epoko, povis esti tute natura en tute alia historia momento kaj kulturo? Ĉu biografia aŭ historia “vero” necesas, aŭ ĉu ni povas akcepti ke la literaturo eble ne nur spegulas la vivon, sed povas esti la vivo mem, ĉar la

ideoj kiujn ni ĉerpas el ĝi, povas fariĝi integra parto de tiu vivo, tiu vero kiun ni kreas por ni mem el niaj spertoj, pensoj kaj imagpovo?

Tiu estas faktoro kiun ofte ne konscias pragmatismaj okcidentanoj, kiuj insistas pri klara distingo inter fakto kaj fantazio, historio kaj rakontado. Sadio skribas aŭtobiografie, kaj tamen oni povas rimarki nekongrucon inter liaj priskriboj de la propraj vivaventuroj kaj la faktoj kiujn ni konas aŭ povas kredi. Ni scias eksterdube ke Sadio multe vojaĝis, kaj rakontis pri siaj spertoj. Tamen li ankaŭ konsciis, ke se li imagos la spertojn el alia perspektivo, aŭ mem kreas tian perspektivon, li povos havi materialon kiu estos pli amuza aŭ instrua por la aŭskultantoj, du gravaj celoj de literaturo parola (“buŝa”) aŭ skriba. Kiom gravas ĉu li iris al la tiama Hindujo (Barato) aŭ Kaŝgaro en Ĉinio? Li referencas ilin, sed ni tute ne havas ian pruvon ke li povis ilin atingi, kaj la probableco ne estas granda. Ĉu li aŭ ni povas profiti la ideon, kaj la imagbildojn, pri tia vizito kiu povis esti nur en sonĝoj? Por multaj filozofoj ne temas tiom pri “vero” kaj “fantazio” (aŭ eĉ “mensogado”), sed pri intertekstiĝo de niaj spertoj kun nia imagpovo por pliriĉigi nian vivon. Ni devas memori ke literaturo, kaj aparte tre malnova literaturo kiel la persa, kreiĝis unue por parola komunikado, ne por skriba. Vojaĝantaj rakontistoj povis pli facile memori versojn ol prozon, kaj la publiko povis tion pli bone kapti kaj ripeti se la imagbildo aŭ vortigo estis memorinda. Sadio unike eksperimentis en *La Florejo* la kombinon de prozo kun poezio, uzante rimitan, do poeziecan, prozon. Precize pro tio liaj memorindaj frazoj kaj rutinaj tropoj ripetiĝis en la buŝo de samlingvanoj kaj samkulturanoj tra la jarcentoj.

Antaŭ jarcento tri libroj estis vaste instruataj en la lernejoj persaj kaj alilandaj kien etendiĝis la persa lingvo. Laŭorde la tre antikva libro de konsiloj, *Pand-nāma-i Anūširvān* de la poeto Ŝarif, poste de Sadio la plej alirebla verko *Golestan*, *La Florejo*, ĉar temas pri facile kompreneblaj ĉiutagaĵoj, poste la pli teoria *Bustan*. *La Florejo* utiligas anekdotojn, kiuj ne celas ĉiam instrui. La poeziaj partoj ofte indikas moralan konkludon de proza anekdoto, sed ankaŭ tio ne estas rigida. Estas interese ke en la nuntempa edukado, oni ĉiam pli substrekas al instruistoj la utilon de instruado per anekdotoj, rakontoj, por teni la atenton de la lernantoj surloke kaj konservigi la lecionojn



en la memoro. Sub la suno nenio nova! Oni revenas al fundamenta vero pri la intelekta kaj sentema elementoj en la lernado de ni ĉiuj.

Vi kiel leganto devos mem trovi la lecionojn kaj amuziĝon kiujn vi serĉas, kaj ĉiu reago estos esence individua. Sadio konsciis ke la interpreto de liaj verkoj dependas de ĉiu leganto, al kiu li pro devige memaltrudita humileco ne kapablas dikti. Jam la anglalingvaj legantoj estas influitaj de la elekto de la titolo “La rozĝardeno”, ĉar rozoj pretendas esti la plej belaj foroj en la florejo, sed povas piki per siaj dornoj. Tamen oni povas elekti eviti la dornojn. Posedaĵoj kaj pozicio kreas malamikojn; scio, saĝo kaj humileco malaperigos ilin. Ĉu suferado akompanas la serĉon de signifo kaj beleco? Povas esti, se oni devas lerni lecionon el tio. Same kiel la majstro de la hispana literaturo Miguel de Cervantes Saavedra, kreinto de la pinta romano pri Don Kihoto, Sadio en siaj vojaĝoj suferis kiel kaptito. Tamen ambaŭ lernis de la sperto kaj rezulte plimalfermiĝis al aliaj kulturoj, kiujn ili povis poste reprezenti tolereme – kia leciono por ambaŭ! – al siaj legantoj. Ankaŭ Cervantes, loĝanto de regno deklarita nur kristana, konatiĝis en Alĝeria karcero kun sinceraj islamanoj, devige frontis siajn antaŭjuĝojn, kaj kiel verkisto helpis al aliaj fari same. Ambaŭ devis trovi vojon al venko de suferado, ĝis nura kontemplado de la belaj floroj kiel la rozo, spertante nek pikiĵojn nek serpentojn en sia mensa ĝardeno.

En la verkaro de Sadio, reliefiĝas sufiuj temoj. Ekzemple la in-spiro de la amo, kaj la amanto kiu vidas la belecon kaj ĉarmon de la amato kiel palan reflektadon de vizio preter la vualo de la mortema karno, rekonante la dian belecon en la spegulo de la amato. Al la brila lumo de la mateno de la amo cedas la pluva mallumo, kaj la animoj unuiĝas kun la fonto de la lumo. La nokto forpasas kiel sonĝo. En la florejo la floroj ĉiam revenas kun la printempo, kiel signoj de senmorteco, kaj tiu beleco triumfas super la dekadenco kaj la morto. Tamen necesas progresi preter tiu koncepto. Se ni tenas por ĉiam en la pensimago la belecon de la floroj en la florejo, ni jam ĝuas nian senmortecon, sub la brilo de kuniĝo de la belo kaj la saĝo.

Ĝuu la belecon de la florejo de Sadio kaj lernu de lia saĝo!

*D-ro Duncan Charters, Prezidanto de UEA*

## **Antaŭparolo de Keyhan Sayadpour**

La persa literaturo estas unu el la plej riĉaj en la mondo, probable danke al la longa historio de Persio/Irano kaj relative stabila lingvo dum multaj jarcentoj. Tamen nur eta kvanto el tio estas tradukita al Esperanto. Tio inkluzivas *Robaĵojn* de Omar Kajamo (1048–1122), poemaron de Rudaki (859–941), kelkajn gazalojn de Hafezo (1315–1390), la novelon *La nigra fiŝeto* de Samad Behrangi (1939–1968), kaj iom da diversspecaj eroj aperintaj en tre varia spektro de periodaĵoj, i.a. *Heroldo de Esperanto*, *El Popola Ĉinio*, *Fonto*, *Monato*, *Beletra Almanako*, kaj pli ol ĉiuj, *Irana Esperantisto*.

*La Florejo* (perse Golestan, 1258), estante ĉefverko de la persa literaturo, posedas altegan popularecon inter irananoj. La libro verŝajne estas inter la plej tradukindaj verkoj, ĉar ĝia enhavo estas pri la ĉiutaga vivo de diverstavolaj popoloj kaj tial tre facile kompreneblas por ĉiuj homoj tra la tuta mondo. Ĝi estas arte valora verko kun sia ege eleganta kaj ekvilibra kombino de prozo kaj poezio. Eĉ en ĝiaj prozaj partoj ni ĉiam renkontas uzadon de belegaj rimoj. Tian verkstilon oni nomas en la araba kaj persa lingvoj *nasre mosagĝa*, laŭsence “melodia prozo”, signifanta rimohavan prozon. Mi klopodis laŭeble reprodukti la rimojn ankaŭ en la proza traduko por laŭeble konservi la artan valoron de la libro. Tio postulis pli da laboro ol en la tradukoj al aliaj lingvoj. La aparta karakterizaĵo de la nuna traduko estas tio, ke la originalan tradukon faris perslingvaj esperantistoj.

La longa maratono de la tradukado de tiu ĉi libro estas dividbla en kvar fazojn. Unue mi komencis traduki partojn nur por mia amuzado. Tiam, estante ankoraŭ komencanto, mi serĉis aparte facile tradukeblajn rakontojn kaj kolektis la tradukojn en kajeron.

La dua fazo komenciĝis kiam ekaperis nia kultura sezon-revuo *Irana Esperantisto*, la organo de Irana Esperanto-Asocio en 2003. Mia kara amiko Reza Torabi fondis la revuon kaj petis min sendi kontribuojn, interalie tradukojn el la *Florejo*. En rubriko nomata “Floroj el la Florejo” aperis unue miaj malnovaj tradukoj kaj pli poste freŝaj tradukoj, inter 2004 kaj 2014.

En 2016, kiam mi proksimiĝis al mia kvindekjaraĝo, mi legis la jenajn versojn de Sadio:

**Daŭre el la viv' foriras ero,  
Kaj ne abundas ties cetero.  
Sadi', kvindek pasis kaj vi dormas.  
La restaj kvin tagoj ne enormas.  
Hontu la forpasinto sen verko!  
Senproviza dum kuŝ' en la ĉerko!**

Tiam kaj tial mi decidis traduki la tutan libron. Mi tradukis la unuajn du ĉapitrojn komplete kaj poste la plej malfacilan parton de la libro, ĝian enkondukon. Tio elĉerpis mian energion konsiderante la fakton, ke kiel kuracisto kaj universitata profesoro mi preskaŭ ĉiam estis, kaj ankoraŭ estas, tro okupata: **Plibonas iri kaj halti ripoze, ol kuri kaj laciĝi serioze.**

Tamen, mi ade sopiris pri la traduko de la tuta libro kaj serĉis solvon:

**Mi timas ke vi ne atingos Kaabon, ho arab'!  
Ĉar la voj' sur kiu vi paŝas, finiĝas en Turki'.**

En 2019 la 12-a Mez-Orienta kaj Nord-Afrika (MONA) kunveno okazis en la mez-irana urbo Kaŝano. Kiam mi kun miaj amikoj profesoro Renato Corsetti kaj inĝeniero Ahmad Reza Mamdoohi estis revenantaj al Tehrano, ni faris gravan decidon. Ni kreis internacian grupon por kompletigi la tradukadon. Aliĝo de mia kara amiko Said Baluĉi multe helpis. Li studis la persan literaturon en Irano kaj delonge loĝas en Nederlando. Entute li tradukis preskaŭ duonon de la libro kaj mi la alian. Kvankam Ahmad tradukis nur du rakontojn, tamen li delonge instigis min por la tradukado kaj provlegis miajn unuajn tradukojn, kiuj aperis en *Irana Esperantisto*. Krom Said Baluĉi kaj Renato Corsetti, kiuj reviziis la tutan tekston, estis ankaŭ aliaj karaj samideanoj, kiuj provlegis la libron kaj helpis al plibonigo de ĝia kvalito. S-roj Terry Page (Britio) kaj Vasil Kadifi (Turkio) reviziis la tutan tekston. Aliaj samideanoj reviziis partojn de la libro: la tre karaj s-roj James Rezende Piton, Vasvalto, Urso kaj Zehong. Mi esprimas miajn elkorajn dankojn al ĉiuj ili, sen kies helpoj kaj kontribuoj la nunan verkon vi ne trovus kiel ĝi estas nun.

Mi dankas ankaŭ la karan paron Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko, por la eldono de la libro pere de sia malnova kaj impona eldonejo Impeto. Ili afable akceptis ĉiujn kondiĉojn, kiujn mi petis.

Mi dankas mian malnovan esperantistan amikon Mahmood Mirbozorgi, kiu per sia eksterordinara arto pentris la kovrilon de la libro.

La bildojn en la libro faris mi. Utiligante la aplikaĵon Paintt, de mi faritajn fotojn mi ŝanĝis al la bildoj, kiujn vi vidas tra la libro. Mi esperas ke ili plaĉos al vi, karaj legantoj.

## **Kelkaj rimarkoj**

Ni klopodis fari rimon kie estas rimo en la originala teksto. Kelkfoje ni ne povis fari tion sed ni metis rimon en alia loko kie ne estas rimo en la originala teksto kaj tiel konservis la nombron de la rimoj. En maloftaj okazoj, ni ne sukcesis trovi rimojn kaj simple ne metis. Ni klopodis ke la versoj estu ritmaj kiel en la originalo, tamen ni konfesas ke tio ne eblas en ĉiuj okazoj.

Kvankam estas evidente, tamen mi deziras aparte rimarkigi, ke la traduko de tiu ĉi libro ne montras, ke ni aprobas ĉiujn opiniojn cititajn en ĝi. Kelkaj partoj de la libro certe povas esti ofendaj rase, religie, sekse k.s. Tamen, ni decidis esti fidelaj tradukistoj de historia teksto, kiu spegulas siatempajn, t.e. 13-a-jarcentajn, socion, kredojn, diskriminaciojn kaj antaŭjuĝojn.

La historio ne estas preciza, speciale pri antikvaj verkistoj. La datoj skribitaj en tiu ĉi libro estas proksimumaj kaj povas esti kelkaj jaroj frue aŭ malfrue. Tamen, ili povas doni al vi imagon pri la tempoj.

Sadio multfoje uzis versojn de la *Nobla Korano* en tiu ĉi verko. En la originalo, la leganto povas facile kompreni tion, ĉar temas pri arablingva teksto en la perslingva libro. En la traduko, por montri tion, ni uzis dikajn literojn kaj metis noton en la piedo pri la loko de la koncernaj versoj en la Nobla Korano. Por citi la Koranajn versojn, ni uzis la tradukon de la karmemora d-ro Italo Chiussi (1919–1973) tute fidele sen ajna ŝanĝo. Do, ekzemple ne miru se vi vidas la vorton “Alaho” en niaj tradukaĵoj kaj “Allah” en la Koranaj tekstoj, cititaj el la traduko de Italo Chiussi.

*Keyhan Sayadpour*  
*Tehrano, Aprilo 2021*

# **Antaŭparolo de Renato Corsetti**

## **Al kiu apartenas Esperanto? Monda kulturo por monda lingvo.**

Adamidoj estas ja korpoorganoj  
kiuj laŭkree estas samesencanoj.  
Kiam organon dolorigas la sorto  
restas por aliaj neniu komforto.  
Se alihoma sufero vin ne ĝenas,  
Por vi, la nomo “homo” ja ne konvenas.

Ĉi tiu poemo de Sadi’ estas en brodita tapiŝo en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj en Nova Jorko. Evidente temas pri lastatempa atingo de la literaturo en la persa lingvo. Sed ĝi estas eble la plej malgranda atingo. Temas pri literaturo, kiu ampleksas 2 jarmilojn kaj duonon el la vidpunkto de tempo kaj teritorion, kiu iris de Hindio al la tuta turka imperio ĝis Albanio kaj Maroko, do grandan parton de la monda historio kaj de la monda loĝantaro. Cetere parto de la plej spirita literaturo en la persa estis legata ĉie en la islama mondo de Maroko al Indonezio. Ankaŭ pluraj okcidentanoj admiris ĝin, el kiuj la plej konata estas Goethe [gete], kiu estis inspirita de traduko de la verkoj de Hafez.

Antaŭ ĝi oni devas demandi sin, kiel ĉi tiu monda fenomeno entute ne vaste influis Esperanton. Verdire ekzistas la traduko de la verso-kvaroj de Omar Ĥajam, kies plej konata tradukinto estas Gaston Waringhien [varengian], sed, kies traduko estis farita ankaŭ de kelkaj aliaj. Tamen preter tio estas dezerto.

Ĉi tio gvidas nin al la ĉefa demando en la titolo de ĉi tiu enkonduko: Al kiu apartenas Esperanto? Laŭ mi Esperanto apartenas al la mondo, kaj ĝi devas prezenti la mondan kulturon al la parolantoj de ĉi tiu monda lingvo.

Estas vero ke Esperanto aŭ pli precize la ideo pri internacia lingvo uzinda inter homoj el malsamaj lingvoj estis eŭropa ideo kaj estas vero, ke Zamenhof, la iniciatinto, estis profunde stampita de sia klera mezeŭropeco, kaj estas vero, ke en la 20-a jarcento la



plej granda parto de la parolantoj de Esperanto vivis en Eŭropo, sed bonŝance el la vidpunkto de tutmondeco Esperanto jam vastiĝis al la tuta mondo kaj multaj ekstereŭropaj Esperanto-parolantaroj estas pli viglaj ol la eŭropa naskiĝcentro. Do, estas tempo malfermiĝi al la monda kulturo. La tasko, kompreneble apartenas unuavice al perslingvaj esperantistoj kaj la ceteraj povos helpi nur per legado.

La traduko de ĉi tiu verko, kiu estas ĉiukaze unu el la centraj verkoj de la persa literaturo, igas nin esperoplenaj por la estontaj evoluoj.

*Renato Corsetti*  
*Londono, Aprilo 2021*

# Antaŭparolo de Said Baluĉi

D-ro Renato Corsetti estis en Tehrano, antaŭ kelkaj jaroj, pro Esperanta evento. D-ro Keyhan Sayadpour parolis kun li pri sia plano traduki kaj eldoni klasikaĵon de la persa literaturo. Li telefone demandis min ĉu ankaŭ mi kunlaboros? Mi jesis. Renato kaj Keyhan formis grupon da kunlaborantoj el diversaj landoj kies nomojn vi vidas en tiu ĉi libro. La rezulto estas nun tiu ĉi libro pro kiu mi, kiel esperantisto, kore dankas la kuraĝigon de Renato, persistemon de Keyhan, kiu apud sia profesia laboro kiel kuracisto kaj profesoro de kuracarto, ade okupiĝas pri Esperanto kaj literaturo, kaj kunlaboremom de aliaj kolegoj. Jen kelkaj vortoj pri Sadio:

## Sadio (Perse: Sá'di) (1184–1281)

Ŝejk' Moŝref filo de Mosleh Ŝirazi, kromnome Sá'di (Esperante: Sadio) naskiĝis en la komencaj jaroj de la sepa jarcento p.H. (=13-a jarcento p.K.) en mulaa familio en la urbo Ŝiraz en Persio. Pri liaj naskiĝ- kaj mortdatoj la historiistoj ne samopinias. Laŭ iuj, li mortis en 1291. La supremenciitaj datoj estas PIV-aj.

Post sia studado, li ekvojaĝis al Sirio kaj Heĝazo. En la tempo de la regado de Ábubákr Sá'd Zángi (623–658 p.H.= 1226–1260 p.K.) Salgurida (angle: Salghurids) GrandBejo (Ata Bejg) Sadio revenis al Ŝiraz kaj finverkis sian unuan libron en la jaro 655 p.H. (1257 p.K.). Sadio dediĉis tiun ĉi libron al tiu Bejo.

La libro ne ricevis apartan nomon de la aŭtoro. Nur post la apero de *Golestan*, oni nomis la unuan libron *Bustan* (Frukto/florĝardeno, horto), kompare kun *Golestan*.

Unu jaron pli poste (656 p.H.= 1258 p.K.) li verkis sian duan libron *Golestan* (florejo/ florĝardeno), kiun li dediĉis al la princo Sá'd filo de Ábubákr kaj elektis sian poetnomon laŭ lia nomo: Sá'di (Sadio).

*Bustan* estas poema kaj *Golestan* estas kombino de poemoj kaj ornamita (paronomazia) prozo. Poste li ekloĝis en sia Ĥangaĥo (1) en Ŝiraz. Li pasigis plejparton de sia cetera vivo tie kaj mortis

tie. Oni lin entombigis en lia ĥangaho kaj la tombo ankoraŭ restas vizitata.

Sadio estas unu el la kvar plej grandaj poetoj de la persa lingvo. La aliaj tri estas: Ferdoŭsi, Rumi, Hafizo. Sadio fariĝis modelo por postaj verkistoj. Lian stilon oni nomas “neimiteble simpla.”

Tiuj ĉi du libroj, kiujn li verkis kiam li estis 40-45-jara, famigis Sasion dum lia vivo kaj lia famo daŭras ankoraŭ. Ili estis/as lernolibroj pri la persa lingvo en landoj kiuj uzis/as la modernan persan lingvon (Farsi).

La tempo de Sadio estis tempo de politika malstabileco, pro la atako de mongoloj kaj enlandaj militoj. Sadio decidis forlasi la landon. Li iris al Bagdado kaj tie studis en la fama universitato Ne-zamije. Poste li vojaĝis al aliaj landoj. Li tre ŝatis vizitadi diversajn homojn el malsamaj kulturoj kaj religioj. En liaj verkoj, ni klare vidas la spurojn de tiaj konatiĝoj. Li ne estas fanatika. Li citis multe el diversaj homoj. Tial iam ni renkontas kontraŭdirojn en liaj tekstoj. Tiaj kontraŭdiroj troveblas ankaŭ en nia vera vivo! Por li la lingvo mem situas en la centro. Li uzas la konceptojn por elmontri sian lingvan lerton. Tial multajn jam ekzistantajn proverbojn nuntempe la homoj citas laŭ la esprimo de Sadio. Se li celis fondi novan skolon, li sendube sukcesis pri novstila lingva skolo, nek pri etiko nek pri io alia.

Pro siaj multaj vojaĝoj, li lerte enpersonigis diversajn homojn: riĉajn, malriĉajn, regantojn, kredulojn, herezulojn ktp. Li mem pli scipovis la religikredon ol plenumi ĝin. Li admonas eĉ la ŝahojn kaj sultanojn ke ili ne estu kruelaj kontraŭ la malfortuloj. En absoluta monarkio la kritiko ne estas tolerata sed la admonoj, ĉefe per religia lingvaĵo, iomete jes.

Krom *Bustan* kaj *Golestan*, Sadio verkis ankaŭ aliajn librojn. Liajn gazalojn kaj kelkajn aliajn poemojn oni jam eldonis, sed liajn ŝercojn, satirojn kaj pamfletojn oni evitis presi. Oni timis ke tiaj “banalaĵoj” difektos la publikan moralon aŭ malbonfamigos Sasion mem.

Mi petas la leganton de tiu ĉi libro pri ties opinio. Ĉar mi kunlaboris por traduki parton, do mi scivolemas pri la kritikoj, plibonigoj kaj ajna reago de la legantoj.

Mi esperas ke tiu ĉi libro pliriĉigos niajn jam ekzistantajn esperantigitajn klasikaĵojn kaj instigos pliajn esperantistojn ke ili traduku el sia nacilingvo.

**Said Baluĉi**  
**Roterdamo, Januaro 2021**

(1) *Ĥanqah/ Khanqah/ Khanghah: kunloĝejo kaj kunsidejo de derviŝoj kaj sufiistoj. Esperante proksimume: Marabutejo. Kie islamaj sanktuloj vivas, preĝas, kaj kiu post ilia morto fariĝas pilgrimloko. Terminologie la vorto ekaperas en Maniĥeismo. Ĥan/Ĥane = domo/hejmo kaj Gah = loko/ejo. Kiam prosperis sufiismo en Irano, oni uzis tian lokon kiel klubon de sufiistoj, fakiroj kaj derviŝoj.*

## Enkonduko de La Florejo

Je la nomo de Dio, la Donema, la Pardonema

Ni ŝuldas dankon pro nia vivo al Dio, la Plej-glora kaj la Plej-valora. Obei Lin proksimigas al Li la korojn kaj danki Lin multobligas Liajn favorojn. Ĉiu spiro, enirante, vivon daŭrigas, kaj, elirante, animon plezurigas; do du favorojn de ĉiu spiro oni ricevas kaj pro ĉiu favoro danki devas.

Kapablas kies manoj kaj lango  
danki Lin laŭ Lia Dia rango?

**“Laboru, vi, gento de Davido, dankeme!” Nur malmultaj el Miaj servantoj estas dankaj.(1)”**

Estas pli bone ke la preĝanta homo  
pardonpetu de Dio pro sia manko,  
Alie, neniu laŭ Lia merito  
kapablas esprimi sufiĉe da danko.

La pluvo de Liaj senmezuraj favoroj ĉien venas kaj la tablo de Liaj senmankaj manĝaĵoj ĉie plenas. La vualon de reputacio eĉ post kulpego Li tenas kaj la destinitan rimedon eĉ pro erarego ne forprenas.

Ho Malavara, kiu de Sia trezor’  
donas al zoroastranoj kaj kristanoj!  
Certe profitos ankaŭ viaj amikoj,  
Kiam vi tiel kondutas al sektanoj.

Al tapiŝanta orienta vento Li ordonis etendi verdan tapiŝon kaj al mamnutranta printempa nuboj Li diktis kreskigi sur la luli-  
lo-tero infanecajn plantojn. La arbojn Li vestis per verda folio-ro-  
bo kiel Noŭruza (2) vesto, kaj pro alveno de printempsezono, Li surmetis sur infanecajn branĉojn ĉapelon de burĝono. Kansuko fariĝas dolĉa sukero per Lia forto kaj daktil-kerno fariĝas alta palmo per Lia varto.



Nubo, vento, luno, suno kaj ĉiel' laboras,  
Por ke vi gajnu panon kaj ne manĝu neglekte.  
Ili ĉiuj al vi obeas kaj okupatas,  
Ne estas juste se vi ne obeas respekte.

(1) *La Nobla Korano, ĉapitro 34, verso 14.*

(2) *Laŭvorte signifanta Novtago, ĉar ĝi estas la unua tago de la novjaro laŭ la irana kalendaro (21-a de marto). Irananoj kaj kelkaj aliaj popoloj festas ĝin tradicie per novaj vestoj.*



Rakontis la sinjoro de la estaĵoj, honoro de la kreitaĵoj, favoro al la mondanoj, trezoro de la homaranoj kaj gloro de la epokoj, Mohamedo Mustafa (3), la Dia saluto estu al li kaj lia gento:

Propetanta, profetanta, donacema, protekta,  
Belaspekta, intelekta, sendifekta, perfekta.

Kial malĝoji kiam por religi-mur' vi estas apogŝtupo?  
Kial timi pro ondoj kiam Noa estas la estro de l' ŝipo?

Superis li per la kompetento, perfektas lia inteligento,  
Belas ĉiu lia elemento, saluton al li kaj lia gento.

Ĉiufoje kiam pekulo, maltrankvile en angulo, levas la manon de pento kun espero de konsento al Dia kortego; Lia Glora kaj Valora moŝto ne atentis. La homo revokas Dion, sed Li ankoraŭ ne atentis. La homo vokas refoje, lamentante kaj plorante. Dio, la Pura kaj Nura, diras: “Ho vi anĝeloj! Mi hontas ĉar mia kreito ne havas alian ŝirmon, do Mi pardonas lin. Mi aŭdis lian eldiron kaj realigis lian deziron. Ĉar mi hontas pro la abundo de liaj preĝoj kaj petoj:”

Jen afabl’ kaj favor’ de Di’:  
Pekis homo kaj hontas Li.

Pilgrimantoj de Lia pompo-Kaabo (4) konfesas sian preĝ-mal-multecon: “Ni ne adoris Vin laŭ Via adorindeco.” Kaj laŭdantoj de Lia belec-grandiozo estas surprizitaj: “Ni ne konis Vin laŭ Via konindeco.”

Se oni demandos min pri Dio,  
Kiel diri pri io senforma?  
Amanto jam mortis pro Amato,  
El mortint’ ne venas voĉ’ informa.

Piulo metis la kapon sur la kolumon de evitado kaj dronis sin en la maro de meditado (5). Kiam li revenis de tiu situacio, kamarado demandis: “De tiu ĝardeno, kie vi estis, kion vi donace kunportis por mi?” Li respondis: “Mi planis pleniĝi la baskon de mia vesto per rozoj por la kamaradoj, kiam mi trovos rozujon. Sed la rozodoro tiom ebriigis min, ke mi ellasis la baskon.”

Ho najtingal’! Lernu amon de papili’!  
Ĉar ĝi brulis kaj mortis, sen ia kanto.  
La pretendantoj pri Dio ja ne scias,  
Ĉar l’ aliajn ne sciigas la scianto. (6)

Ho pli supra ol imag', kompar', supoz' kaj penso  
Kaj aĵoj diritaj, aŭskultitaj aŭ legitaj!  
La kunven' jam fermiĝis kaj la viv' jam finiĝis,  
Sed koni Vin ni ankoraŭ estas hezitaĵ.

(3) *Titolo de Mohamedo.*

(4) *Sankta domo en Mekko.*

(5) *Meti la kapon sur kolumon = okupiĝi pri afero. Evitado = eviti homojn kiel ermito.*

(6) *La signifo: Kiu bone konas Dion, tiu ne parolas multe pri Dio ĉar li scias ke estas malfacile kaj ne precize priskribi Dion al homoj.*

Citi la renomon de Sadio populariĝis en la buŝo de la popolo, kaj la famo de liaj prelegoj disvastiĝis sur la monda tavolo. La dolĉaĵo de liaj rakontoj estas konsumata kiel sukero, kaj la kajero de liaj verkaĵoj estas valora kiel orpapero. Tio dependas ne nur de liaj supereco kaj elokventeco, sed ankaŭ de la monda trono, era impono, anstataŭulo de Salomono kaj kredantara patrono, granda patro, venkinto de la mondo kaj religio, Abu-Bakr ben Saad ben Zangi (7), Dia ombro sur la tero. Dio de la tero estu kontenta pro li! Li favoris inunde, laŭdis abunde, kaj sin klinis profunde. Resume, ĉu simpla ĉu altranga, ĉiu ŝatas lin, ĉar la popolo prenas la religion de sia reĝo.

Ekde via rigardo kun favoro,  
Miaj verkaĵoj brilas kiel oro.  
Se ĉiuj mankoj kuŝus en aĉa mi,  
Reĝ-ŝatata manko estas honoro.

Parfuman koton iam en banejo  
mi ricevis de amik' en kompani'.  
Mi diris: "Ĉu ambro aŭ mosk' vi estas,  
Via odor' portis min al eŭfori'."

Ĝi diris: “Mi estis malkara koto  
ĝis mi iom sidis ĉe eglanteri’.  
Kunula perfekto efikis sur min.  
Tamen mi estas ter’, kio estis mi.”

Ho Dio! Favoru al islamanoj per longeco viva kaj konduto  
pozitiva, altrangigu iliajn amikojn kaj pereigu iliajn malamikojn  
kaj misdezirulojn laŭ la eldiroj de Koranaj versoj! Ho Dio! Gar-  
du ilian landon kaj zorgu ilian idaron!

Li feliĉigis la mondon. Vivu li!  
Dio fortigu lin per venkemblemoj!  
Verdos la branĉ’ kies radik’ estas li,  
Mondaj plantoj ŝuldas al liaj semoj.

Dio, La Bonega kaj Sankta, gardu la puran regnon de Ŝirazo  
(8) per la impono de justaj potenculoj kaj dispono de ĝustaj sci-  
enculoj kaj flirtu ĝia flago ĝis releviĝa tago!

Persi’ ne angoras pro l’ danĝeroj,  
Ĉar ĝin prezidas vi, ombro Dia.  
Nenio sur l’ ter’ tiel montrindas,  
kiel sekura kortego via.  
Mizerul-zorgi estas via task’,  
Rekompenci, Dia; danki, mia.  
Kiel daŭras la tero kaj vento,  
Daŭru ja tiu ĉi regno nia!

Nokton mi pripensis pri mia pasinto, sopiris pro la perdita  
vivo, traboris la ŝtonon de la korĉambreto per la diamanto de  
plorguto, kaj verkis ĉi versojn konformajn al mia stato:

Daŭre el la viv’ foriras ero,  
Kaj ne abundas ties cetero.  
Sadi’, kvindek pasis kaj vi dormas. (9)  
La restaj kvin tagoj ne enormas.  
Hontu la forpasinto sen verko!  
Senproviza dum kuŝ’ en la ĉerko!

Matendorm' dum vojaĝ' portas ĝojon,  
 Sed vojaĝanto perdas la vojon.  
 Ĉiu venis kun kre' de nova dom',  
 Transdononte ĝin al alia hom'.  
 Ankaŭ l' alia diboĉon faris,  
 Neniu longe en la dom' staris. (10)  
 Malfirman amikon ja ne ŝatu!  
 Nefidindan homon ne kompatu!  
 Ĉu bonaj ĉu malbonaj, ni mortos.  
 Pli bone se virton ni kunportos.  
 Al via tombo sendu valoron!  
 Poste neniu sendos favoron.  
 Vivo, neĝ' sub julia sun' estas.  
 Sinjor' ignoras kiam et' restas.  
 Ho! Iranta senmone al bazar',  
 Min timigas reveno sen dastar' (11).  
 Se nematuran frukton vi manĝas,  
 Rikolti nudbranĉojn vi aranĝas.

*(7) La fama ŝiraza reĝo samtempa kun Sadio. La nomo de Sadio venas de la nomo de la patro de tiu reĝo, Saad.*

*(8) Irana urbo kie vivis Sadio.*

*(9) Temas pri 50 jaroj de lia aĝo.*

*(10) Stari en la domo aludas al vivo en la mondo.*

*(11) Dastaro estas formo de turbano.*

Post pripenso pri tiuj sentoj, mi decidis izolecon elekti, babiladon neglekti, bagatelojn ne plu kolekti, kaj sensencaĵojn ne plu respekti.

En angul', surda kaj senparola,  
 pli bonas ol lango senkontrola.

Subite kiel kutime eniris tra la pordo amiko, kiu dum la vojaĝo min eskortis kaj al la festenoj min kunportis. Lian deziron



de ekludo kaj drapiron de ŝercbudo mi neglektis kaj mian preĝon ne difektis. Ĉagrenite, li rigardis al mi kaj ekdiris:

“Nun kiam vi kapablas paroli,  
Vi diru amuze kaj afable!  
Kiam venos la tempo de morto,  
Vi ĉesigos ĉion senkapable.”

Konato mia informis lin ke tiu persono havas decidon kaj rigidon izole pasigi la ceteran vivon kaj silenti. Vi preterpasu kaj lin forlasu. Li diris: “Pro Dia unikeco kaj malnova amikeco, mi ne vorton diras kaj ne foriras, se ne estos interparolo laŭ maniero kutima kaj en etoso intima. Ĉar ĉagreni amikojn estas malĝentile kaj kompensi ĵurorompon facile, kaj kontraŭ la ĝusto kaj saĝa justo estas Ali-a glavo en kuŝo kaj Sadia lango en la buŝo. (12)”

Ho saĝul’! Kio estas lang’ en buŝ’?  
Ŝlosilo por la trezor’ de artist’.  
Fermitporde, oni ja ne scias  
ĉu estas juvelist’, ĉu kolportist’.

Kvankam prudentas silenti ĉe saĝul’,  
Laŭokaze pli bonas ne silenti.  
Du estas kontraŭ saĝo: silenttempe  
paroli kaj paroltempe elokventi.

Resume, rezigni paroli kun li estis malfacile kaj deturni la vizaĝon de li malĝentile. Ĉar li estis amiko intima kaj nia amikeco, estima.

Antaŭ milit’ konsideru kiel sekuri!  
Eblecoj por konkuri aŭ forkuri!

Laŭnecese mi komencis paroli kaj ni eliris promeni dum printempo, kiam la malvarmo venis al sia fino kaj la verdĉarmo paŝis al sia kulmino.

Sur la arboj, ĉemizo el folio:  
Novjara vest’ de riĉa familio. (13)

La unuan de Ordibeheŝt-monat', (14)  
Kantanta najtingal' sur branĉpodio,  
Roso sur rozo estis kiel perlo,  
Sur belulina vang', ŝvitsekrecio.

*(12) Ali estis la kuzo de Mohamedo, kaj la unua imamo de ŝijaistoj*

*(13) Irananoj dum la novjara festo surmetas novajn vestojn.*

*(14) Ordibeheŝt estas la dua irana monato, samtempa kun  
aprilo kaj majo (la 21-a de aprilo ĝis 21-a de majo).*

Okazis tranoktado en ĝardeno kun la kamarado: loko freŝi-  
ga por la menso, plena de arboj kun enorma denso. Kvazaŭ oni  
tapiŝon el kolorvitretoj estus etendinta sur ĝia tero, kaj kolĉeno el  
Plejadsteloj estus pendinta de ĝia arbo anstataŭ bero.

Ĝardeno kun fluakvo trinkebla  
Arboj kun birdkantoj harmoniaj.  
Tiu plena je tulipoj buntaj,  
Kaj tiu ĉi je fruktoj variaj.  
Etendis kolorriĉan tapiŝon  
vento subombre de arboj ĝiaj.

Matene, kiam la angoro reveni venkis la emon resti, mi vidis  
lin kun plenbasko da floroj, bazilioj, hiacintoj kaj aliaj herboj;  
kaj preta reveni urben. Mi diris: "Kiel vi scias, la ĝardena floro  
ne longe daŭras kaj la florejo pro flormanko ofte bedaŭras. La  
filozofoj diras: Ĉiu havanta fruan finon ne meritigas inklinon." Li  
diris: "Kio estas la solvo?" Mi respondis: "Por amuzo de legantoj  
kaj uzo de prelegantoj, mi povas verki la libron "La Florejo",  
kiun la aŭtuna vento ne povas malaranĝi kaj kies printempan  
prosperon al aŭtuna malprospero la tempoturno ne povas ŝanĝi.

Kia util' por plado da lili'?  
Kompare al mia Florej-foli'.  
Floro ja vivas kvin tagojn aŭ ses,  
Sed la Florejo prosperas sen ĉes'.

Kiam mi diris tion, li ne plu florojn en sia basko tenis kaj mian manikon prenis: “Promesinta noblulo plenumas.” Ĉapitron mi verkis dum tiu tago pri ĝentila konduto kaj manieroj de parolado en la formo uzebla por oratoroj kaj utila por aŭtoroj. Resume, ankoraŭ restis floro en la ĝardeno kiam mi finverkis la libron “La Florejo”.



Kaj fakte la libro finiĝas kiam ekŝatas ĝin la kortego de la mondprotektanta reĝo, la ombro Dia kaj la radio de favoraro Lia, eraa ravo kaj esperloko por savo, fortigita per la ĉielo, venkinta sen ŝancelo, la brako por politika strategio, la lanterno por la kara

religio, popola amo, honoro por islamo, granda reĝo, sidanta sur la reĝa seĝo, lordo de la arab-persa reĝaro, sultano de la tero kaj maro, heredinto de la solomona regno, Abi Bakr, filo de Saad, filo de Zangi, Alaho daŭrigu liajn feliĉojn kaj multobligu liajn riĉojn, kaj direktu al boneco liajn kondiĉojn. Kaj danke al Dia favoro, li legu la libron:

Se la libr' ricevos liajn favorojn,  
Ĝi fariĝos perslingva arta parad'.  
Estas espero, ke li ne malĝojos,  
Ĉar la Florej' ne estas por suferad'.  
Speciale ĉar ĝia enkonduko  
havas la nomon de Abu Bakr Saad.

Ne plu mia interna fianĉino pro sia malbela kapon mallevas, kaj mia okulo de malespero rigardi al la piedo de honto devas (15), kaj aniĝi al piularo mi revas; se ĝi posedas ornamon de la akcepto de la granda emiro, justa sciencisto, fortigita venkinta helpanto, defendanto de la sultana trono kaj rekomendanto al la divana komisiono, por malriĉuloj gravulo, por rifuĝintoj bravulo, majstro por religiuloj, amiko por piuloj, honoro por persoj, reĝa dekstra mano, speciala kortegano, helpanto de helpindaj manoj, honoro de islamo kaj islamanoj, apogilo por la reĝoj kaj sultanoj, Abu Bakr, filo de Abu Nasr. Dio longigu lian vivon, altigu lian estimon, ĝojigu lian animon, kaj grandigu lian rekompencan! Ĉar li estas kolekto de virtoj diversaj sub respekto de granduloj universaj.

Ja sub la ombro de lia zorgo unika,  
Pek' iĝas morala kaj malamik' amika.

Ĉiu homo kaj servanto havas difinitan servon. Se oni plenumas ĝin malatente kaj maldiligente, probable riproĉo kaj laŭta voĉo; escepte de derviŝoj, kiuj devas danki helpantajn grandulojn, bone rememorigi ilin kaj preĝi por ili. Plenumi tiujn taskojn

en soleco pli indas ĉar fari publike la lastan proksimas al afekto, kaj la unuan malproksimas de perfekte.

Ĝiba ĉieldorso rektiĝas pro ĝojo,  
Ĉar naskis bebon kiel vi, epokdamo. (16)  
Apartigi homon por popola bonfart'  
per La Mondkreint' estas saĝa programo.  
Ĉiu bonnoma trovis eternfeliĉon  
ĉar oni bone memoras lin pro l' famo.  
Ĉu la virtaj homoj admiras vin ĉu ne,  
Bela vizaĝo belas eĉ sen ornamo.

Manko kaj neglekto pri diligenta servo por Dio similas al la okazaĵo kiam barataj filozofoj diskutis pri la virtoj de Bozorgmehr (17). Fine ili trovis nur unu malvirton: li parolas malrapide pro longaj paŭzoj. Aŭskultanto devis longe atendi por aŭdi la eldiron. Bozorgmehr aŭdis tion kaj diris: "Pensi pri diroto estas pli inde ol penti pri dirito."

Sperta oratoro antaŭ popolo  
devas antaŭpensi pri la parolo.  
Pri l' parol' ne fanfaronu avide!  
Diru dece, eĉ se tre malrapide!  
Antaŭpensu se vi ŝatas sukceson!  
Ĉesu antaŭ ol oni petos ĉeson!  
Homoj superas ĉar ili parolas.  
Bestoj superas se l' parol' frivolas.

Kiel mi aperu inter la nobluloj de la kortego de la reĝo, lia helpo fortiĝu, kie estas kunvenejo de literaturistoj kaj centro por spertaj sciencistoj. Se mi bravus oratori, mi estus impertinenta, kvazaŭ mi portus malkaran donacon al la kara Jozefo (18). Simpla ŝtono por juvelistoj ne valoras kaj lampo ĉe la suno ne furoras. Ankaŭ alta minareto kompare al Alvando (19) similas al juglando.

Levanto de la kol' por pretendi  
riskas sian bonan famon ofendi.

Sadi' estas humila kaj facila,  
Neniu batalas kontraŭ humila.  
Pensu antaŭ komenci vortokuron!  
Konstruu la bazon, poste la muron!

Mi povas fari artefaritajn florojn, sed mi ne faras ilin en florgardeno, kaj mi povas prezenti belecon, sed mi ne faras ĝin en Jozef-tereno (20). Oni demandis Lukmanon (21): “De kiu vi lernis saĝon?” Li respondis: “De blinduloj, ĉar ili ne eniras al loko pri kiu ili ne certas. Pensu pri eliro antaŭ eniro! Provu vian virecon antaŭ geedziĝo!”

Kvankam la koko spertas batale,  
Ĝi batalas kontraŭ falk' skandale.  
Muskaptanta kato estas leon'.  
Tamen kontraŭ tigr', musas reale.



*(15) Sadio similigis sian internon (memon) al fianĉino, kiu antaŭe pensis ke ŝi estas malbela kaj nun malsame. Poste li similigis sian malesperon al okulo de homo, kiu pro honto rigardis la piedojn; sed post la verko de tiu ĉi libro, li ne plu bezonas fari.*

(16) *La tiaman epokon similigis Sadio al virino kiu naskis bebon kiel tiaman reĝon (Abu Bakr, vidu la vortareton!).*

(17) *Saĝa noblulo, ĉefministro kaj generalo tempe de la sa-sanida dinastio. Vidu la vortareton!*

(18) *Sadio aludas al la Koranaj versoj pri la profeto Jozefo. Liaj malicaj fratoj kunportis malgrandan donacon al li kaj plendis pri sia malriĉeco.*

(19) *Montpinto (3580 m) en la Hamadan-provinco de Irano.*

(20) *La profeto Jozefo estis fama pro beleco.*

(21) *Saĝa homo. Vidu la vortareton!*

Konfidante al la bonega konduto de la nobluloj, kiuj fermas la okulojn al la mankoj de la subuloj kaj ne strebas malkovri pekojn de la etuloj, kelkajn mallongajn vortojn de eminentuloj, kaj fabelojn, poemojn, rakontojn, kaj virtojn de la pasintaj reĝoj, Dio benu ilin, mi enmetis en tiun ĉi libron, kaj parton de la kara vivo mi formetis por verki ĝin. Jen estis la kialo por verki la libron, kaj sukceso venas de Dio.

Jarojn restos ĉi poezia verko,  
Dise falos el la korp' ĉiu ero.  
La celo estas lasi ion de mi,  
Ĉar la vivo estas nur efemero.  
Neniu preĝas ade por derviŝoj  
krom pro foja bonula konsidero.

Granda skrupulo en la librorganizo kaj ĉapitroprovizo preferis mallongecon, metinte ok ĉapitrojn por tiu arbaro densa kaj ĝardeno intensa kiel ok pordojn de la paradizo. Por ke vi ne fariĝu enua, ne estas ĉapitro plua.

Unua ĉapitro pri la kondutoj de reĝoj  
Dua ĉapitro pri la virtoj de derviŝoj  
Tria ĉapitro pri la meritoj de kontenteco  
Kvara ĉapitro pri la avantaĝoj de silenteco

Kvina ĉapitro pri la amo kaj junaĝo  
Sesa ĉapitro pri la malforto kaj maljunaĝo  
Sepa ĉapitro pri la efikoj de edukado  
Oka ĉapitro pri la reguloj de parolado

Kiam ĉi libr' estis en sia proces',  
de l' heĝiro pasis sescent kvindek ses. (22)  
Mi celis admoni kaj tion diris.  
Mi allasis ĉion al Di' kaj iris.

*(22) Fuĝo de Mohamedo el Mekko al Medino (622 p.K), la komenco de islama kalendaro. Do la libro estas verkita en la jaro 1258 p.K.*



# Ĉapitro 1

## La Kondutoj de Reĝoj

### Rakonto 1

Mi aŭdis pri reĝo, kiu ordonis mortigi kaptiton. La kompatinda kaptito dum tiu senespera situacio ekinsultis la reĝon laŭ la diro: Kiu ne timas sian morton, tiu diras ĉiun enkoran vorton.

Kiam ne estas alia por savo,  
Mano batalas kontraŭ akra glavo.

La lango de senesperulo longiĝas (1) kiel venkita kato kontraŭatakanta al hundo.

La reĝo demandis: “Kion li diras?” Unu el la bonkoraj veziroj diris: “Via reĝa moŝto! Li diras: “**Kaj kiu subpremas la koleron kaj pardonas al la homoj**”” (2). La reĝo kompatis kaj nuligis lian sangelverŝon. Alia veziro, malamika al la unua, diris: “Ne decas tio, ke niaj samranguloj parolu ĉe reĝoj ion krom la vero. Li insultis la reĝon kaj diris malĝentilajn vortojn.” La reĝo grimacis pro tiu ĉi parolo kaj diris: “Lia mensogo ŝajnis al mi pli merita ol via verdiro, ĉar ties celo estis bonfara kaj ĉi ties bazo estis malica. La saĝuloj diris: Estas pli bona mensogo paciga ol verdiro intriga.”

Se reĝo plenumas ies konsilon,  
Ties maldeca dir’ portos malutilon.

Sur la arkado de la altano de Ferejdun (3) estas skribite:

Por neniu la mondo estas ĉiama,  
Nur al ties kreinto estu ama.  
Al la monda regno ne apogu vin!  
Ĝi vartis multajn kaj mortigis ilin.  
Kiam forpasas la pura animo,  
Ĉu sur la trono ĉu sur la pavimo.

(1) *Li multe parolas.*

(2) *La Nobla Korano, ĉapitro 3, verso 135.*

(3) *Antikva miteca persa reĝo, kiu en la persa literaturo estas simbolo de venkado, justeco kaj donemo.*

## **Rakonto 2**

Ĥorasana (1) reĝo sonĝis pri Mahmud Saboktakin (2) kies tuta korpo putris kaj fariĝis tero krom liaj okuloj, kiuj ankoraŭ en la orbitoj turniĝis kaj rigardis. Ĉiuj saĝuloj malsukcesis interpreti tiun sonĝon krom derviŝo (3), kiu alsalutinte diris: “Li estas ankoraŭ melankolia ĉar regno lia apartenas al alia.”

Multaj famaj personoj enteriĝis,  
kaj surtera sign’ el ili ne restis,  
Kadavro, kiu la tombon eniris,  
tiel putris, ke eĉ porci’ ne restis.  
Vivas la glora nom’ de Nuŝiravan (4),  
Kvankam jam de longe plu li ne restis.  
Bonfaru utiligante l’ vivdaŭron  
antaŭ la novaj’, ke vi ne plu restis.

(1) *Ĥorasano estis granda regiono, kiu etendiĝis sur la nuntempaj Afganio, Taĝikio, Irano, Uzbekio kaj Turkmenio. Nuntempe la vorto aparte uziĝas por la tri provincoj, kiuj kovras la iran parton de la historia regiono. Vidu la vortareton!*

(2) *Mahmud Saboktakin (998–1002 p.K.) estis persa-turka reĝo de la Gaznvida dinastio (975–1187 p.K.)*

(3) *Vaganta monaĥo. Vidu la vortareton!*

(4) *Nuŝirvano aŭ Anuŝirvano (531–572 p.K.) estis persa reĝo de la Sasanida dinastio (226–650 p.K.), fama pro sia alta justeco.*

### Rakonto 3

Mi aŭdis pri princo malalta kaj malgranda, kies fratoj estis altaj kaj belaj. La reĝo rigardis lin malŝate kaj humilige. La princo saĝe kaj sagace diris: “Ho patro! Inteligentulo malalta estas pli bona ol altulo stulta. Ne ĉiu alta je statur, altas je valormezuro. La ŝafo estas bonodora sed la elefanto estas fetora.”

Tur (1) estas la plej malalta mont’ sur la ter’,  
Sed ĝi estas la plej valora ĉe Dio.

Ĉu vi aŭdis pri maldikulo logika,  
kiu iam diris al stultulo dika:  
“Araba ĉevalo eĉ kun eta korpo  
Ol plena azenstal’ estas pli efika.”

La patro ridis, la korteganoj admiris, kaj la fratoj suspiris.

Ĝis la tempo de ies parolstarto,  
Kovritas ties difekto kaj arto.  
Ne ĉiu makulbest’ estas ĉasaĵo,  
Eblas esti dormanta leopardo.

Mi aŭdis ke aperis forta malamiko kontraŭ tiu reĝo. Kiam iliaj armeoj staris unu kontraŭ la alia, la unua persono, kiu venis sur la militkampon estis tiu princo. Li diris:

“Dum milit’ ne videblas mia dorso,  
Sed ja eble mia kapo sur stango.  
Batalant’ nur pri sia sango riskas,  
Sed rezignanto pri l’ arma sango.

Tion li diris kaj atakis la kontraŭan armeon kaj pereigis kelkajn soldatojn. Veninte ĉe la patro li kisis la teron (2) kaj diris:

“Ho vi, kiu ja favoris min multe!  
Ne rigardu dikecon kiel povon!  
Oni bezonas maldikan ĉevalon  
Dum milito, kaj ja ne dikan bovon.”

Oni rakontis, ke la malamika armeo estis granda kaj la ilia, malgranda. Kelkaj soldatoj ekpensis foriri. La filo ekkriis: “Ho viroj! Aŭ plu restu aŭ kiel virinoj sin vestu!” Per tiuj vortoj la braveco de la soldatoj pliiĝis kaj ili subite atakis la malamikon. Mi aŭdis, ke ili venkis la malamikan armeon dum la sama tago. La reĝo kisis la kapon kaj okulojn de la princo, alprenis lin apud sin, ĉiutage pli kaj pli atentis lin kaj fine elektis lin kiel sian anstataŭonton. La fratoj enviis kaj metis venenon en lian manĝaĵon. Lia fratino de sur la balkono vidis kaj raportis la aferon al la princo. Li komprenis kaj rezignis manĝi kaj diris: “Tio ne eblas, ke povuloj mortas kaj senpovuloj anstataŭigas ilin.”

Neniu sub la gufombron venas,  
kiam Homa (3) surtere promenas.

Oni informis la patron pri la okazaĵo. Li kolektis la fratinojn kaj dece punis ilin. Poste li nomis ĉiun kiel estron de unu provinco de la lando, por fini la kverelon kaj estingi la malicon: Dek derviŝoj povas dormi sur unu mato sed du reĝoj ne povas resti en unu ŝtato.

Se piulo manĝas panduonon,  
al derviŝ' li donas la alian.  
Se regnon konkeras reĝa moŝto,  
li pensas kiel konkeri plian.

*(1) Antikva monto en Egiptio, sur kiu revelacio atingis Moseon.*

*(2) Antikva kutimo por montri sian respekton al granduloj, kiel reĝoj.*


*(3) Legenda birdo. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 4**

Sur monto sidis arabaj rabistaranoj kaj fermis la trairejon de la karavanoj. Iliaj minacoj la pasantajn urbanojn povis timigi kaj la sultana armeo ne povis ilin limigi, ĉar estis alta rifuĝejo montopinta kiun la rabistaro estis okupinta. Regnaj konsilistoj

rekomendis la neceson malaperigi ilin, ĉar se ili longe persistos, solvo por forpeli ilin ne plu ekzistos.

Arbo kiu nun estas juna,  
eĉ de vir' ne estas imuna,  
Sed post la pasado de jaroj  
ĝi ne eltireblos per ĉaroj,  
Fosil' povas esti fontoŝtopant',  
Nil' ne paseblas per elefant'.



Finfine estis decidite iujn sendi kaj oportunan okazon atendi, ĝis okazos rabistara atako al grupo kaj la rifuĝejo restos vaka por reĝa trupo. Kelkaj bravaj kaj spertaj batalantoj estis sendataj embuski sur la monto. Vespere revenis la rabistoj, malfortaj kaj predportaj. Ili la armilojn kaj predojn al angulo ĵetis kaj la vestojn demetis. La unua atakinto al ili estis dormo. Kiam pasis okono de l' nokto:

Sub la nigron la suno kuŝiĝis,  
En fiŝbuŝon Jona (1) enbuŝiĝis.

La bravuloj sin malkaŝis kaj la manojn de la rabistoj kunligis kaj matene ilin al la kortego alvenigis. La reĝo ordonis ĉiujn ekzekuti.

Hazarde estis junulo inter ili kies frukto de la junaĝo ĵus maturiĝis kaj kies herboj de la vizaĝ-herbejo ĵus kulturiĝis. Unu el la ministroj kisis la tronpiedon de la reĝo kaj metis la propet-vizaĝon sur la teron kaj diris: “Tiu knabo ankoraŭ ne manĝis frukton el la vivĝardeno kaj ne ricevis profiton de la junaĝo. La antaŭvido el viaj moŝtaj pardonemo kaj bonkonduito estas tia, ke pardonante lin vi favoru min.” Tiu eldiro ne plaĉis al la reĝo kaj koleretante li diris:

“Noblulajn radiojn ne ensorbas fipopolo,  
Eduki ilin similas al pilk’ sur kupolo.”

Ilian figeneracion sentestikigi kaj ilian genton elradikigi estas pli inde ĉar fajron estingi kaj fajron preterlasi kaj vipuron mortigi kaj vipuridon preterpasi ne estas agoj de saĝuloj.

Eĉ se pluvos vivoakvo el nubo,  
De salik’ vi ne ricevas vinberon.  
Ne vivu kune kun malnoblaj homoj!  
De bambu’ vi ne ricevas sukeron.

La ministro aŭdis tion. Li vole nevole akceptis kaj laŭdis la taŭgecon de la reĝa opinio kaj diris: “Tio, kion via moŝto, daŭru via reĝeco, diras estas ja vera ĉar se li edukiĝus vivante inter fiuloj li ricevus ilian naturon kaj iĝus unu el ili, sed mi esperas, ke komunikante kun nobluloj li bone edukiĝos kaj ricevos la naturon de saĝuloj, ĉar li estas ankoraŭ juna kaj la kondutoj de kverelo kaj malobeco ne radikis en lia menso kaj estas dirite ke: “Ĉiu ido naskiĝas laŭ unu sama esenco kaj la gepatroj igas lin judo, kristano aŭ zoroastrano.”

Kun fiuloj amikiĝis Lot-edzin’, (2)  
Ŝia profeta aparten’ perdiĝis.  
Mallonge la hundo de kavkompanoj (3)  
Estis kun bonuloj kaj konvertiĝis.”

La ministro diris tiel kaj kelkaj proksimuloj de la reĝo kuniĝis kun li, ĝis nuligis lian ekzekuton la reĝo, dirante: “Kvankam mi akceptis pardonon, tamen mi ne kredas pardono-bonon!”

Pri malamiko diris Zal al Rostam: (4)

“Konsideru lin malforta neniam,  
Fonteta akvo ankoraŭ malfortas,  
Sed Nilo forportas kamelon ĉiam.”

Ĉiaokaze oni prizorgis la junulon kun kareso kaj komforto kaj metis edukistojn por eduki lin, ĝis li lernis bone paroli kaj dece sin regi kaj lerte konduki ĉe la reĝo kaj li ŝajnis meritoplena al ĉiuj. Foje la ministro parolis iomete pri liaj ecoj ĉe la reĝo, ke la edukado efikis sur li kaj la malnovan malsaĝon forpelis de lia naturo. La reĝo ridetis kaj diris:

“Lupid’ fine iĝas lupo,  
Eĉ kreskinte kun homgrupo.”

Preskaŭ du jaroj pasis. Aro da lokaj huliganoj aliĝis al la junulo kaj faris ĵuron. En oportuna okazo li mortigis la ministron kaj liajn du filojn kaj ŝtelis senmezuran riĉon kaj en rabistara kavo anstataŭis sian propran patron kaj fariĝis ribelanto. La reĝo miris kaj diris:

“El feraĉo bona glavo ne fareblas,  
el fihomo eduk’ ne faras sinjoron.  
Pluvo, kies util’ ne argumenteblas,  
Faras en dezert’ vepron, en ĝarden’ floron.

Sur sala tero ne kreskas hiacint’,  
Ne verŝu sur ĝin semon kaj laboron!  
Favori maliculon similas al  
Malfavori meritplenan sinjoron.”

*(1) Jona kiu pasigis tempon en la ventro de fiŝego. Vidu la vortareton.*

*(2) Loto estis profeto sendita al Sodomo por averti ties anojn pri iliaj malvirtoj (sodomio) sed ili ne akceptis kaj Dio detruis*

*la urbon. La edzino de Loto ne akompanis sian edzon kaj mortis dum detruo.*

*(3) Mallonge, ili estis sep kredantaj kristanoj kun unu hundo, kiuj fuĝis al kavo pro la krueloj de la siatempa reĝo kaj tie dormis dum jarcentoj. Post vekiĝo, ili iris al la urbo kaj trovis multajn ŝanĝojn, kiujn ili ne povis elteni. Do ili revenis al la kavo kaj tie mortis. Vidu la vortareton!*

*(4) Zal kaj Rostam – patro kaj filo – estas inter la ĉefegaj herojoj en la plej fama persa poemplibro epopea Ŝahname, la majstroverko de Ferdouŝio (940–1020 p.K.).*

## **Rakonto 5**

En la palaco de Oglomeŝ (1) mi renkontis kolonelidon, kiu havis saĝon, inteligenton, sagacon kaj talenton senmezurajn. Jam de junaĝo la signoj de grandeco evidentis sur lia frunto.

Pro saĝ', super lia ĉapelo  
lume brilis nobleca stelo.

Ĉiaokaze li plaĉis al la reĝo ĉar li havis belon eksteran kaj karakteran, kaj kiel la saĝuloj diris: "Riĉeco estas pro arto, sed ne pro havaĵo, kaj matureco estas pro saĝo sed ne pro jaro. Liaj kolegoj enviis al li lian rangon kaj akuzis lin al perfido kaj vane penis verŝi lian sangon. Kiel malamiko batkapablas kiam amiko afablas? La reĝo demandis: "Kial ili malamikas kontraŭ vi?" Li diris: "Sub la reĝa moŝta ombro; daŭru lia reĝeco; mi kontentigis ĉiujn krom la ĵaluzulon, kiu ne kontentiĝas krom per falo de mia pozicio, kaj daŭru reĝeco kaj feliĉo de la reĝo."

Eblas por mi ĝeni neniun krom  
ĵaluzulon ĉar li estas memĝena.  
Ho ĵaluzul'! Mortu, ĉar nur tiel  
via korp' iĝas je turment' sena.



Malfeliĉaj homoj sopiras, ke  
onia feliĉ' estu malŝvela.  
Se vampir' ne povas vidi tage,  
ĉu la sunbrilo estas malbela?  
Pli indas, ke mil tiaj okuloj  
estu blindaj ol la sun' malhela.

(1) *Nomo de reĝo.*

## **Rakonto 6**

Oni rakontis pri persa reĝo, kies uzurpmano etendiĝis sur la posedaĵojn de ĉiu regnanto kaj li fariĝis kruela tirano. Rezulte lia popolo disiris tra la mondo pro lia kruelemo kaj formigris al foraj landoj pro lia premo. Ĉar la loĝantaro malgrandiĝis, la impostoj malpliĝis kaj la regna trezorejo malpleniĝis kaj malamikoj minacis.

Oni devas ja helpi dum komforto,  
se li helpanton dum problem' deziras.  
Neniu sklavo sen zorgo ja restas,  
Bonfaru, alie eĉ sklav' foriras.

Iam al li oni legis la libron Ŝahname (1), pri la falo de la Zahaka reĝado kaj la epoko de Ferejduno (2). La veziro demandis la reĝon: "Ĉu vi scias kiel Ferejduno sen trezoro, bieno, kaj servistaro povis ekregi la landon?" "La reĝo respondis: "Kiel aŭdite, sekvantaro kolektiĝis ĉirkaŭ li apogeme, kaj subtenis lin ĝis li fariĝis reĝo. "La veziro diris: "Ho reĝo! Se el popolkolektiĝo rezultas regado, kial vi malkolektas la popolon? Ĉu vi ne deziras reĝi?"

Por armeo indas klopodegi,  
Ĉar per ĝi Sultan' povas regi.

La reĝo diris: "Kio estas la kialo por kolektiĝo de la armeo kaj sekvantaro?" Li diris: "La reĝo estu donema por ke oni kolek-

tiĝu ĉirkaŭ li, kaj estu pardonema por ke oni sentu sekurecon sub lia reĝado, kaj vi senas je ambaŭ!”

Reĝo falas farante uzurpegojn,  
Lupo ne povas gardi ŝafogregojn.  
Reĝo, kiu komencas uzurpfazon,  
Subfosas sian regomuran bazon.

La diraĵoj de la admonema veziro ne plaĉis al la kontraŭkredanta reĝo. Li grimacis malkontente kaj malliberigis lin. Baldaŭ la reĝaj kuzoj ekribelis kaj postulis sian patran regnon. Grupo da viktimoj de liaj kruelaĵoj kolektiĝis ĉirkaŭ la kuzoj kaj subtenis ilin, ĝis ili konkeris la regnon kaj eksigis la reĝon.

Dumbezona amiko iĝos malamiko  
de Sultano uzurpa al sia popolo.  
Pacu kun popol’ kaj imunu de malamik’!  
Por justa reĝ’, popolo estas patrolo.

*(1) Plej fama epopea poemlibro persa, ĉefverko de Ferdoŭsi (940–1020 p.K.) . Vidu la vortareton!*

*(2) Zahak estis fabela kruelega persa reĝo, sur kies ŝultroj estis du serpentoj manĝantaj ĉiutage la cerbon de du junuloj kiel sian manĝaĵon. Ferejdun ribelis kontraŭ li kaj sukcesis malliberigi lin.*

## **Rakonto 7**

Reĝo kun nearaba sklavo ekvojaĝis en ŝipeto; la sklavo maron ne vidis kaj en la ŝipo ankoraŭ ne sidis. Li komencis ĝemi, plori kaj tutkorpe tremi. Oni multe klopodis konsoli lin, sed li ne trankviliĝis kaj kaŭzis malkomforton por la reĝo. Oni ne trovis rimedon. Saĝulo estis en la ŝipeto kaj diris al la reĝo: “Se vi ordonas, mi iel silentigos lin.” La reĝo diris: “Tio estos la ekstremo de via favoro kaj bonfaro.” La saĝulo ordonis ĵeti la sklavon en la maron. La sklavo subakviĝis kaj revenis supren kelkfoje. Oni prenis lian hararon kaj tiris lin sur la ŝipeton. Li firme prenis po-

ban trabon per ambaŭ manoj. Sur la ŝipeto, li eksidis en angulo kaj trankviliĝis. La reĝo miris kaj demandis: “Kio estis la saĝo malantaŭ tiu ago?” La saĝulo respondis: “Li nek spertis suferon de dronado nek sciis la sekuron de boato.” Tiu, kiu sentas doloron, ja scias sanvaloron.

Ho malsatul’! Panaĉo ne plaĉas al vi,  
Mia amatin’ estas laŭ vi malbela.  
Por inferan’ purgatori’ estas eden’,  
Sed por edenanoj ĝi estas infera.

Malsamas brakumanto de kunulin’,  
al tiu, kiu longe atendas ŝin.

### **Rakonto 8**

Iu demandis Hormozon (1): “Kiun kulpon vi vidis de la veziroj de via patro, pro kio vi malliberigis ilin?” Li respondis: “Mi ne vidis kulpon, sed mi notis, ke mia aŭtoritato ĉe iliaj koroj estas senmezura kaj al mia ĵurpromeso ili ne fidis komplete. Mi timis ilian eblan decidon mortigi min pro timo. Do, mi agis laŭ la admono de saĝuloj:

“Eĉ se vi povas venki cent bravulojn,  
De timant’ via, timu ho saĝulo!  
Serpento pikas ŝafistan piedon  
pro timo de vundiĝ’, ne pro stimulo.  
Kato en senespera situaci’  
ungeltiras leopardan okulon.”

*(1) Sasanida Persa ŝaho (mortis en 273 p.K.) de la sasanida dinastio (224–651 p.K.).*

### **Rakonto 9**

Araba maljuna reĝo estis malsana kaj ne esperis longe vivi. Kuriero envenis tra la pordo kaj heroldis: Ni konkeris fortikaĵon

kaj la malamikoj malliberiĝis kaj iliaj armeo kaj popolo ĉiuj cedis. La reĝo forte suspiris kaj diris: “Tio estas bona novaĵo ne por mi sed por miaj malamikoj, kiuj estas la heredontoj de la regno.”

Pro tiu espero pasis la vivo:  
Tiu en la kor’ venu tra koridor’.  
Granda esper’ realiĝis sed vane,  
ĉar ne revenos la viv’, vera trezor’.

Forpasotamburon frapis la sorto,  
La kapon adiaŭu okuloj miaj!  
Ho manplato, brako kaj antaŭbrako,  
diru adiaŭ unu al l’ aliaj!  
Mizeran min, plaĉan al malamiko,  
vizitu, kamaradoj simpatiaj!  
Mia vivo pasis ja en nescio,  
Mi estis tia, vi ne estu tiaj!

## **Rakonto 10**

En la maŭzoleo de Johano la baptisto, saluton al li, mi estis en la urbo Damasko, kiam araba reĝo fifama je maljusteco hazarde venis pilgrimi kaj preĝis kaj petis de Dio:

“Derviŝ’ kaj riĉul’ ĉe Dio samkondiĉas,  
Por pliriĉuloj ĉio pli malsufiĉas.”

Poste li diris al mi: “Laŭ derviŝa modesteco kaj honesteco dediĉu maksimumon al mi ĉar mi timas de grava malamiko.” Mi diris: “Al malforta subulo faru favoron por ke forta malamiko ne kaŭzu doloron.”

Se vi havas fortajn brakojn kaj manojn  
eraras rompo de malfortulbrako.  
Ĉu rigidul’ al subuloj ne timas  
ne trovi helpanton per tia ago?

Semi malbonon kaj atendi bonon  
estas vana penso kaj nur imago.  
Ŝtopilon eloreligu kaj justu,  
Alie, iam estos justotago.

Adamidoj estas ja korpoorganoj  
kiuj laŭkree estas samesencanoj.  
Kiam organon dolorigas la sorto  
restas por aliaj neniuj komforto.  
Se alihoma sufero vin ne ĝenas,  
Por vi, la nomo “homo” ja ne konvenas.



## **Rakonto 11**

En Bagdado aperis derviŝo preĝo-respondata (1). Oni informis Haĝaĝ-Jusefon (2). Li alvokis lin kaj diris: “Preĝu al Dio por mi!” Li diris: “Ho Dio! Forprenu lian vivon!” Li diris: “Kia preĝo de Dio estas tio?” Li diris: “Tiu estas bona preĝo kaj por vi kaj por ĉiuj islamanoj.”

Ho vi, de kiu subuloj suferas,  
Kiom longe tiu bazar' prosperas?  
Vi ne taŭgas por guberni-regrolo,  
Mortu, ne estu ĝena al popolo.

*(1) Tia, ke Dio pozitive respondas al liaj preĝoj.*

*(2) Haĝaĝ ebne Jusof Sagafi (661–714 p.K.), kruela guberniestro de Irako kaj Heĝazo dum la Umajada dinastio (661–750 p.K.).*

## **Rakonto 12**

Uzurpanta reĝo demandis piulon: “Inter preĝoj kiu valoras pleje?” Li diris: “Por vi siesto, tial ke dume vi ne ĝenu la popolon portempe.”

Mi vidis tiranon tage dorman  
kaj diris: “Bonas lia neaktivo.”  
Se ies dorm' pli bonas ol vekiĝ',  
ties morto pli bonas ol vivo.

## **Rakonto 13**

Mi aŭdis pri reĝo, kiu pasigis nokton por plezurigi sin ĝis la tago kaj ebrifine diris:

“Nuno por ni pli ol ĉiam ravas,  
Nek bon' nek malbon' nek iu gravas.”

Derviŝo ekstere dormanta en malvarmo diris:

“Ho vi! La mond' feliĉan kiel vi ne havas,  
Se por vi ne gravas, same por mi ne gravas.”

Tio plaĉis al la reĝo. Monujon kun mil dinaroj li eligis tra truo kaj diris al la derviŝo: “Etendu vian jupon!” Li diris: “Jupo malestas ĉar mi senvestas!” La reĝo kompatis eĉ pli pro lia povreco kaj aldonis robon kaj sendis ĉion al li. La derviŝo post mallonge elĉerpis ĉiujn monon kaj varon kaj revenis.

Ĉe liberuloj longe ne restas oro,  
nek akv' en kribril', nek atend' en amkoro.

En nekonvena situacio, oni informis la reĝon pri lia stato. La reĝo ekkoleris kaj deturnis sian vizaĝon. Pri tio, la sagaculoj kaj saĝuloj diris, ke oni evitu koleron kaj furiozon de la reĝoj ĉar la plejmulto de ilia atento koncentriĝas pri la landaj administraj aferoj kaj ili ne toleras la tumulton de l' popolo.

Reĝo al tiu homo ne favoras,  
kiu tempokonvenecon ignoras.  
Se por parol' vi ne trovis okazon,  
Ne malestimu vin dirante frazon!

Li diris: “Forpelu tiun senhontan elspezeman almozulon kiu pereigis tian favoron dum tiu mallonga tempo, ĉar la landa trezoro estas buŝpleno por manĝaĵsenigatoj kaj ne ĉasaĵo por Satan-fratoj.”

Stulta taga brulant' de kamfor-kandel'  
baldaŭ nokte ne havos lampoleon. (1)

Unu el la konsilantaj veziroj diris: “Via reĝa moŝto! Estas konsilinde difini sufiĉan vivtenon donatan regule por ke ili ne malmoderu. Sed, tio kion vi diris pri ĉagreno kaj malpermeso, ne estas deca por Dikredantoj; esperigi iun per favoro kaj senesperigi tiun per forpelo.”

Pardon al avidul' ne malfermu!  
Malferminte ĝin ne batfermu!

Neniam la Heĝaz-soifantoj (2)  
kolektiĝas ĉirkaŭ akvo sala.  
Sed popolo, birdo kaj formiko  
kolektiĝas ĉirkaŭ akvo mala.

*(1) Kamfor-kandelo estas kandelo al kiu oni aldonis kamforon por bone odori. Antikvaj lampoj donis lumon per brulo de oleo.*

*(2) Parto de Saŭd-Arabio. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 14**

Unu el la estintaj reĝoj ne estis zorgema pri landprotektado kaj kaŭzis problemon por la armeanoj. Pro tio, ĉiuj rezignis kiam forta malamiko ekaperis.

Sen emo doni al soldato pagon,  
tiu ne emos uzi sian sagon.

Unu el la perfiduloj havis amikecan rilaton kun mi. Mi riproĉis lin kaj diris: “Kiu pro perturbeto forlasas sian maljunan sinjoron kaj ignoras lian multjaran favoron, tiu estas fia, sendanka, senkonscia kaj nedankema.” Li respondis: “Se vi pardonante permesas al mi ekparoli: tiu decas. Ĉar dum tiu evento la furaĝujo de mia ĉevalo malpleniĝis kaj ĝia selo lupreniĝis; kaj por sultano kiu avaras oron al sia armeano, oni ne povas malavari la vivon.”

Or-donu al soldat’ kaj poste ordonu!  
Li ien foriros se vi ne or-donas.

Kiam batalisto satas, li batalas brave,  
Kaj se lia ventr’ malplenas, li bravas fuĝante.

## **Rakonto 15**

Unu el la veziroj ekŝiĝis kaj fariĝis ano de derviŝaro. La efiko de iliaj benataj paroloj penetris lian koron kaj li akiris trankvilon. La reĝo denove afabliĝis al li kaj proponis postenon. Li ne akceptis kaj diris: “Por saĝuloj, senlaboro pli bonas ol angoro.”

Tiuj, kiuj sekurangulon elektis,  
Hunddenton kaj popolbuŝon fordirektis,  
Paperon disŝiris kaj plumon difektis,  
Kaj de kalumniantbuŝoj sin protektis. (1)

La reĝo diris: “Ja bezonatas sufiĉe saĝa ministro por landa administro.” Li diris: “La signo de sufiĉa saĝo estas malakcepto de tiaj postenoj.”



Tio Homa-on (2) al birdoj superigas,  
ke ĝi ost-manĝas kaj bestojn ne suferigas.

Oni demandis karakalon: “Kial vi akompanas leonon?” Ĝi diris: “Por manĝi de ĝi restantan ĉasaĵon kaj sekuri de la malamikoj pro ĝia forto.” Oni diris al ĝi: “Kiam vi iris sub ĝia protekto kaj konfesas ĝian favoron, kial vi ne proksimiĝas al ĝi por aniĝi al proksimuloj kaj konsideriĝi kiel intimuloj?” Ĝi diris: “Mi ankoraŭ ne sentas sekuron kontraŭ ĝia atako.”

Fajro, kiun mago longe adoras,  
dum lia falo en ĝi, lin brulvoras.

Por servisto de reĝo okazas ek trovi oron aŭ ek perdi la kapon kaj la saĝuloj diris: “Evitu la kapricon de la reĝoj, kiuj iam pro saluto ĉagrene grimacas kaj iam pro insulto vestaĵon donacas, kaj oni diris, ke amuzado estas la bufona ravo kaj sciencula malhavo.”

Konservu dignon evitante akuzon,  
Lasu al bufono ludon kaj amuzon.

*(1) Tio signifas, ke homoj, kiuj forlasis postenon, restos komfortaj kaj ne ĝenataj de la paroloj, onidiroj kaj skriboj pri ili.*

*(2) Legenda birdo. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 16**

Unu el la amikoj plendis ĉe mi pri la maldececo de la tempo: “Mi havas malgrandan enspezon kaj grandan familion kaj ne povas elteni la ŝarĝon de elspezoj kaj multfoje venis en mian koron la ideo migri al alia lando, kie neniu sciis pri miaj bono kaj malbono, kiel ajn mi vivos.

Multaj dormis malsate kaj neniu esploris,  
Multaj suferis ĝismorte kaj neniu ploris.

Mi timas ankaŭ de la riproĉo de la malamikoj, kiuj make ridos dum mia foresto kaj mian strebon por la familio atribuos al malhomameco kaj diros:

Ne rigardu al tiu senhonorul',  
kiu neniam vidos bonan sorton!  
Ĉar mizeriginte la familion,  
por si mem li elektis la komforton.

Kaj evidente mi scias iom pri la scienco de kontado kaj se helpe de via bonega reputacio, vi povos montri direkton al mi tiel ke mia menso malstreĉiĝu, mi ne kapablos dum mia restanta vivo danki vin sufiĉe." Mi diris: "Ho frato! Servi al la ŝaho havas du flankojn: espero kaj timo; espero pri panero kaj timo pri animo. Kaj tio estas kontraŭ sagaco de saĝuloj, por tiu espero akcepti tiun timon.

Imposton de bieno aŭ ĝardeno  
neniam de derviŝo iu petas.  
Kiu ne povas toleri angoron,  
tiu oron antaŭ korvon ne metas."

Li diris: "Tio ne konformas al mia situacio kaj ne respondas al mia demando. Ĉu vi ne aŭdis tion: Kiu perfidas, tiu trankvilon ne vidas?"

Di' de tiu kontentas, kiu honestas,  
Sur la rekta vojo, perdito ne estas.

Kaj saĝuloj diras: "Kvar personoj suferas profunde de kvar personoj: rabisto de sultano, ŝtelisto de policano, adultulo de denunciisto kaj putino de deadmonulo." Kaj kiu estas klarkonta, tiu ne timas de kontrol' onta.

Ne troigu en la kontado, ho frato!  
Tiel de imput' dum kontrol' vi eskapas.  
Vi estu pura kaj antaŭ ĉiu brava,  
Nur kotan robon kontraŭ ŝton' oni frapas."

Mi diris: “La rakonto pri tiu vulpo similas al via okazo, kiun oni vidis forkuranta, kaj ade falanta kaj restaranta. Iu diris al ĝi: “Kio estas la kialo de via timemo?” Ĝi diris: “Mi aŭdis, ke oni kaptas kamelon.” Mi diris: “Ho idioto! Vi kaj kamelo apenaŭ similas kaj tute malsamprofilas.” Ĝi diris: “Silentu! Ĉar se la ĵaluzuloj malice diros, ke mi estas kamelo kaj mi kaptiĝos, kiu strebos al mia liberigo por demandi pri mia farto?” Kaj ĝis alveno de kontraŭveneno el Irako, la serpentopikito mortos. Vi ja estas majesta, religia, honesta kaj pia, sed embuskas enviemuloj kaj sidas rivaloj en anguloj. Se ili skribos ion kontraŭan al viaj bonaj kondutoj kaj metas vin sub la reĝan enketon, ĉu oni permesos al vi defendi vin? Do mi rigardas tion pli dece, ke vi kontentecregnon gardu kaj pri estrado ne ardu.”

En la mar’, profitoj senmezuras,  
Sed nur sur ĝia bordo vi sekuras.”

Aŭdinte tiun parolon, la amiko koleris kaj grimacis kaj komencis fiparoli: “Kiaj estas tiuj saĝo, perfekte, sagaco kaj inteligento? Ĝuste estas la diro de la saĝuloj, ke amikoj ene de malliberejo estas utilaj ĉar ĉirkaŭ manĝotablo, amikoj kaj malamikoj ŝajnas similaj.”

Ne estas amik’ kiu dum via riĉec’  
pretendas pri amikeco kaj frateco.  
Estas amiko kiu helpas amikon  
dum lia malriĉeco kaj premateco.

Mi vidis, ke li aliiĝas kaj interpretas mian konsilon kiel mismotivon. Mi iris ĉe la financministro pro konateco inter ni kaj priparolis pri liaj biografio kaj meritoj, ĝis oni asignis lin al posteneto. Pasis iom da tempo kaj oni lian afablan konduton vidis kaj lian bonan direktadon fidis kaj promociis liajn rangon kaj postenon. Ade lia feliĉstelo leviĝis, ĝis li atingis la zeniton de siaj aspiroj, fariĝinte intimulo de la reĝa moŝto kaj lia konsultato kaj konfidato. Mi ĝojis pri lia bona situacio kaj diris:

Pro malfacila tasko ne angoru,  
Ĉar la vivakvfonto fluas en mallum’.

Ne plendu la frato pro mizeroj!  
Ĉar de Dio venas kaŝoferoj.

Ne sidu tiel triste pro ĉielturnoj,  
ke atend’ amaras sed dolĉfruktojn havas.

Tiam okazis vojaĝo kun grupo da amikoj al Mekko. Kiam mi revenis de la pilgrimado, li venis renkonti min du ripozejojn antaŭ la destino. Mi vidis lin kun mieno maltrankvila kaj vestaĵo derviŝo-simila. Mi diris: “Kiel vi fartas?” Li diris: “Kiel vi antaŭvidis, grupo ĵaluzis kontraŭ mi kaj kondamnis min pri perfido kaj la reĝo, daŭru lia reĝeco, ne persistis en la malkovrado de la vero kaj la amikoj afablaj kaj kolegoj kapablaj la malnovan intimecon forgesis kaj defendi ĉesis.

Ĉu vi ne vidis, ke antaŭ dignul’  
oni la manon metas sur la sin’.  
Kaj se la sorto lin maldignigas,  
oni la piedon metas sur lin.

Mallonge, mi suferis de ĉiaj persekutoj ĝis ĉi-semajno, kiam venis la novaĵo pri la enorda alveno de pilgrimintoj, pro kio li forigis de mi pezan ĉenon kaj alproprigis al si mian hereditan ĝardenon.” Mi diris: “Tiam vi ne akceptis mian konsilon, kiam mi diris, ke la servo de reĝo similas al marvojaĝo; danĝera kaj profitdona, aŭ vi prenos trezoron en la mano aŭ vi mortos pro talismano.”

Aŭ la trovitajn orojn oni metos sur marbordon,  
Aŭ onian kadavron l’ ondoj ĵetos sur marbordon.

Ne estis dece plie lin refuti kaj sur lian internan vundon salon ŝuti. Do mi mallongigis per jena diro:

“Sciu, ke vi vidos ĉenon sur la pied’,  
Se vi ne akceptos konsilon onian.  
Se vi ne eltenas pikon, venontfoje  
ne metu fingron en truon skorpion.”

## **Rakonto 17**

Kelkaj decaspektaj piuloj estis miaj kamaradoj. Pozitivopinia noblulo asignis vivtenon por ili, ĝis unu el ili plenumis ion malbonan kaj ne konforman al la derviŝa disciplino. Lia opinio iĝis negativa kaj la grupo nepagiva. Mi deziris iel reinstali la vivtenon por la kamaradoj. Mi ekiris ĉe la noblulon sed la gardisto ne permesis eniri kaj ofendis min. Mi pardonis lin ĉar la admonuloj diris:

La pordon de emir’, ministro aŭ reĝo,  
vi ne trapasas se peranto ne venas.  
Se hundo kaj gardisto trovas fremdulon,  
ili liajn robon kaj kolumon prenas.

Kiam korteganoj de lia moŝto eksciis pri mia alveno, ili respekte gvidis min kaj proponis altan sidejon. Sed mi humile ekŝidis sur malpli altan lokon kaj diris:

“Permesu al mi, la plej eta subulo,  
apud la servistoj sidi ĉe angulo!”

Li diris: “Ho Alaho! Ho Alaho! Kia eldiro estas tio?”

Se vi sidas sur mia kapo kaj okulo,  
mi toleros vin ĉar vi estas plaĉulo.”

Resume, mi ekŝidis kaj parolis pri ĉiuj temoj ĝis la afero pri la miskonduto de mia kamarado. Mi diris:

“Kiun pekon vidis la favorema moŝto  
pro kiu ilin kiel kulpulojn vi konas?  
Nur Dio meritas imponi kaj verdikti,  
Li kulpon vidas, tamen Li ja panon donas.”

Al la guberniestro multe plaĉis tiu eldiro kaj li ordonis reinstali la vivtenon laŭ la pasinta maniero kaj kompensi la ĉesperiodon ĝis la lasta monero. Mi dankis kaj kisis la servo-teron kaj pardonpetis pro la aŭdaco kaj elirante diris:

“Ekde kiam Kaabo iĝis la kiblo (1)  
multmejlje fora popol’ ĝin vizitas.  
Vi devas elteni homojn kiel mi,  
Al senfrukt-arb’ ŝton’ neniam ĵetitas.” (2)

*(1) Unue la islama kiblo (preĝdirekto) ne estis Kaabo. Vidu la vortareton!*

*(2) Oni ĵetas ŝtonon al fruktarbo por faligi fruktojn.*

## **Rakonto 18**

Reĝido heredis abundan trezoron de sia patro. Li donacemo-manon etendis kaj malavaro-mesaĝon dissendis kaj senreduktajn favorojn sur la armeanoj kaj civitanoj verŝis.

Aloaĝo ne plaĉas al la nazo,  
Sed surfajre ĝi ambrece odoras.  
Donacu se vi deziras esti granda,  
Se oni ne semas, ja nenio floras.

Malsagaca kortegano ekadmonis, ke la estintaj reĝoj malfacile kolektis tiun trezoron kaj deponis ĝin por gravaj celoj. “Ĉesigu tiun agon ĉar estas antaŭe okazontaĵoj kaj malantaŭe malamikoj! Vi ne restu senrimeda dum bezono!

Se trezoron vi disdonos al la popol’,  
ĉiu familio ricevos pulvoron.  
Kial vi ne prenas moneron de ĉiu?  
Tiele vi kolektos grandan trezoron.”

La reĝido ekkoleris kaj suferigis lin kaj diris: “Dio, la Plej-alta, faris min posedanto de tiu ĉi lando por manĝi kaj disdoni, ne faris min policisto por gardi.”

Koraĥ' mortis malgraŭ siaj trezordomoj,  
Nuŝiravan restis inter bonaj nomoj. (1, 2)

*(1) Koraĥo estis riĉega persono kiu ne obeis Dion kaj religion. Li mortis dum tertremo. Vidu la vortareton!*

*(2) Nuŝiravan estis antikva persa reĝo fama pro justeco. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 19**

Oni rakontis, ke por Nuŝiravan (1), la justa, ĉasaĵo estis rostita en ĉasejo, sed mankis salo. Servisto iris al vilaĝo por alporti salon. Nuŝiravan diris: “Aĉetu salon kontraŭ ĝia aktuala prezo, por ne estigi rutinon kaj ne fari el la vilaĝo ruinon!” Oni diris: “Kia problemo okazas de tiu kvanteto?” Li diris: “En la mondo, la bazo de uzurpo komence estis malgranda. Ĉiu veninto aldonis iom, ĝis ĝi atingis sian nunan kvantegon.”

Reĝaj lakeoj elradikigos pomarbon,  
se li manĝos pomon de ĝarden' vilaĝana.  
Se Sultano uzurpe prenas nur kvin ovojn,  
mil kokinojn rostos la armeo sultana.

*(1) Nuŝiravan estis antikva persa reĝo fama pro justeco. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 20**

Mi aŭdis pri neglektemulo detruanta loĝejon civitanan por prosperigi trezorejon sultanen senscie pri la admono de saĝuloj, kiuj diris: “Ĉiu, kiu Dion, la Plejgloran kaj Plejvaloran, ĉagrenas por preni ies koron, Dio la Plejsupera, pere de sama homo sendas al li doloron.

Fajreg' al rutsemo ne faras tiel,  
kiel faras kortuŝita kandel'. (1)

Onidire la plej supra besto estas leono kaj la plej malsupra estas azeno kaj laŭ ĉies konsento, azeno, kiu ŝarĝon portas, pli bonas ol leono per kiu homo mortas.

Kvankam ja sensaĝa estas azen’  
kompatindas pro sia ŝarĝelten’.  
Bovoj kaj azenoj ŝarĝoprenaj  
pli bonas ol homoj popolĝenaj.

Ni revenu al la rakonto pri la neglektema veziro! La reĝo dokumente informiĝis pri liaj fikondutoj. Li torturis lin kaj suferigis per diversaj rimedoj ĝismorte.

Ne rezultas la Dia kontento  
sen kontento de Lia popolo.  
Se vi deziras Dian pardonon,  
ja bonfaru al Dia popolo.

Oni rakontis, ke priuzurpito preterpasis lin kaj pripensis pri lia malbona sorto kaj diris:

“Neniu fortulo pro posteno  
priuzurpu la homojn kun implik’!  
Oni povas engluti ostegon  
sed ventro ŝiriĝas ĉe umbilik’.”

Ne restas priuzurpint’ fisorta,  
Sed restas al li malben’ senmorta.

*(1) Ruto estas arbusto kies sekigitan semon oni metas sur la fajro pro diversaj kialoj. La veoj de kortuŝita mizerulo estas kiel kandelo. Tamen, ĝiaj efikoj sur kruelulo estas pli ol la efikoj de fajrego sur rutsemo.*

## **Rakonto 21**

Estas rakontite pri militisto malica, kiu ĵetis ŝtonon sur la kapon de pia derviŝo. La derviŝo pensis, ke la okazo ne taŭgas por venĝo, do li tenis la ŝtonon ĉe si ĝis la reĝo furiozis kontraŭ la



militisto kaj kaptigis lin en puto. La derviŝo irinte ĉe la puto ĵetis la ŝtonon sur la kapon de la militisto. La militisto demandis: “Kiu vi estas kaj kial vi faris tiel?” La derviŝo respondis: “Mi estas tiu persono kaj la ŝtono estas la sama kiun vi ĵetis sur mian kapon en tiu dato.” La militisto demandis: “Dume kie vi estis?” La derviŝo respondis: “Mi timis de via persekuto, sed nun la okazon mi trovis oportuna, kiam vi estas en puto.”

Saĝul' cedis al ĉi cirkonstancoj:  
Sentaŭgulo kun multe da ŝancoj.  
Se al vi mankas akregaj ungoj  
malmulte batalu kontraŭ mungoj.  
Kiu kun fortbrakuloj kverelas  
lia brako pro rompiĝo ŝvelas.  
Hezitu ĝis kaptos lin la destin',  
Do je l' san' de amikoj batu lin.

## **Rakonto 22**

Reĝo malsanis pro serioza malsano kies nomo ne menciindas. Greka kuracistaro unuanime kredis, ke krom galveziko de homo kun specifaj karakterizaĵoj, ne ekzistas kuracilo kontraŭ tiu malsano. La reĝo ordonis priserĉi tian personon. Oni trovis junan kamparanidon kun la karakterizaĵoj postulitaj de la kuracistaro. Li alvokis liajn gepatrojn kaj kontentigis ilin per abundaj donacoj kaj la juĝisto verdiktis, ke sangelverŝo de unu civitano por reĝa saniĝo estas prava. La ekzekutisto preparis sin. La knabo ekrigardis la ĉielon kaj ridetis. La reĝo demandis: “En tia situacio kial vi ridetas?” Li diris: “Kareso de gefiloj estas la tasko de gepatroj kaj oni portas la aferon ĉe la juĝisto kaj postulas juston de la reĝo. Nun, kiam por iom da mono miaj gepatroj vendas mian sangon, la juĝisto verdiktas mian mortigon kaj la sultano serĉas sian profiton en mia pereco, mi ne havas rifuĝejon krom Dio, la Plejvalora kaj Plejglora.

Ĉe kiu pro via maljust' mi kriui?  
Kiu donas juston, vi estas tiu!

Kaŭzante larmon en la sultanaj okuloj, tiu eldiro maltrankviligis lin. Li diris: “Mia pereco preferindas al sangelverŝo de senkulpulo.” La sultano kisis liajn kapon kaj okulojn, brakumis lin, donacis senmezurajn donacojn al li kaj liberigis lin. Kaj oni rakontis, ke dum la sama semajno la reĝo tute resaniĝis.

Mi ade pensas pri la bela vers’,  
Elefantist’ estis la diranto:  
Se vi komprenus formikon sub vi,  
Similan al vi sub elefanto.

### **Rakonto 23**

Unu el la sklavoĵoj de Amro Lejs (1) forfuĝis. Oni postiris kaj kunportis lin. La veziro malŝatis lin, do li ordonis mortigi la sklavon por ke la aliaj sklavoĵoj ne imitu lin estontece. La sklavoj antaŭ Amro metis la kapon sur la teron kaj diris:

“Ĉiu evento laŭ via deziro pravas.  
Kial sklavo protestu? Reĝa ordon’ gravas.

Sed ĉar mi kreskis danke al favoroj de ĉi tiu gento, mi ne deziras vian puniĝon pro elverŝo de mia sango dum la releviĝa tago. Permesu al mi mortigi la veziron kaj poste ekzekutu min kiel puno por tiu krimo. Tiel vi mortigos min prave.” La reĝo ekridis kaj al la veziro diris: “Kiel vi opinias?” Li respondis: “Ho vi monda reĝo! Pro Dio, tiun senhontulon malliberigu kiel oferon al la tombo de via patro, antaŭ ol li faros malbonon al mi. La kulpo estas mia kaj la maksimumo de filozofoj prava, kiuj diris:

Se vi batalas kontraŭ ŝtonĵetant’,  
Vi riskas rompiĝon de la kapo.  
Se vi pafas sagon al malamik’,  
Ĉu kontraŭ liaj estos eskapo?”

*(1) Amro Lejs, la dua Safarida reĝo, fama pro nobleco (879–901 p.K.).*

## Rakonto 24

La reĝo de Zozano (1) havis ministron noblan kaj ĝentilan. Dum ĉies ĉeesto li servis ilin, kaj dum ĉies foresto li malbone ne priparolis. Hazarde ago lia ne plaĉis al la reĝo. La reĝo pune malliberigis lin. La regnaj oficistoj malkaŝis liajn bonajn anteceden-tojn kaj laŭdis liajn komplimentojn. Dum lia mallibereco, ili kon-dutis al li afable kaj amike kaj ne suferige kaj implike.

Se vi deziras pacon kun via malamik',  
admiru lin dum li malkaŝas vian fuŝon.  
Fiparolanton ĉagrenas malbona parol',  
Por eviti tion, dolĉigu vian buŝon.

Li repagis la plejmulton de sia ŝuldo al la reĝo kaj pro ceter-eto restis en la malliberejo. Oni rakontis, ke najbara reĝo sendis jenan mesaĝon por li: “La tiea reĝo ne komprenis la valoron de via nobla moŝto kaj ĉagrenis vin. Se via opinio, Dio rapidigu vian liberigon, turniĝos al nia flanko, ni strebos pleje al via kontentiĝo kaj okaze de via renkontiĝo la nobluloj de nia lando honoron sentos kaj vian respondon ni atendos.” La ministro ricevis la me-saĝon kaj timis de danĝero sed sagace skribis respondeton sur la dorso de la papero kaj resendis.

Unu el la korteganoj eksciis la aferon kaj informis la reĝon, ke la mallibera ministro korespondas kun aliregna reĝo. La reĝo maltrankviliĝis kaj ordonis enketi la aferon. Oni arestis la kuri-eron kaj legis la leteron. Li skribis: “La pozitiva opinio de la nobluloj estas pli ol mia merito kaj via invito ne akcepteblas por mi ĉar mi kreskadis per la favoroj de ĉi tiu gento kaj pro ŝanĝeto de la favorant-konduto ne decas perfidi, laŭ onia diro:

Kiu ja ĉiumomente al ni favoras,  
Tiun pardonu se foje li malfavoras.”

Lia ŝuldosento plaĉis al la reĝo. Li donacis luksveston kaj juvelkeston, kaj pardonpetis: “Mi malbone agis punante vin sen

kulpo aŭ eraro.” Li respondis: “Via moŝto! Mi ne vidas eraron ĉi-cirkonstance. Dia verdikto estis mia ricevo de malbono. Estis plej bone ricevi ĝin per vi, kiu havas historion de favoro kaj kialon por ŝuldo. La saĝuloj diris:

Ne malĝoju se popol’ al vi malbonas,  
ĉar ili nek triston nek komforton donas.  
Amik- aŭ malamik-ĝenoj estas Diaj,  
ĉar al Di’ apartenas koroj iliaj.  
Kvankam pafiĝas sago ja de pafarko,  
Arkist’ ĉefrolas, laŭ saĝula rimarko.”

*(1) Antikva urbo kaj regno en Ĥorasano, el kiu restis nur vilaĝo hodiaŭ.*

## **Rakonto 25**

Mi aŭdis pri araba reĝo diranta al siaj korteganoj: “Duobligu la salajron de tiu persono ĉar li estas intimulo de la kortego kaj atendanta ordonon, tamen la aliaj servistoj estas diboĉantaj aŭ ludantaj kaj ne zorgas pri la servoj.” Piulo aŭdis, kriis kaj suspiris. Demandite pri la kialo de tiuj agoj li respondis: “Tio similas al rilato inter la popolo kaj Dio, La Plejsupera.”

Se du matenojn iu ĉe reĝ’ pri serv’ fervoros,  
Dum la tria, la reĝo ion al li favoros.  
Supereco estas en akcepto de ordono,  
Malobeanto restos sen salajro kaj mono.  
Nur tiu, kiu kiel verdiruloj aspektas,  
pri ties utilo kaj help’ oni ne suspektas.

## **Rakonto 26**

Oni rakontas pri uzurpinto, kiu aĉetis ŝtipon de malriĉuloj malmultekoste kaj vendis al riĉuloj multekoste. Trapasanta admonulo diris:

“Ĉu vi estus strigo, malbenanta ĉie, kie vi sidas?  
Aŭ vi estus serpento, pikanta ĉiun, kiun vi vidas?”

Via fort’ superas la nian,  
sed ne la kaŝitscian Dian.  
Ne suferigu anojn de l’ ter’  
kaj akiru benon ilian!

La uzurpinto ĉagreniĝis pro lia eldiro kaj grimacis pro lia admono kaj ne atentis lin. Iam nokte la kuireja fajro etendiĝis al lia lignoprovizejo kaj ekbrulis ĉirkaŭaj konstruaĵoj kaj li kuŝis sur varma detruito anstataŭ ĉarma lito. Hazarde la sama admonulo retrapasis kaj vidis lin dirantan al kamaradoj: “Mi ne scias de kie venis tiu fajro en mian hejmon?” Li diris: “De la derviŝkoroj.”

Evitu doloron de l’ internaj vundoj!  
Ĉar iam la interna vund’ eksteriĝas.  
Laŭeble vi ne ĉagrenu ies koron,  
ĉar per suspiro la mondo inferiĝas.

Sur la krono de Kejĥosro (1) estis skribita tio ĉi:  
Dum multaj jaroj kaj longaj tempoj  
pasos sur mia tombo teranoj.  
Kiel de man’ mi ricevis regnon,  
ĝi transpasos al pluraj manoj.

*(1) Antikva persa reĝo.*

## **Rakonto 27**

Iu majstriĝis en luktarto. Li sciis tricent sesdek bonegajn teknikojn kaj ĉiutage praktikis unu el ili. Al li plaĉis la vizaĝo de trejnato. Li instruis tricent kvindek naŭ teknikojn al li krom unu, kies instruon li prokrastis. Fine la knabo perfektigis je forto kaj sporto kaj neniu kapablis rivali kun li. Li iris ĉe la tiama reĝo

kaj diris: “La supereco de la majstro estas pro liaj majstreco kaj instruoŝuldo. Alie mi ne malsuperas je forto kaj egalas al li je sporto.”

La reĝo trovis tiun eldiron malagrabla. Li ordonis, ke ili luktu. Oni preparis luktejon altan kaj kolektis ŝtatestrojn, korteganojn kaj luktĉampionojn. La knabo envenis kiel ebria elefanto, tiom detruanta, ke se estus metala monto, li eltirus ĝin el la loko. La majstro ekkomprenis, ke la knaba forto superas. Li uzis la neinstruitan teknikon luktokomence. La knabo ne sciis la kontraŭteknikon, do li maltrankviliĝis. La majstro per ambaŭ manoj levis lin ĝis sia kapo kaj frapis sur la teron. La popolo tumultis. La reĝo ordonis donaci kostumon kaj monsumon al la majstro kaj riproĉis la knabon pro la decido kontraŭ la majstro batali kaj fine skandali. La knabo respondis: “Ho vi monda reĝo! Li ne venkis min per forto. Sed de la luktarto mi lernis la tuton krom minuton kaj neniam li instruis ĝin al mi. Hodiaŭ danke al tiu minuto li venkis min.” La reĝo diris: “Pri ĉi tago diris sagaculoj:

“Ne fortigu la amikon tiom, kiom se li deziros malamiki, li povos.” Ĉu vi ne aŭdis la jenan, kiun diris perfidito de sia trejnito:

Aŭ fidel’ ne estis en la mond’,

Aŭ neniu ĝis nun uzis ĝin.

Kiuj lernis pafarton de mi

ĉiuj celumis min en la fin’.

## **Rakonto 28**

Derviŝo senzorga pri la mondo sidis en angulo kiam reĝo preterpasis lin. Laŭ la komforto de kontentemaj homoj li ne levis la kapon kaj ne atentis. Laŭ la egoismo de reĝeco, la reĝo ĉagreniĝis kaj diris: “Tiu derviŝoj similas al la bestoj, al ili mankas nobleco kaj humaneco.” La veziro proksimiĝis al la derviŝo kaj diris: “Ho vi pia! La monda sultano preterpasis vin. Kial vi forgesis ĝentilon kaj ne agis dece?” Li respondis: “Diru al la sultano, ke li postulu servon de tiu, kiu postulas favoron de

li, kaj aldonu, ke sultanoj estas por gardi civitanojn, ne civitanoj por obei sultanojn.”

La reĝ’ estas por gardi derviŝojn,  
Tamen li komfortigas la tuton.  
Ŝafo ne ekzistas pro la ŝafist’,  
Sed li estas por servi la bruton.

Hodiaŭ iun vi vidas ja feliĉa,  
kaj alian kortrafita pro sufero.  
Kelkajn tagojn oni bezonas  
ĝis revema cerbo fariĝas tero.  
Diferenc’ inter ŝaho kaj sklavo  
nuliĝas post animo-malapero.  
Kiam oni remalfermas la tombon,  
similas derviŝ’ kaj kanceliero.

La derviŝa eldiro ŝajnis prava al la reĝo. Li diris: “Petu ion de mi!” La derviŝo respondis: “Mi petas vin refoje ne ĝeni min!” La reĝo petis: “Donu admonon al mi!” Li respondis:

“Ĝuu nunon kiam vi havas honoron,  
ĉar iam iu forprenos tiun gloron.”

## **Rakonto 29**

Unu el la veziroj iris ĉe Zolnun (1) la egipta kaj petis helpon: “Mi tage kaj nokte servas la reĝon kaj esperas lian favoron kaj timas pro lia puno.” Zolnun ekploris kaj diris: “Se mi tiel preĝus al Dio, la Plejglora kaj Plejvalora, kiel vi preĝas al la reĝo, mi estus inter Liaj deculoj.”

Derviŝa pied’ estus sur ĉielo  
sen sufertimo kaj komfortdeziro.  
Kaj se vezir’ tiel timus de Dio,  
kiel de l’ reĝo, reĝus la veziro.

*(1) Piulo en Egiptio, komence de Islamo.*

## Rakonto 30

Reĝo ordonis ekzekuti senkulpulon. Li diris: “Ho la reĝo! Pro via kolero kontraŭ mi ne turmentu vin ĉar tiu puno efektiviĝos dum momento sed eterne restos kun vi ties turmento.”

La vivo ja kiel dezerta vent’ pasis.

Dolĉo, amaro, ĝojo kaj turment’ pasis.

La tirano pensis, ke ĉio finiĝis.

La pek’ restis al li kaj la moment’ pasis.

Efikis lia admono sur la reĝon kaj li indulgis lian sangon.

## Rakonto 31

La veziroj de Nuŝiravan (1) diskutis pri grava ŝtata afero kaj ĉiu el ili proponis ion malsaman. La reĝo ankaŭ esprimis proponon. Bozorgmehr (2) akceptis la reĝan proponon. La veziroj sekrete demandis lin: “Kian avantaĝon vi trovis en lia propono super tiuj de kelkaj saĝuloj?” Li respondis: “Ĉar la rezulto estas malklara kaj la proponefektiviĝo dependas de la sorto. Se la propono sukcesos, ĝi estos ĝusta; kaj se ĝi fiaskos, ĝi estos malĝusta. Do akceptinda estas la reĝa propono ĉar se tio fiaskos, pro alproĉo mi sekuros de riproĉo.

Opinii kontraŭ la reĝa opini’

similas al per sia sang’ manlavado.

Se dum tago li diras, ke nokte estas,

Oni diru: “Estas luno kaj Plejado.”

*(1) Persa reĝo fama je justeco. Vidu la vortareton!*

*(2) Ĉefministro de Nuŝiravano fama je saĝeco. Vidu la vortareton!*

## Rakonto 32

Ĉarlatano plektis la harojn ŝajnigante, ke li estus ŝijaisto kaj venis en la urbon kun Heĝaza (1) karavano ŝajnigante, ke li





revenus de Mekko kaj portis poemon al la reĝo ŝajnigante, ke li verkus ĝin. La reĝo multe favoris kaj honorigis lin ĝis kiam reĝa kortegano ĵus reveninta de mara vojaĝo malkaŝis, ke li vidis lin en Basra (2) dum Oferfesto (3). Do evidentiĝis, ke li ne estis pilgriminto. Alia persono malkovris: “Lia patro estis kristano en Malatia (4). Do kiel oni povas imagi, ke li estas ŝijaisto!” Kaj lian

poemon oni trovis en Anvari (5) poemlibro. La reĝo ordonis vipi kaj ekzili lin pro liaj multaj mensogoj. Li diris: “Ho la reĝo sur la tero! Mi diros alian eldiron al vi. Se tio estos malvera, mi meritos ĉiun punon vian.” La reĝo respondis: “Diru tion!” Li diris:

“Se fremdulo alportas jahurton al vi,  
Du trionoj estas akv’ kaj unu el lakt’.  
Se vi ja deziras veron, aŭskultu min,  
Mondvojaĝanta dir’ apenaŭ estas fakt’.”

La reĝo ekridis kaj diris: “Dum sia vivo, li diris nenion pli veran ol tio!” Poste li ordonis prepari tion, kion li deziras por ke li eliru ĝoje.

*(1) Provinco en Saŭdarabio en kiu Mekko situas. Vidu la vortareton!*

*(2) Suda iraka urbo.*

*(3) Granda islama festo, samtempa kun islama pilgrimo, haĝ.*

*(4) Orienta turka urbo.*

*(5) Persa poeto kaj sciencisto (?–1189 p.K.), antaŭulo de Sadio*

### **Rakonto 33**

Unu el la veziroj kondukis afable kaj peris helpon al subuloj. Hazarde la reĝo punis lin. Ĉiuj strebis al lia liberiĝo kaj la gardistoj klopodis malpliigi lian suferon kaj la nobluloj multe parolis pri liaj bonaj kondutoj ĝis la reĝo indulgis lin. Sagaculo eksciis tion kaj diris:

“Por ekposedi la korojn de l’ amikoj  
valoras eĉ vendo de l’ patra ĝardeno.  
Por boligi la kaldronon de l’ bonuloj  
bruligu ĉiujn meblojn en la bieno!  
Al fipensuloj ja neniam komplezu!  
Fermu hundbuŝon per viandspecimeno!”

## Rakonto 34

Unu el la filoj de Harun Alraŝid (1) venis furioze ĉe la patro kaj informis, ke kolonelido insultis lian patrinon. Harun alvokis korteganojn kaj demandis ilin: “Kiu puno decas por tiu ido?” Unu el ili rekomendis ekzekuton, alia langtranĉon, kaj aliaj forprenon de la havaĵoj aŭ ekzilon. Harun diris: “Ho mia filo! Nobleco kuŝas en indulgo. Se vi ne povas indulgi, vi ankaŭ insultu lian patrinon. Sed la venĝo ne pliiĝu ĉar tiel la malpravo estos niaflanka kaj la rivalo plendanta.”

Laŭ saĝulo, tiu ne estas viro,  
kiu batalas kontraŭ elefanto.  
Sed li estas tiu homo, kiu  
dum kolero ne iĝas insultanto.

*(1) Araba reĝo de abasida dinastio (763–809 p.K.). Vidu la vortareton!*

## Rakonto 35

Kun noblularo mi sidis en ŝipo. Boato apud ni dronis kaj du fratoj falis en turniĝantan akvon. Unu el la nobluloj diris al ŝipano: “Se vi savos ilin, mi donos al vi po kvindek dinarojn.” La ŝipano saltis en la maron kaj dum savo de unu, la alia mortis.

Mi diris: “Restis neniom da lia vivo. Pro tio vi prokrastis lian savon kaj hastis savi la alian.” La ŝipano ridis kaj diris: “Vi ja pravas sed mi preferis tiun ĉar kiam junaĝe mi perdiĝis en dezerto, li metis min sur kamelon sed de la alia mi ricevis vipadon.” Mi diris: “Vere diris Dio: **Kiu bonfaras, tiu faras tion por sia propra animo kaj kiu malbonfaras, tiu ankaŭ faras tion kontraŭ sia animo.** (1)”

Ja ne gratu ies internon  
ĉar abundas dronoj survoje.

Helpu al mizera derviŝo  
ĉar vi bezonos helpon foje.

*(1) La Nobla Korano, ĉapitro 41, verso 47.*

### **Rakonto 36**

El du fratoj, unu servis la sultanon kaj la alia perlaboris panon. La riĉa frato admonis la derviŝan: “Kial vi ne servas por liberiĝi de pena laboro?” Li respondis: “Kial vi ne laboras por liberiĝi de servo-malhonoro?” Kleruloj diris, ke manĝi sian panon kaj mal-komforti pli bonas ol surzone oran glavon de la servo porti?”

Per kalkita mano panon prepari  
pli bonas ol por l’ emir’ ion fari.

La valora vivo pasis por tio,  
kion mi portu kaj kion mi manĝu.  
Ho volupta ventr’, satiĝu per pano!  
Por ke la dorso serve ne kliniĝu.

### **Rakonto 37**

Iu informis Anuŝiravan-on (1) la justan kaj diris: “Ĉu vi aŭdis, ke laŭ volo de Dio, la plej valora kaj la plej glora, unu el viaj malamikoj jam ne vivas?” Li respondis: “Ĉu vi aŭdis tion, ke de tia sorto Li min ekskluzivas?”

Ne ĝoju se malamiko estas morta,  
ĉar nia vivo ankaŭ estas samsorta.

*(1) Irana reĝo fama pro justeco. Vidu la vortareton!*

### **Rakonto 38**

Aro da ŝtatuloj parolis pri afero al Kasraa (1) moŝto kaj ilia estro, Bozorgmehr (1), silentis. Ili demandis: “Kial vi ne kon-

tribuas al tiu diskuto?” Li respondis: “Ministroj similas al kuracistoj kaj kuracistoj ne preskribas medikamenton krom por malsanulo. Do kiam mi vidas, ke vi pravas, ne estas saĝe paroli pri tio.”

Se afero sen mi plenumiĝas,  
Mia preparolo ne estas inda,  
Sed mi kulpas okaze de silent’  
kiam apud put’ estas ul’ blinda.

(1) *Sasanida palaco proksime al Bagdado. Kasraa moŝto aludas al Nuŝiravano. Vidu la vortareton!*

(2) *Ĉefministro de Nuŝiravano. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 39**

Kiam Harun Al-Raŝid (1) konkeris Egiption, li diris: “Pro la kulpo de tiu ribelinto, kiu pretendis esti dio por ricevi egiptian regadon, mi dediĉas tiun landon al mia plej malbona sklavo.” Li havis nigrulon nomitan Ĥosejb, ekstreme stultan. Li faris lin la guberniestro de Egiptio kaj oni diras, ke lia inteligento estis tiom malalta, ke kiam egipta kultivistaro plendis pro malĝustatempa pluvo kaj pereo de kultivita kotonujo, li rekomendis kultivi lanon!

Se per scienco venus mono plia,  
neniu malriĉus pli ol senscia.  
Al idiotoj favoregas Dio  
tiel ke saĝulojn mirigas tio.

Riĉo kaj feliĉo ne akireblas per scio,  
nur per ĉiela aprobo kaj plu nenio.  
Tra la tera globo ja troveblas sufiĉaj  
idiotoj riĉaj kaj saĝuloj malriĉaj.  
Kemiisto spertas mizeron kaj doloron.  
En ruino, idioto trovas trezoron.

(1) *Araba Abasida reĝo. Vidu la vortareton!*

## Rakonto 40

Al reĝo oni dediĉis ĉinan sklavinon. Ebrie li deziris kuniĝi kun ŝi. La sklavino forpelis lin. La reĝo koleris kaj dediĉis ŝin al nigrulo kies supra lipo la nazotruojn trapasis kaj kies malsupra lipo la kolumon postlasis. Korpegulo pro kies vizito monstroj hororis kaj kies akselo pli ol terkarba gudro fetoris.

Ĝis l' eterno por li malbelon  
skribiĝis kaj por Jozef' belon.

Kiel diris humoristoj:

Homo kun tiom malbela aspekto  
pri kiu estas klarigo nenia,  
Kaj akselo, mi rifuĝas ĉe Alah',  
kiel kadavro sub suno julia.

Oni rakontis, ke la nigrulo tiam havis fortan libidon kaj seksan avidon. Lia eroto ne eltenis kaj la virgecon de la sklavino forprenis. Matene la reĝo serĉis la sklavinon kaj ne trovis. Oni rakontis la eventon. La reĝo koleris kaj ordonis interligi la nigrulon kaj sklavinon per dika ŝnuro kaj ĵeti de sur alta tegmento en fosaĵon. Bonkora veziro propetis kaj diris: “La mizera nigrulo senkulpas ĉar la aliaj sklavoj kaj servistoj atendas reĝan indulgon.” La reĝo diris: “Kio okazus se li prokrastus kuniĝon, kaj mi dediĉus al li pli ol la valoro de la sklavino.” La veziro respondis: “Ho reĝo! Ĉu vi ne aŭdis:

Soifant', kiu alvenas al fonto,  
ĉu angoras pri sovaĝ-elefanto?  
Malpia malsatul' ĉe manĝotablo,  
ĉu pri Ramadano estas pensanto?

Tiu humuro plaĉis al la reĝo kaj li diris: “Mi nun pardonis vian nigrulon. Kion mi faru pri la sklavino?” La veziro respondis: “Dediĉu ŝin al li ĉar duonmanĝito nur meritas tion.”

Neniam iĝu amiko de homo  
iranta al lokar' malaltvalora!  
Soifanto ne ŝatu puran akvon  
duontrinkitan per buŝo fetora!

## **Rakonto 41**

Oni demandis Aleksandron la grandan: “Kiel vi konkeris orientajn kaj okcidentajn landojn? Viaj antaŭaj reĝoj havis trezoron, vivdaŭron, regnon kaj armeon pliajn sed ili ne sukcesis tian konkeron.” Li respondis: “Per la helpo de Dio, La Plejvalora kaj Plejglora; ĉiun landon mi konkeris, tiean popolon mi ne turmentis kaj pri tieaj reĝoj nur bone mi komentis.”

Ne grandas laŭ saĝuloj landaj  
misparolanto pri homoj grandaj.

## Ĉapitro 2

### La Virtoj de Derviŝoj

#### Rakonto 1

Altrangulo demandis piulon: “Kia estas via opinio pri tiu preĝemulo; oni diras moke pri li multe.” Li respondis: “Mi ne vidis sur lia ekstero aĉaĵon kaj mi ne scias el lia interno kaŝaĵon.

Ĉiun, kiu vestis sin piule,  
konsideru pia sen malico!  
Kaj se la internon vi ne scias:  
Pri lia hejm’ ne sciu polico!

#### Rakonto 2

Mi vidis derviŝon metantan sian kapon sur la domon Kaabo (1) kaj dirantan: “Ho Vi Benanta, Vi Pardonema! Vi scias, ke la ignorema stultulo povas fari nenion.”

Mi venis pro servomalkapablo,  
Mi konfesas pri tiu difekto.  
Pekintoj pentas pro siaj pekoj,  
Preĝantoj hontas pro neperfekto.

Preĝantoj deziras komplezon de sia preĝaro kaj komercistoj prezon de sia varo. Mi venis por esperi, ne por preĝi; kaj por almozpeti, ne por komerci. Kondutu al mi afable laŭ via nobleco!”

Petanton mi vidis dirantan  
Kaj ĝoje plorantan en Mekko:  
“Mi ne petas akcepti preĝojn,  
Forstreku ja sur ĉiu peko!”

*(1) La plej sankta loko de islamo. Vidu la vortareton!*



### **Rakonto 3**

Abdolgader-on la gilananon (1), Dio benu lin, oni vidis ĉirkaŭ Kaabo, rigardantan la sablojn kaj dirantan: “Ho Dio! Pardonu! Kaj se mi meritas punon dum la releviĝa tago, relevu min blinda por ne honti ĉe bonfaruloj.”

Matene kun petega vizaĝ’,  
Mi diras, kiam vent’ sonoras,  
“Ho Vi! Neniam forgesebla!  
Ĉu Vi min iam rememoras?”

*(1) Granda persa piulo. Gilano estas nord-irana provinco.*

### **Rakonto 4**

Ŝtelisto iris hejme de piulo. Li serĉis multe, tamen li trovis nenion ŝtelindan kaj malgajiĝis. Post ekscio, la piulo ĵetis antaŭ la ŝteliston la tapiŝeton sur kiu li estis dorminta, por mildigi la fiaskon.

Mi aŭdis, ke kredantoj je Dio  
koron de l’ malamiko ne rompas.  
Vi ne atingos tiun nivelon  
ĉar eĉ viajn amikojn vi trompas.

Bonkorula amikeco, ĉu dum ĉeesto ĉu dum foresto, estas tia, ke ili malantaŭ vi ne malkaŝas vian aferon kaj antaŭ vi ne proponas sinoferon.

Antaŭ vi kiel ŝafo ja naiva,  
Malantaŭ vi kiel lupoj aktiva.

Kiu diras ies difektojn en oreloj viaj,  
Tiu nepre diras viajn difektojn al aliaj

## Rakonto 5

Kelkaj piuloj estis en komuna vojaĝo, kun ĉies avantaĝo kaj malavantaĝo. Aliĝi al ili mi proponis sed ili oponis. Mi diris: “Al bona konduto de la nobluloj ne konformas abomeni mizerulan babilon kaj avari favoron kaj utilon. Mi kredas, ke en mi estas sufiĉe da energio kaj rapideco por akompani vin lerte kaj ne ĉagreni vin inerte.

Se mi ne povas rajde vin eskorti,  
Mi povas ĉevalkovrilon kunporti.”

Unu el ili ekdiris: “Ne malĝoju pro tiu eldiro, ĉar dum pasintaj tagoj, ŝtelisto vestita kiel derviŝo petis aliĝi al ni.

Oni ne scias pri kaŝaj’ en kamero,  
Oni ne scias pri skribaj’ en letero.

Kaj pro la naiveco de derviŝoj, ili ne pensis suspekto kaj akceptis lin respektive.

Aspekte Dalg’ (1) estas derviŝa ekstero,  
Kaj sufiĉas! Ene estas la cetero.  
Vestiĝu ĉiel ajn kaj faru bonagon!  
Metu sur l’ kapo kronon kaj portu flagon!  
En Gaĵakand (2) estu viro de milito!  
Armilon ne bezonas hermafrodito.

Tagon ni marŝis ĝis la vespero kaj nokte apud kastelo ni dormis, kiam la malbeata ŝtelisto uzis la okazon kaj forprenis ies vazon por ŝajne lavi la vizaĝon sed fakte por rabi la aĵon.

Rigardu al tiu Dalg-porta fals-derviŝo,  
farinta azenveston el Kaab-tapiŝo!

Kiam li foriris de la derviŝara vido, li iris al la kastelo por ŝtelo de juvelo. Kiam la suno ekbrilis, tiu malbrilulo jam foriris enorme kiam la senkulpulaj amikoj ankoraŭ ripozis dorme. Matene oni ĉiun portis al la kastelo, batis, kaj malliberigis. Tial ni



evitas popolon kaj adoptis izolon kaj la devizon: “Savo estas en soleco.”

Se el popolo iu agas malbone,  
Por la suba kaj supra estas domaĝo,  
Se malsaniĝos bovo en la paŝtejo,  
Malsaniĝos ĉiuj bovoj de l’ vilaĝo.”

Mi diris: “Dankon al Dio, La Plejvalora kaj Plejglora, tial ke mi ne seniĝis je derviŝa favoro, kvankam ŝajne mi soliĝis kaj ne sukcesis paroli kun ili. La rakonto estas utila ĉar tiuj spertoj ĉiam profitdonas al homoj kiel mi.

Ĝentiluloj, kiam ili kunvenas,  
eĉ unu malĝentilan ne eltenas.  
Ja malpurigas enfalinta hundo  
parfumplenan basenon dum sekundo (3).”

(1) *Derviŝa vestaĵo.*

(2) *Milita vestaĵo.*

(3) *Laŭ Islamo, hundo estas malpura besto.*

## **Rakonto 6**

Piulo estis gasto de reĝo. Dum manĝo li konsumis malpli ol kutime kaj dum preĝo li faris pli ol kutime por reliefigi siajn meritojn.

Mi timas ke vi ne atingos Kaabon, ho arab’!  
Ĉar la voj’ sur kiu vi paŝas, finiĝas en Turki’.

Kiam li alvenis hejme li petis ion por manĝi. Li havis kle-  
ran filon, kiu demandis: “Ho paĉjo, ĉu vi ne manĝis dum la reĝa  
festo?” Li respondis: “Mi ne manĝis ion utilan ĉe lia moŝto.” La  
filo diris: “Do la preĝon ankaŭ refaru ĉar vi ne faris ion utilan.”

Ho vi, kies malmeritoj subbrake estas,  
kaj kies meritojn oni manplate trovas,  
Ho vi fiera amiko, per pseŭdomono  
kion dum malfeliĉo vi aĉeti povas?

## **Rakonto 7**

Mi rememoras ke junaĝe mi estis preĝeme sendorma kun  
pieco enorma. Nokte kun la patro, Dio benu lin, ĝis malfrue mi

sidis kaj al kara Korano avidis, kiam ĉirkaŭe aro da dormantoj sonĝon vidis. Mi diris al la patro: “Neniu el ili ekstaras kaj almenaŭ preĝeton faras. Neglektdormo tiel ilin forportis, ke ili similas al tiuj kiuj mortis.” La patro respondis: “Patra karulo! Via dormo plibonus ol tia scivolo pri la popolo!”

Pro l’ supoz-kurteno antaŭ si  
ja nur vidas sin fanfaronul’.  
Li komprenos sian malforton  
nur per ekhav’ de akra okul’.

### **Rakonto 8**

En kunveno, oni laŭdegis grandulon kaj fanfaronis pri liaj belaj karakterizaĵoj. Li ekstaris kaj diris: “Nur mi scias kiom mi pias!”

Ho vi! Mia bonec’ estas via koncerto,  
Vi scias pri mia ekstero, ne interno.

Mi ŝajnas bela al l’ aliaj,  
Sed mi hontas pro mia fikred’.  
Ĉiuj admiras pavan voston,  
Sed ĝi hontas pro sia pied’!

### **Rakonto 9**

Libana piulo, kiu estis tre homama kaj grandfama tra la arabaj landoj, alvenis al la ĉefmoskeo de Damasko kaj komencis lavi sin ĉe la baseno antaŭ preĝo. Liaj piedoj ekglitis kaj li falis en la basenon. Li savis sin malfacile de tiu situacio. Post la preĝo, disĉiplo demandis lin: “Mi havas problemon. Mi demandos se vi permesos!” Li respondis: “Demandu tion!” Li diris: “Mi memoras, ke vi trapasis Mediteraneon kaj la piedoj eĉ ne malsekiĝis. Kial hodiaŭ en akvo profunda kiel homalto vi proksimiĝis al pereco?” Post longa profunda pensado la ŝejko respondis: “Ĉu vi ne aŭdis, ke Mohamedo, saluton al li, diris, ke ĉe Alaho por li

estis tempo, kiam la proksimaj anĝeloj kaj aliaj profetoj ne havis permeson veni. Sed li ne diris, ke tio longe daŭris. Dum tiuj tempoj pri Miĥaelo kaj Gabrielo (1) li ne okupiĝis kaj alitempe kun Hafse kaj Zejnab (2) grupiĝis. Vizito de la bonuloj estas inter kaŝo kaj malkaŝo. Foje tio okazas sen bariero kaj foje tio emas al malapero.

Vi nin vizitas kaj poste evitas,  
Vi nian emon al vi ja ekscitas.

Amatinon mi vidas senpere,  
do la vojon mi perdas malklere.”

*(1) Nomoj de anĝeloj.*

*(2) Edzinoj de Mohamedo.*



## Rakonto 10

Oni diris al Jakobo post perd' fila:  
“Ho vi saĝulo, maljuna sed brila!  
De Egipti' vi flaris la surtuton,  
Kial do vi ne esploris la puton?”  
Li diris: “Mi estas fulmosimila,  
Iam kaŝita, alitempe brila.  
Foje sur l' alta ĉielo mi sidas,  
Foje la pieddorson mi ne vidas.  
Se derviŝo ĉiam pensus pri Dio  
super l' du mondoj estus lia podio. (1)

*(1) Du mondoj: antaŭmorta kaj postmorta (alia) mondoj. Vidu la vortareton! Tio signifas ke se derviŝo ĉiam pensus pri Dio, li ricevus rangon pli valoran ol ĉiu alia sur la du mondoj.*

## Rakonto 11

Iam en la ĉefmoskeo de Baalbek (1) mi oratoris por homoj melankoliaj kaj senenergiaj. Ili ne transpasis de la materia mondo al la spirita. Mi komprenis, ke mia voĉo ne efikas kaj mia fajro malsekan lignon ne bruligas. Domaĝaj estas edukado de malinduloj kaj vendado de spegulo kvartale de blinduloj. Tamen, la pordo al klarigoj estis vasta kaj mi por fini la prelegon nehasta. Pri la signifo de tiu ĉi verso “**Ĉar ni estas pli proksimaj al li (homo) ol lia gorĝvejno (2)**” mi prelegis ĝis mi diris:

“L' Amiko pli proksima al mi ol mi,  
Mia problemo estas, ke mi foras.  
Kion mi faru? Al kiu mi diru?  
Li estas apud mi, kaj mi ignoras.”

Pro tiu eldiro-vino (3) mi iĝis ebria kaj tiu vinglaso ankoraŭ estis en la mano mia, kiam iu preterpasis la kunvenon kaj la lasta

vinguto efikis sur lin kaj li kriis laŭte. Tial la aliaj iĝis tumultaj kaj ekscititaj iĝis multaj. Mi diris: “Alaho estas Pura! Lertaj malproksimumoj ĉeestas kaj inertaj proksimumoj forestas.” (4)

Se aŭskultant’ ne komprenas eldiron,  
Kiel drastan prelegon oni faru?  
Por ke l’ oratoro frapu la pilkon,  
sportejon de l’ inklino vi preparu! (5)

(1) *Urbo en Libano.*

(2) *La Nobla Korano, ĉapitro 50, verso 17.*

(3) *Oni similigas la efikon de tiuj paroloj al tiu de la vino.*

(4) *Ĉeestantoj estas inertaj kaj pense malproksimaj sed preterpasanto estas lerta kaj pense proksima.*

(5) *Oratoro bezonas koran inklinton de la aŭskultantoj, same kiel sportisto kiu bezonas bonan sportejon.*

## **Rakonto 12**

Nokte en dezerto survoje al Kaabo, mi trolaciĝis pro maldormeco kaj metis la kapon sur la teron kaj diris al la kamelisto: “Lasu min!”

Kiom povas marŝi malfortulo,  
Kiam trolaciĝas kurdromedar’.  
Ĝis dikulo fariĝas sveltulo,  
Maldikulo mortas pro suferar’.

Li diris “Ho frato, antaŭe estas Kaabo kaj malantaŭe risiko de rabo. Se via marŝo kontinuos vi festos, sed se vi malfruos, nur via kadavro restos.”

En dezerto dormi sub arbusto agrablas,  
Sed la nokt’ longas kaj pluivivi ne probablas.

## **Rakonto 13**

Mi vidis sur marborda grundo, piulon suferantan de nekura-  
cebla pantervundo. Daŭre li suferis sed ĉiam dankis Dion, la plej



valoran kaj la plej gloran. Oni lin demandis: “Kial vi dankas?” Li respondis: “Tial, ke mi suferas de korpa lezo kaj ne de peko-pezo.”

Se tiu kara amik’ mortigos min  
ne pensu, ke pro l’ morto mi hororos,  
sed mi diros: “Pro kiu peko mia  
li ĉagreniĝis?”; tial mi angoros.

## **Rakonto 14**

Derviŝo ekbezonis monon. Li ŝtelis tapiŝeton el la hejmo de amiko. La juĝisto ordonis fortranĉi lian manon (1). La tapiŝetposedanto porpetis kaj diris: “Mi pardonis lin!” La juĝisto respondis: “Pro via pardono mi ne nuligas religian punon!” Li respondis: “Vi pravas! Sed kiu ŝtelas konsekritaĵon, ties mano ne fortranĉendas; kaj malriĉulo ekposedas nenion. Ĉion, kion derviŝoj havas, estas konsekritaj por bezonantoj.”

La juĝisto konvinkiĝis kaj riproĉis la ŝteliston: “Kiom forta estis bezono via, pro kiu vi ŝtelis de amiko tia?” Li respondis: “Ho sinjoro! Ĉu vi ne aŭdis: Hejmon de l’ amiko prirabu, sed al la pordo de l’ malamiko ne frapu!”

Ne senesperigu se vi havas vivkomplikon,  
Senhaŭtigu malamikon, senvestigu amikon!

*(1) En specialaj cirkomstancoj, oni fortranĉas la manon de ŝtelisto laŭ islamo. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 15**

Reĝo renkontis piulon kaj demandis: “Ĉu vi rememoras min foje?” Li respondis: “Jes. Tiam, kiam mi forgesas Dion!”

Dia forpelit’ ĉiudirekten vagas,  
Sed Lia alvokit’ senbezone agas.

## Rakonto 16

Bonkorulo sonĝis, ke reĝo estas en la paradizo kaj piulo en la infero. Li demandis: “Kiu estis la kialo de tiu ĉi supereco kaj la kaŭzo de tiu infereco? La popolo kredas male.” Venis voĉo: “Tiu reĝo estas en la paradizo pro intimeco al derviŝoj kaj tiu piulo estas en la infero pro proksimeco al reĝoj.”

Vi ne bezonas derviŝan vestaĵon,  
Nur bonfaron elektu kiel celon!  
Vi ne bezonas derviŝan ĉapelon,  
Derviŝu kaj metu Tatar-ĉapelon! (1)

*(1) Tataroj estis atakemaj kaj militemaj.*

## Rakonto 17

Marŝanto kun nudaj kapo kaj piedoj kun la Heĝaza (1) karavano forlasis Kufa-on (2) kaj kunvojaĝis kun mi sen havaĵo. Li marŝis trankvile kaj diris:

“Mi nek rajdas, nek ŝarĝon havas.  
Mi nek sklavon havas, nek sklavas.  
Por mi nek gajno, nek perd’ gravas.  
Mi trankvile vivas kaj pravas.”

Kamelrajdanto diris: “Ho derviŝo! Kien vi iras? Ne iru, alie vi mortos malfeliĉe!” Sed li ne obeis tiun averton kaj daŭrigis. Kiam mi atingis la haltlokon ĉe la palmĝardeno de Mahmud (3), la riĉa rajdanto severe malsaniĝis kaj proksimiĝis al morto. La derviŝo venis ĉe lin kaj diris: “Malfeliĉan min ne trafis morto, sed riĉan vin trafis tia sorto!”

Pro malsanulo tutnokte larmis ies okul’,  
Fine tiu mortis, sed pluvivis la malsanul’.

Foje rapid-ĉeval’ ne povas fini,  
Sed la celon atingas kriplazeno.

Multaj sanuloj jam iĝis subteraj,  
Kiam vunditoj vivas en sereno.

*(1) Parto de Saud-Arabio. Vidu La vortareton!*

*(2) Urbo en Irako. Vidu la vortareton!*

*(3) La plej proksima tiama haltejo al Mekko.*

## **Rakonto 18**

Reĝo alvokis piulon. La piulo decidis uzi medikamenton por maldikiĝi kaj tiel grandigi la estimon de la reĝo. Oni rakontis, ke li uzis venenan medikamenton kaj mortis.

Fama kiel kernhava pistako,  
li estis cepo, ŝelo sur ŝelo.  
Piulo preĝinta homdirekte,  
La kablo (1) ne estis lia celo.

Se persono preĝas al Dio sia,  
Tiu estu l' nura adorat' lia!

*(1) Punkto grava por islamanoj, kien ili sin turnas dum la preĝoj, nun la Mekka domo. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 19**

En Grekio, oni prirabis karavanon kaj senhavaĝigis ĉiun anon. La komercistoj ploris kaj kriis, kaj petis Dion kaj Mohamedon propeti la rabistojn, sed vane.

Venkinta ŝtelist' ne sentas angoron,  
Eĉ vidante karavananan ploron.

Lukmano la saĝa (1) estis en tiu karavano. Karavanano petis lin: “Admonu ilin kaj instigu al redono de nia havaĵaro, ĉar tiu damaĝo por ni estas granda damaĝo.” Li diris: “Vorto saĝa dirita al ili estas damaĝa!”

Kiam la rusto manĝis feron,  
ties polurado nur fuŝas.  
Ja ne admonu nigrkorulon,  
Fernajlo en ŝton' ne enpuŝas.

Ja la kulpo estas miaflanka.  
Dum prospera tempo helpu falintojn,  
Ĉar tio vin de katastrofo fortenas.  
Kiam almozanto de vi petas ion  
donu, alie uzurpanto prenas!

*(1) Homo fama je saĝo. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 20**

Malgraŭ la admono de ŝejko Abolfaraĝ Ben-Ĝozi (1), Dio benu lin, al forlaso de muziko kaj danco, kaj elekto de soleco kaj izoleco, mia junaĝa energio superis kaj diboĉon preferis. Do kontraste al la ŝejkadmono, kelkajn paŝojn mi antaŭeniris, per danco kaj festeno plezuron mi akiris, kaj rememorante ŝejkadmonon mi diris:

“La juĝisto ĝoje aplaŭdus, se li kun ni estus,  
Se polican' drinkus, ebrulojn li ne arestus.”

Ĝis mi aliĝis al grupo inter kies anoj estis muzikisto.  
Kvazaŭ per lia kord' ŝiriĝus aort',  
Lia voĉ' pli aĉa ol kri' pro patr-mort'.

Ĉeestantoj aŭ fingre ŝtopis la oreton aŭ buŝe abomenis tiun bagatelon.

Muzikaj sonoj ja plezurigas nin,  
Sed de vi silent' estas plezuriga.

De via kant' ne venas plezuro,  
Ja nur de via mortotamburo.

Kiam tiu vir' komencis sian kanton,  
"Ho! Pro Dio!" Mi petis la gastiganton:  
"Aŭ verŝu hidrargon en mian orelon, (2)  
Aŭ por mia forir' preparu kamelon!"

Resume, la invito de la amikoj min embarasis, kelkajn noktojn mi tiel trapasis.

Muezin' krias malĝustatempe,  
nescia kiom de la nokt' pasis.  
Demandu miajn brovojn pri l' temp'!  
Ĉar sendormo neniam min lasis.

Matene mi favore elmetis Dastar-on (3) de sur mia kapo kaj demetis dinaron de mia mondrapo kaj ilian akcepton de la muzikisto petis kaj inter la brakoj lin premis kaj multe dankemis.

La amikoj opiniis, ke mia intimo estis pli ol la kutimo kaj atribuis ĝin al mia freneziĝo. Unu el ili turnis al mi sian protestvoĉon kaj komencis riproĉon: "Vi ne agis saĝe, donacante ŝejkan vestaĵon al tia muzikisto, kiu neniam ĝuis monplezuron nek metis valoraĵon en lian tamburon."

Muzikist', kies forir' estas ĝoja,  
Nenie lia akt' estis dufoja,  
Kiam voĉ' ekvenas el lia buŝo,  
oniaj haroj ekstaras pro l' fuŝo.  
Lia voĉo timigas kortan fringon,  
premante l' cerbon, tranĉante l' laringon.

Mi diris: "Decas, ke la protestlangon vi mallongigu ĉar lia nobleco evidentiĝis al mi." Li respondis: "Ĉu vi ne sciigas min por ke mi ankaŭ proksimiĝu kaj pardonpetu pro la diritaj humuraĵoj?" Mi respondis: "Jes ja! Mia ŝejko multfoje admonis min eviti muzikon kaj insistis, sed tio ne envenis en mian orelon de

akcepto. Ĉi-nokte la kara sorto kaj destina forto gvidis min al ĉi tiu korto por ke mi pentu kaj ne okupiĝu pri muziko kaj festenoj dum la cetero de mia vivo.”

Voĉo bela el dolĉaj lipoj,  
ĉu kanta ĉu ne kanta, ravas.  
Kantoj el kantista laringaĉ’,  
kia ajn la deven’, malgravas.

(1) *Majstro de Sadio.*

(2) *“Verŝi hidrargon en la orelon” signifas surdigi.*

(3) *Ŝalforma kapvestaĵo.*

## **Rakonto 21**

Lukman-on (1) oni demandis: “De kiu vi lernis ĝentilecon?”  
Li respondis: “De konduktantoj laŭ malĝentileco; mi evitis fari tiujn iliajn agojn, kiuj ne konformis al la deco.”

Por inteligentul’ ne ekzistas  
senprofita ŝerco aŭ babilo,  
Sed cent filozofiaj ĉapitroj  
al sensciulo ŝajnas ludilo.

(1) *Saĝa homo. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 22**

Estas rakontite pri preĝemulo ĉiuvespere amase manĝanta kaj poste ĝismatene preĝanta. Piulo informiĝis kaj diris: “Se li manĝus duonpanon kaj poste iĝus dorma, tio estus multe pli norma.”

Senigu l’ internon je manĝaĵoj  
Por enlumigi ĝin je sciencoj,  
Vi estas plena ĝis via nazo,  
Tial vi malplenas de sciencoj.

## Rakonto 23

Dia favoro metis gvidlampon sur la vojon de perdiĝinto kaj li aliĝis al Diokredantoj. Danke al kunsido kun derviŝoj kaj konfido al ilia moralo, liaj malvirtoj ŝanĝiĝis al virtoj. Kvankam li forlasis diboĉon, tamen oni ne forlasis riproĉon, ke li ankoraŭ restas al sia pasinta kredo, kaj ne estas normalaj liaj pieco kaj preĝo.

Pento povas savi de Di-pun'  
Sed ne de l' lango de popolo.

Li ne povis toleri langturmentojn, do li plendis ĉe la ĉefŝejko. Respondis la ŝejko: "Kiel vi povas danki Dion pro tio, ke vi estas pli bona ol la popola imago."

"Mia riproĉanto estas envia."  
Kiom longe vi estas tiel rezona?  
Iam li staras verŝi mian sangon,  
Iam li sidas estante fripona.  
Boni kaj ŝajni malbona estas pli  
bone ol malboni kaj ŝajni bona.

Kiam ĉiu konsideras min perfekta malgraŭ mia malperfekto, akcepteblas mieno trista kaj pripenso persista.

Ĉe najbaro ne estas pri mi scio,  
Kaŝ- aŭ malkaŝaĵojn scias Dio.

Por ke oni ne kulpigu nin,  
ni fermas pardon al alia.  
Tamen ne utilas pordfermo,  
Di' ja pri ĉio estas scia.

## Rakonto 24

Mi plendis ĉe ŝejko, ke iu kalumniis min pro malĉasto. Li respondis: "Hontigu lin per bona konduto!"

Kiam via konduto ja bonas,  
okazon por kulpig' vi ne donas.  
Kiam harpo estas agordita,  
agordadon ĝi ne bezonas.

## **Rakonto 25**

Unu el la siriaj ŝejkoj estis demandita pri la situacio de sufismo (1). Li respondis: “Pasintece ili estis aro en la mondo, ekstere maltrankvila kaj interne stabila; sed nun ekstere stabila kaj interne maltrankvila!”

Se via koro ĉiam vagas,  
vi ne kvietos eĉ dum solo.  
Vi kvietos nur per Diamo,  
eĉ kun mon', komerc' kaj titolo.

*(1) Islama mistikisma religia pensado kaj praktikado. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 26**

Mi rememoras, ke tutan nokton mi marŝis kun karavano kaj frumatene dormis apud arbaro. Fervorulo estis kun mi dum tiu vojaĝo. Li kriis laŭte, hastis al la dezerto, kaj ne trankviliĝis eĉ momente. Kiam tagiĝis, mi demandis pri lia ago. Li respondis: “Mi vidis najtingalojn kantantajn sur la arboj, perdrikojn sur la monto, ranojn sur la akvo, kaj bestojn en la arbaro. Mi pensis, ke ne decas dormanta ignoro dum ĉies adoro!”

Hieraŭ birdo frumatene kantis  
forprenante toleron kaj prudenton.  
Unu el miaj bonkoraj amikoj –  
Mia voĉo kaptis lian atenton. –  
Li diris: “Mi ja ne pensis, ke al vi  
bird-blek' povas kaŭzi tian turmenton.”  
Mi diris: “Tio ne estas humana:  
Bird' preĝas kaj mi elektis silenton.”



## Rakonto 27

Dum la vojaĝo al Heĝazo (1), kun mi iris ĉarmaj junuloj, kiuj foje poemon diris kaj kantante inspiris. Kun ni vojaĝis piulo kontraŭa al la derviŝa tradicio kaj senscia pri ilia situacio. Ni atingis Bani Helal daktil-ĝardenon (2). El araba tribeto venis nigra knabeto, kiu prezentis kanton pro kiu birdoj silentis. Mi vidis la kamelon de la piulo, kiu ekdancis, ĵetis lin sur la teron, kaj forfuĝis. Mi diris: “Ho vi ŝejko! Tio efikis sur beston sed ankoraŭ vi indiferentas!

Matene diris al mi najtingalo:  
“Via ignor’ de l’ am’ estas skandalo.  
Araba poem’ vigligis kamelon,  
Sen amo vi estas besto en stalo.”

Printempe, kiam vento sur step’ blovas,  
Herbfoliojn, sed ne ŝtonojn, ĝi movas.

Adoras ĉiu sur la monda scen’,  
Percepton bezonas ties kompren’.  
Ne nur laŭdas najtingal’ surflora,  
Ĉiu dorno estas lang’ adora.

(1) *Parto de Saud-Arabio.*

(2) *Ripozejo sur la vojo al Mekko.*

## Rakonto 28

Iu havis amikon, kiu laboris en ministerio, kaj ili ne vizitis unu la alian dum longa tempo. Iam alia persono demandis: “Estas longa tempo, de kiam ne okazis vizito inter vi.” Li respondis: “Mi ne deziras viziti lin.” Hazarde estis rilatulo de la ministeri-oficisto, kiu demandis: “Kiun kulpon li faris, pro kiu vi hezitas viziti lin?” Li respondis: “Ne estas hezito por vizito, sed estas prefero viziti oficistan amikon kiam li eksigas, kaj tio estas pli oportuna por ni ambaŭ.”

Dum ofico, graveco kaj potenco,  
Ili hezitas viziti amikojn.  
Sed ili serĉas iun dum eksigo,  
por diri la problemojn kaj komplikojn.

## **Rakonto 29**

Jam finiĝis la vivo de reĝo, kiu ne havis posteulon. Li testamentis, ke la unua persono, enironta frumatene tra la urba pordego, surmetu la kronon kaj uzu la tronon. Hazarde la unua enirinto estis malriĉulo, kiu ĉiam el forĵetitaĵoj manĝaĵon preparis kaj siajn vestaĵojn ade riparis. La registaranoj kaj korteganoj plenumis la testamenton de la reĝo kaj transdonis la ŝlosilojn de la palacoj kaj trezorejoj al li. Dum tempo li regis la regnon, ĝis kelkaj guberniestroj malobeis kaj reĝoj ĉiuflanke kontraŭstaris kaj por militi armeon preparis. Resume, kaj la civitanoj kaj militistoj protestis, kaj li perdis parton de la regno. Laca pro tiuj eventoj, li hazarde renkontis malnovan amikon de sia derviŝa tempo kiu revenis de vojaĝo. La amiko diris: “Dankon al Dio, La Plejglora kaj Plejvalora, ĉar via floro el inter dornoj eliris kaj la dorno el via piedo eltiriĝis. La bona ŝanco trafis vin kaj la fortuna kaj feliĉo helpis, ĝis vi atingis al tiu rango. **Post la malfeliĉo venas la faciligo** (1).”

Roz' iam floras kaj iam perdiĝas,  
Arb' iam nudas kaj iam verdiĝas.

Li respondis: “Ho kara amiko! Mi bezonas kompatulon, ne gratulon! Pasinte mi okupiĝis pri panero sed nun pri tero!”

Sen riĉo okazas malfeliĉo  
kaj kun ĝi, inklin' al tiu riĉo.  
Jen la plej akra interna glavo:  
Tristigas kaj havo kaj nehavo.

Se vi ja deziras riĉiĝon  
moderu por ke venu paco.

Se riĉul' donas al vi oron,  
Tio estas por vi minaco.  
Estas derviŝa pacienco  
pli bona ol riĉuldonaco.

Al rostita zebro de Bahram Gur (2)  
preferindas formika lokust-krur'.

(1) *La Nobla Korano, ĉapitro 94, verso 7*

(2) *Sasanida reĝo fama pro inklino al zebroĉasado. La verso aludas al la fabelo pri Solomono, kiu inter la donacoj de la bestoj preferis lokust-kruron, la donacon de formiko.*

### **Rakonto 30**

Abu-Harire (1), aprobo de Alaho estu al li, ĉiutage venis ĉe la islama profeto, la beno de Alaho estu al li. Li diris: “Ho Abu-Harire, ĉiu-du-tage venu unu fojon por pliigi mian ĝojon.”

Al saĝulo oni diris: “Malgraŭ tiom da utilo, kiom ekzistas en sunbrilo, neniun oni aŭdis, kiu ĝin laŭdis.” Li respondis: “Ĉar ĉiutage ĝi estas videbla krom dum vintro, kiam al ĝi ekzistas kurteno kaj emo.”

Vizito indas sed nur tiom  
ke oni ne diru: “Sufiĉas!”  
Vi ne aŭdos ies riproĉon,  
se daŭre vi mem vin riproĉas.

(1) *Unu el la kunuloj de Mohamedo.*

### **Rakonto 31**

En la ventro de eminentulo blovis malagrabra vento. Li ne kapablis enteni ĝin: malgraŭvole el lia ventro ĝi eliris kaj li diris: “Ho amikoj! Mi faris tion senintence, kaj oni ne konsideru ĝin kulpo, kaj komforto venis al mi; vi ankaŭ bonvole pardonu min.”

Ho saĝul'! Ventro ventoprizono estas,  
Saĝulo neniam la venton arestas.  
Furzu se en via ventro blovas vento!  
Ĉar por la ventro vento estas turmento.

Severan kaj malgajmienan viron,  
Ne haltigu se li intencas eliron.

## **Rakonto 32**

La paroloj de Damaskaj amikoj ĉagrenis min. Mi rifuĝis al Jerusalema dezerto, intimiĝis al la bestoj, ĝis eŭropanoj kaptis min. Ili devigis nin labori por la Tripolia kanalo kune kun judoj. Alepa eminentulo kiu konis min, preterpasis, rememoris min kaj ekdiris: “Ho vi! Kia farto estas la via?” Mi respondis: “Kion mi diru?

Pro homoj mi iris al dezert',  
Por okupiĝi nur pri Dio.  
Vidu kia estas mia fart'  
en ĉi stala situacio!

Esti ĉe amikoj kun piedkateno,  
pli bonas ol ĉe fremduloj en ĝardeno.”

Li kompatis min, liberigis min kontraŭ dek dinaroj kaj kunportis min al Alepo. Li edzinigis sian filinon al mi kontraŭ cent dinaroj da doto. Pasis iom da tempo. Ŝi estis maltrankvila, furiozema, kverelema, kaj malobeema. Ŝia lango iĝis sakra kaj mia vivo amara.

Fiedzin' la hejmon danĝerigas  
kaj la mondon por l' edz' inferigas.  
For fi-kunulin'! Mia fi-fortun!

**Ja ŝirmu nin kontraŭ la fajro-pun'!** (1)

Resume ŝia sakra lango longiĝis kaj ŝi ekdiris: “Ĉu vi ne estis tiu, kiun mia patro aĉetis de eŭropanoj?” Mi respondis: “Jes

ja! Mi estas tiu, kiun li liberigis per dek dinaroj kaj malliberigis per cent dinaroj je vi!”

Iam mi aŭdis biografon:  
Noblulo savis de lup’ ŝafon.  
Nokte ĝian buĉon li emis,  
La ŝafo kompatinde ĝemis:  
“Kvankam de lupo vi min savis,  
Econ de lupo vi mem havis.”

*(1) La Nobla Korano, ĉapitro 2, verso 202.*

### **Rakonto 33**

Reĝo demandis kelkedzinan piulon: “Kiel vi pasigas la karan tempon?” Li respondis: “Mi tutnokte legas la Koranon, matene levas la manon (1) kaj tuttage perlaboras panon.” La reĝo komprenis la aludon de la piulo. Li ordonis salajri lin sufiĉe kaj malŝarĝi lian koron de la edzinŝarĝoj.

Ho mallibera de la edzin’!  
Ja komforto jam forlasis vin.  
Filo, vesto, manĝo kaj pano,  
Ĉu tempo por alia plano?  
Tagon mi pasigas por tio,  
ke nokton mi metu por Dio.  
Kiam noktpreĝon mi aranĝas:  
“Kion la filoj matenmanĝas?”

*(1) Aludo al islama preĝo, dum kiu oni levas la manojn. La aludo de la piulo pri la uzo de plejmulto de la tempo por fari religiajn aferojn kaj labori persvadis la reĝon helpi lin.*

### **Rakonto 34**

Ermito loĝis en arbaro, manĝante herbfoliojn. Reĝo pilgrime vizitis lin kaj diris: “Se vi permesas, mi donas loĝejon al vi en la

urbo, kie vi preĝu komforte, kaj la aliaj profitu de via ĉeesto kaj imitu viajn indajn agojn.” Tio ne plaĉis al la ermito; do li malakceptis. Veziro diris al li: “Ne decas malrespekti proponon reĝan. Vi povas kelktage veni al la urbo, provi la lokon, kaj se via valora tempo perdiĝos pro dialogo kun fremduloj, malakceptorajto ankoraŭ restos.” Oni rakontis, ke la ermito venis al la urbo. Oni preparis la ĝardenan domon de la reĝo por li, loĝejon kortrankviligan kaj animfaciligan.

Ĝia rozo kiel vizaĝo de belulin’,  
Ĝia hiacint’ kiel harar’ de karulin’.  
Malgraŭ la sufero pro vintro-maljunulin’,  
kaj manko de laktonutro de la vartistin’.

Granato-floroj (1) sur arbo  
kvazaŭ floroj sur verdfarbo.

La reĝo sendis al li belan sklavinon.

Tiu lunero, piultrompa,  
Anĝelvizaĝa, pavopompa,  
Nepre ŝia vizito estas  
por piuloj, rezignorompa.

Kaj sekve sklavon vizaĝe unikan kaj korpe maldikan.

Ĉirkaŭ tiu versisto pro soifo  
ja oni mortis sen akvo versata.  
Ne satiĝis l’ okul’ de lia rigard’,  
Kiel diabetul’ de akv’ eŭfrata.

La ermito komencis manĝi bongustaĵojn, surmeti tolaĵojn, uzi fruktojn, moskon kaj dolĉaĵojn, kaj rigardi al la vizaĝoj de la sklavino kaj sklavo. Saĝuloj diris: “Belulina hararo estas kateno por intelekto-piedo kaj reto por sagaca birdo.”

Perdinte l’ koron kaj moron pro via enket’,  
fakte mi estis sagaca birdo kaj vi ret’.

La forta pieco iom post iom malfortiĝis laŭ la eldiro de poeto:  
“Ĉu majstro ĉu maljunulo ĉu disĉiplo,  
ĉu oratoro kun elokventa buŝo,  
kiam iu subiras al la submondo,  
tiu similas al surmiela muŝo.”

La reĝo redeziris viziti lin. Li trovis lin en ŝanĝita stato, fariĝintan ruĝblanka kaj dika, kliniĝantan sur silka matraco, apud la anĝelkorpa sklavo, kiu stare svingis pavpluman ventumilon. La reĝo esprimis sian ĝojon pro lia bonfarto. Ili parolis pri ĉiuj temoj ĝis la reĝo ekdiris: “Neniu en la mondo tiom ŝatas du arojn, kiom mi; sciencistaron kaj piularon.”

Sagaca mondvojaĝinta filozofa veziro ĉeestis kaj diris: “Ho vi reĝo! La kriterio de amikeco estas bonfari al ili. Donu oron al la sciencistoj por ke ili studu kaj ion al la piuloj tiel, ke ili piecon ne ekskluzivu.”

Bela virin' ne bezonas  
turkisan ringon aŭ ŝminkon.  
Pia derviŝ' ne bezonas  
luksan manĝaĵon aŭ trinkon.

Se mi havas kaj deziras alian,  
ne ĝustas rigardi min kiel pian.

*(1) Nomo de arbo kaj ĝia frukto. Oni manĝas la enon de la frukto kruda, kaj uzas la sukron por kuirado.*

## **Rakonto 35**

Laŭ ĉi rakonto, grava problemo okazis por reĝo. Li promesis donaci dirhamojn (1) al ermitoj se la problemo solviĝos. Kiam la problemo solviĝis, li sentis devon plenumi la promeson. Al intimulo li donis monujon da dirhamoj por donaci al ermitoj. La intimulo estis saĝa kaj sagaca. Tutan tagon li serĉis, vespere

revenis, dirhamojn kisis, ilin metis antaŭ la reĝon kaj diris: “Mi ne trovis ermiton!” La reĝo koleris: “Kia rakonto? Laŭ mia scio, loĝas kvarcent ermitoj sur ĉi regno!” Li respondis: “Ho monda reĝo! Ermito ne prenas monon kaj monprenanto ne estas ermito!” La reĝo ridis kaj al la korteganoj diris pri la intimo: “Kiom mi estas amika kaj favora al Dioadorantoj, tiom li estas malamika al ili kaj ignora. Tamen li pravas.”

Piulo kiu akceptas monon,  
Trovu ol li pli pian personon.

*(1) Monunuo. Vidu la vortareton!*

### **Rakonto 36**

Oni demandis solidan religiestron: “Kio estas via opinio pri la donacata pano?” Li respondis: “Akcepteblas se piulo ricevas ĝin por komforte preĝi. Malakcepteblas se piulo preĝas por komforte ricevi ĝin.”

Por komforte preĝi estas tiu pano,  
Por ricevi ĝin, ne preĝu islamano!

### **Rakonto 37**


Derviŝo venis al domo kies mastro estis malavara; aro da nobluloj kaj oratoroj estis liaj gastoj, dirante spritaĵojn kaj humuraĵojn. La derviŝo, jam trapasinte la dezerton, estis laca kaj malsata. Unu el la gastoj diris humure: “Estus inde se ankaŭ vi ion dirus.” Li respondis: “Mi ne estas edukita kaj elokventa kiel vi. Estu kontentaj per verso mia.” Ĉiuj bonvole diris: “Diru ĝin!” Li komencis:

“Malsata mi starante apud panujo  
similas al fraŭl’ apud in’ en banujo.”



La gastoj sentis lian ekstreman situacion; do oni preparis manĝotablon por li. La gastiganto diris: “Ho mia amiko! Atendu iomete ĉar miaj servistoj kuiras viandbulon (1).” La derviŝo levinte sian kapon respondis:

“Ne gravas se sur tablo ne estos buloj,  
Simpla pano estas bul’ por malsatuloj.”



*(1) Bongusta manĝaĵo el rizo, viando kaj herbaĵoj; konata en islamaj landoj kiel “Kufte”.*

### **Rakonto 38**

Disĉiplo plendis al sia majstro: “Kion mi faru kiam oni ĉagrenas min? Ili ofte venas por viziti min kaj mi perdas la tempon tial!” Li respondis: “Al la malriĉaj ludonu ion kaj de la riĉaj petu ion. Tiel neniu plu venos ĉe vi.”

Se almozul’ islam-armeon pionirus,  
Malamikarmeo al Ĉinio forirus.

## Rakonto 39

Teologo diris al sia patro: “Neniu el la buntaj vigligaj eldiroj de la oratoroj efikas sur min, ĉar en ili mi ne vidas agon konforman al la lango!”

Ili instigas al mondolaso  
kaj kolektas monon en la kaso.  
Majstro, kiu havas nur eldiron,  
Ne per tio li vekos inspiron.  
Majstro-konduť ne estu malbona,  
Evito ne nur estu ordona.

**Ĉu vi ordonas la virton al la homoj kaj vi mem forgesas tion? (1)**

Majstr’, kiu diboĉas kaj mondavidas,  
mem estas perdita, kien li gvidas?

La patro respondis: “Ho mia filo! Laŭ mia opinio, ne indas eviti edukiĝon per admonuloj, akuzi religiajn sciencistojn pri devojiĝo, kaj perdi la profitojn de la scienco serĉante senpekan scienciston. Vi similas al blindulo nokte falinta en koton kaj diranta: “Ĉu ne estas islamano metanta lampon sur mia vojo?” Ŝercemulino aŭdis kaj diris: “Se lampon vi ne vidas, kion per la lampo vi vidas?” Religia kurso similas al vendejo. Se vi ne donas monon, vi ne ricevas varon. Do se vi ne montras inklinon, vi ne ricevas profiton.”

Majstran admonon ja akceptu,  
Eĉ se li misfaras kaj pekas.  
Ne ĝustas l’ eldiro de poet’:  
“Kiel dormant’ dormanton vekas?”  
Se bona admon’ estas sur mur’,  
Akceptante oni substrekas.

Iu iris de derviŝej' al lernej'  
rompinte la ligon kun la konantoj.  
Mi demandis pri l' kial' por prefero  
de l' adorantoj, al la admonantoj. (2)  
“Ĉar l' unuaj estas savantoj siaj,  
Sed la duaj ja de multaj dronantoj.”

(1) *La Nobla Korano, ĉapitro 2, verso 45.*

(2) *Adorantoj estas derviŝoj aŭ religiuloj kaj admonantoj estas instruistoj de la lernejo.*

## **Rakonto 40**

Iu kuŝis sur strato, ebrie kaj senkonscie. Ermito preterpasis kaj atentis lian mizeran staton. La junulo vekigis de ebridormo kaj diris: “**Kiam ili preterpasas ion vanan, noble ili preterpasas.**” (1)

Ja ne evitu pekulojn!  
Rigardu ilin pardone!  
Se mi kondutas malbone,  
vi preterpasu min bone!

(1) *La Nobla Korano, ĉapitro 25, verso 73.*

## **Rakonto 41**

Vagabondaro renkontis derviŝon, insultis, batis kaj turmentis lin. Tiu plendis al sia maljuna majstro pri la eventoj. La majstro respondis: “Ho mia filo! Derviŝa robo estas tolera vestaĵo. Kiu ne toleras turmentojn, tiu derviŝo ne estas kaj per tia robo sin ne vestu.”

Ŝtono ne malklarigas maran akvon,  
Turmentebla derviŝ' nur estas roĵo.

Indulgo forviŝas viajn pekojn,  
Do toleru se okazas sufer'!  
Iam vi fariĝos parto de l' ter',  
Do teriĝu antaŭ ol iĝi ter'. (1)

*(1) Tero estas simbolo de humileco.*

## **Rakonto 42**

Inter flago kaj kurten' en Bagdado  
ĉi-rakonte okazis disputado:  
La flago, laca pro vojaĝo-ĝeno  
estis riproĉanto de la kurteno.  
Fakte mi kaj vi estas sammastranaj,  
Ambaŭ kortegaj servistoj sultanaj.  
Ne servante mi neniam ripozis,  
Dejore kaj nedejore mi krozis.  
Vi spertis nek sieĝon, nek turmenton,  
Nek dezerton. nek sableron, nek venton.  
Ĉiam vi kun virinoj lunkoloraj  
kunestas, aŭ sklavoĵ jasmenodoraj.  
Plia estas mia klopodkolekto,  
Kial plia estas via respekto?  
Ĝi diris: "Mia kap' kuŝas en kastel',  
Kontraŭe, la via flirtas en ĉiel'.  
Kiu sentaŭge faras kolekendon,  
Tiu ja riskas sian kolekpendon.

## **Rakonto 43**

Sagaculo vidis pezleviston furiozan kaj ŝaŭmbuŝan. Li diris:  
"Kio okazis?" Oni respondis: "Iu insultis lin." Li diris: "Tiu fiulo  
levas multon sed ne toleras insulton!"

Ne fanfaronu pri fortec' kaj virec',  
Ĉu viro, ĉu ino, ne faru fuŝon!  
Se vi povas fari, buŝon dolĉigu!  
Reala vir' ne pugnas ies buŝon.

Dum li disŝiras elefantfrunton,  
Viro devas esti populara.  
Homaro devenas de la tero,  
Humila (1) estu ano homara!

*(1) En la persa, kroma signifo de "tera" estas "humila".  
Tion uzis la poeto en tiu situacio.*

## **Rakonto 44**

Noblulon mi demandis pri la virtoj de sufioj. Li respondis: "La minimumo estas tio, ke ili preferas plezurigi amikojn ol profiti mem." Filozofoj diris: "Frato okupata nur pri si mem, estas nek frato nek parenco."

Haltu se kunul' rapidas dum vojaĝo!  
Ne ekamu iun sen ama engaĝo!

Se mankas virto kaj pieco ĉe frato,  
Kontaktrompo plibonas ol parenĉŝato.

Mi rememoras, ke oponento kontraŭis al mia eldiro de tiu verso kaj diris: "Dio en La Nobla Libro malrekomendis kontaktrompon kun parencoj kaj rekomendis amikecon kun ili. Via eldiro estas kontraŭ tio." Mi respondis: "Vi eraras ĉar tio konformas al Korano:"

**"Se ili [viaj gepatroj] tamen volus instigi vin aldoni al Mi kiel rivalon ion, pri kio vi ne havas scion, tiam ne obeu ilin."** (1)

Oferu mil parencojn fremdajn al Di'  
por unu fremdul' kreda je religi'!

*(1) La Nobla Korano, ĉapitro 29, verso 9.*

## **Rakonto 45**

Donis ŝercema maljunul' en Bagdad'  
filinon al metiist' pri ŝu-farad'.  
La kruel-edzo mordis ŝian vangon,  
kaj tiel li fluigis ŝian sangon.  
Matene sian patron informis l' in'.  
Li iris al bofil' kaj demandis lin:  
“Ho fiul'! Kia estas via dento?  
La mordaĵ' estas haŭto, ne cemento.”  
Ŝerce mi ne diris tiun rakonton,  
Lasu bagatelon, prenu l' restonton! (1)  
Se en iu fiksiĝas fihumuro,  
Nur mort' forigas de lia naturo.

*(1) Ne atentu pri la bagatelaj partoj de la rakonto, sed al la restontaj gravaj.*

## **Rakonto 46**

Estas dirite, ke al sciulo apartenis filino havanta ekstreme malbelan vizaĝon kaj atinginta virinan maturaĝon. Kvankam ŝi posedis riĉon kaj havaĵaron, neniu emis fari kun ŝi paron.

Malbela ŝajnas silkaĵo ĉina  
sur la korpo malbel-fianĉina

Fine pro neceso ŝi fariĝis edzino de blindulo. Estas dirite, ke tiam venis kuracisto el Serendibo (1) kiu donis vidpovon al blinduloj. Oni diris al la sciulo: “Kial vi ne kuracigas vian bofilon?” Li respondis: “Mi timas pro tio, ke neblindiginte li forlasos mian filinon.” Por malbelulino, edzo blinda estas pli inda.

*(1) Antikva nomo de Srilanko.*

## Rakonto 47

Reĝo humilige rigardis al derviŝoj. Unu el ili eksciis tion sagace kaj diris: “Ho reĝo! Ĉi-monde ni estas pli malsuperaj ol vi je forto sed pli supraj je komforto, egalaj dum la morto, kaj pli bonaj je releviĝa sorto.”

Se viv' plezurigas la sultanon,  
Kaj se derviŝo bezonas panon,  
Kiam tiuj du personoj mortas,  
Kun si nur tukon ili kunportas.  
Kiam ĉielen ni pasaĝeras,  
Malriĉeco reĝecon superas.

Derviŝa ekstero estas robo malnova kaj kapo kalva, sed la interno estas koro mova kaj volupto katenita.

Ne fanfaronanta ĉe l' popolo,  
Ne batalanta kontraŭ opono,  
Kiam falas ŝtono de sur monto,  
Ne devojiĝanta pro la ŝtono. (1)

La vojo de la derviŝoj estas preĝado, dankado, servado, obeado, sindonemo, kontentiĝemo, unudiismo, konfido kaj cedo al Dio, kaj toleremo. Kiu havas la virtojn listigitajn, tiu estas derviŝo eĉ en robo riĉa. Sed nepreĝanta vagabondo, voluptema kaj mondavida, kiu pasigas la tagon diboĉante kaj dormas la nokton ignorante, manĝas ĉion sur la tablo kaj diras ĉion sur la lango, estas diboĉulo eĉ en robo derviŝa.

Ho interne nuda je pieco!  
Vestita per robo hipokrita!  
Ne uzu sepkoloran kurtenon  
dum via tapiŝ' estas ŝirita!

*(1) Tio signifas, ke ili estas rigidaj pri siaj kredoj.*

## **Rakonto 48**

Mi vidis bukedojn da viol'  
kreskintajn sur verda herb-kupol'.  
Mi diris: "Kial herb' mizera  
sidas apud flor' primavera?"  
Plore la herb' diris: "Silentu!  
Noblul' aliajn ne turmentu!  
Sen kolor', bonodor', aŭ solen',  
sed ja herbo de Lia ĝarden',  
Fakte mi estas kreit' Dia,  
kreskinta per favoro Lia.  
Se mi estas kun aŭ sen arto,  
Pro li mi estas en bonfarto.  
Kvankam mi estas herb' mizera,  
Kaj por Li, nenionofera,  
Li scias bezonojn de l' sklavo,  
Sklavo sen rimedo, sen havo.  
Mastroj, kiuj sklavojn havigas  
maljunajn sklavojn ekssklavigas.  
Ho! Kreinto de ĉiu merit'!  
Pardonon petas via kreit'.  
Al obe-Kaabo promenu  
Ho Sadi! Dian pordon prenu!  
Hontindas turni kapon sian,  
De tiu pord', serĉi alian.

## **Rakonto 49**

Sciulon oni demandis: "Inter malavareco kaj braveco kiu pli bonas?" Li respondis: "Ne gravas se malavara ne bravas."

Ne restos Hatam de Tajo (1) por ĉiam  
sed restos eterne liaj nom' kaj fam'.



Pagu vian Zakat-on (2), ĉar la herbojn  
se ĝardenist' stucas, pliiĝas sezam'.  
“Donema man' pli bonas ol forta brak’”  
estas skulptite sur l' tombo de Bahram (3).

*(1) Homo fama pro sia donacemo. Vidu la vortareton!*

*(2) Zakat estas monsumo, kiun en islamo oni devas pagi pro religia devo kiel almozo. Vidu la vortareton!*

*(3) Bahram la 5-a, estis antikva persa reĝo de la sasanida dinastio (226–636 p.K.), fama pro inklino al zebroĉasado.*

## **Ĉapitro 3**

### **La Meritoj de Kontenteco**

#### **Rakonto 1**

Maroka almozpetanto sur la aleo de ŝtofvendistoj en Alepo (1) diris: “Ho riĉuloj, se vi havus justecon kaj ni kontentecon, almozpetado malaperus de la mondo.”

Ho kontentec’, bonvolu riĉigi min!  
Super ĉiuj benoj vi avantaĝas.  
Pacienc’ estas Lukmana (2) elekto,  
Ĉiu senpacienca ja ne saĝas.

*(1) Urbo en Sirio.*

*(2) Tre saĝa persono. Vidu la vortareton!*

#### **Rakonto 2**

Du princoj estis en Egiptio; unu al teologio estis sindediĉa, kaj la alia per monkoklekto iĝis riĉa. Finfine la unua fariĝis religiulo granda kaj la dua, reĝo sialanda. La riĉulo rigardis al la religiulo humilige kaj diris: “Mi fariĝis reĝo kaj vi ankoraŭ sidas sur mize-ro-seĝo.” La religiulo respondis: “Ho frato! La favoroj de Dio, valora estu Lia nomo, ankoraŭ estas pli multaj por mi ol por vi, ĉar mi heredis heredaĵon de Salomono, kio estas religia scienco, kaj vi heredis heredaĵon de Faraono, kio estas egiptreĝa potenco.

Mi estas piedpremata formiko,  
kaj ne vespo ĝenanta per la piko.  
Kiel mi rekompencu la favoron,  
ke mi ne kapablas kaŭzi doloron.

#### **Rakonto 3**

Mi aŭdis ke derviŝo kies mizero tragikis, sian robon flikis kaj por trankviligi sin, diris:

“Ni kontentu per vestaĉo kaj paner’,  
Mizer-sufer’ malplias ol ŝuld-sufer’.”

Oni diris al li: “Kial vi sidas? Iu en tiu ĉi urbo havas malavaron karakteran kaj donacemon senpreferan, kiu al liberemuloj donas favorojn kaj eniris ĉies korojn. Se li ekscios pri via nuna stato, li tutkore kaj honore faros ion por via malsato. Li respondis: “Silentu! Ĉar malriĉe morti pli bonas ol bezonon raporti.”

Fliki kaj resti en paciencangulo,  
Pli bonas ol veston peti de riĉulo.  
Vere estas egala al pun’ infera,  
Per najbarhelpo ja paradizpostulo!

## **Rakonto 4**

Unu el la nearabaj reĝoj sendis lertan kuraciston al Mostafa (1), diajn pacon kaj saluton sur lin. Ĉirkaŭ unu jaro li estis en Arabio, sed neniu portis al li urinspecimenon aŭ petis kuracon. Li iris ĉe la Profeton kaj plendante diris: “Oni sendis min por kuraci kamaradojn, sed dume neniu atentis min, por ke mi povu plenumi mian difinitan taskon. La Sendito, paco sur lin, diris: “Tiu ĉi gento havas vivmanieron, laŭ kiu ili nenion manĝas antaŭ ol la apetito devigas ilin, kaj ili ĉesas manĝi antaŭ ol la apetito finiĝas.” La kuracisto diris: “Malsanomalmulto ja estas la rezulto.” Poste li kisis la teron kaj foriris.

Tiam saĝul’ paroli komencas:  
Aŭ ĉe la tablo manĝi intencas,  
Kiam silent’ difekton alportas,  
Aŭ pro malnutro baldaŭ li mortas.  
Do, portas prudenton lia vorto,  
Kaj lia manĝo savon de l’ morto.

*(1) La titolo de Mohamedo, islama profeto.*

## Rakonto 5

En la biografio de Ardaŝiro (1) oni skribis, ke li demandis araban kuraciston: “Kiom oni devas manĝi tage?”

Li respondis, ke sufiĉas cent dirham-pezoj (2). Ardaŝiro mire demandis ĉu tiom vere sufiĉas? La saĝulo respondis: “Tiom da manĝaĵo tenas vin sed se vi manĝas plu, vi ĝin tenu!”

Manĝu por vivi kaj preĝi!

Ne vivu por multe manĝi!

*(1) Ardaŝiro la 1-a (? – 240 p.K.), estis la fondinto de la Sasanida imperio, kaj reĝo de Persio de 226-a ĝis sia morto.*

*(2) Dirham-ŝtono aŭ dirham-pezo estis la pezo de unu-dirhama monero, ĉirkaŭ 4 gramoj. Vidu la vortareton!*

## Rakonto 6

Du derviŝoj el Ĥorasano (1), kunvojaĝis en karavano. Unu malfortis kaj ĉiam du sinsekvajn tagojn fastis, sed la alia fortis kaj ĉiutage tri fojojn al manĝado hastis. Hazarde oni arestis ilin ĉe unu el la urbobastionoj kun la suspekto esti spionoj.

Oni enĉeligis ilin ambaŭ. Post du semajnoj evidentiĝis, ke ili estas senkulpaj. Oni malfermis la ĉelojn por liberigi ilin. Strange la forta jam estis morta, sed ankoraŭ vivis la malforta.

La ĉeestantoj miris. Saĝulo diris: “La malo estas stranga! Tiu manĝhastemulo ne toleris la malabundon kaj mortis mizere, sed tiu ĉi fastemulo rezistis laŭ sia kutimo tolere, kaj nun vivas libere.

Se manĝeti iĝos por vi natura,  
senmanĝeco ne estos do terura.

Se vi ĉiam pigre restas plezura,  
por vi malsateco estos tortura.

*(1) Irana provinco. Vidu la vortareton!*



## **Rakonto 7**

Saĝulo admonis sian filon: “Ne manĝu tro, ĉar trosato malsanigas.” La filo respondis: “Sed patro mia, la malsato mortigas! Ĉu vi ne aŭdis la spritaĵon “Sate morti pli bonas ol malsate malkomforti.”

La patro rekomendis: “Moderu!” “**Manĝu kaj trinku sed ne transpaŝu la limojn...**”(1)

Se vi manĝas tro, la manĝaĵ’ elbuŝiĝas.

Se vi manĝas ete, via viv’ fuŝiĝas.

Kvankam via viv’ de manĝo dependas,

via korpo pro troa manĝo plendas.

Ne tro manĝu, eĉ konfiton de rozo!

Malfreŝ-pan’ utilas laŭ bona dozo.

Malsanulon oni demandis: “Kion vi volas?” Li respondis: “Tion ke mi nenion volu.”

Se plena stomako kaŭzas doloron,

Pilol’ ne havos apartan valoron.

(1) *La Nobla Korano ĉapitro 7, verso 32.*

## **Rakonto 8**

Sufioj de Vaset (1) ŝuldis kelkajn dirhamojn al vendisto. Li ĉiutage postulis sian monon per maldecaj vortoj. La amikoj laciĝis pro lia turmento sed devis toleri. Iu lamentis tie: “Al la stomako promesi panon pli facilas ol al vendisto monon.”

Pli bonas foriri de moŝta favorlist’,

ol suferi forpelson de lia pordist’.

Pli bonas senvianda malsata morto,

ol ĉia cedo al buĉista fiperforto (2).

(1) *Urbo en nuna Irako.*

(2) *La verso de Sadio dusence signifas “la petaĉo de la buĉistoj / petaĉi la buĉistojn”. Iuj kredas ke Sadio aludas al aĉa kutimo tiutempa, ke kelkaj buĉistoj kontraŭ kredita vendo petis sodomii.*

## Rakonto 9

Irana kavaliro (1) en la milito kontraŭ tataroj vundiĝis grave. Iu rekomendis al li peti panaceon de komercisto misfama je avaro kun ŝanceto por ricevo de tiu varo.

Se anstataŭ pano estus ĉe li sun',  
Neniu vidus ĝian lumon ĝis nun.

La kavaliro argumentis: “Se mi petas la medikamenton, li donas aŭ ne, kaj eĉ se li donas, ĝi efikas aŭ ne, sed ĉiukaze peti lin mem estas mortiga veneno.”

Rezultas peto de avarulo:  
Korpo: en ordo, respekto: nulo.

Saĝuloj avertas: “Ne faru tiajn negocojn; ekzemple se oni vendas eternan vivon kontraŭ la bonfamo, saĝulo ne aĉetas, ĉar morti viktimo pli bonas ol vivi malestime.”

Pli bonas kolokint' (2) el afabla man',  
ol el homo mishumora, dolĉa pan'.

(1) *Ajar, la irana kavaliro.*

(2) *Speco de citrolo, simbolo por amareco.*

## Rakonto 10

Ulemo (1) kun granda familio kaj malgranda honorario, iris al sia patrono por peti iom da mono. Al la patrono, kiu fidis la ulemon, ne plaĉis la peto kaj li trovis tiun agon aŭdaca deflanke de edukito.

Mismiene ne iru ĉe amik'!  
Lian tagon ja vi amarigas.  
Se vi petas ion de via patron',  
via rido bone vin karigas.

Oni diras ke la patrono aldonis iom da mono kaj reduktis multe da rekono. La ulemo, post kelkaj tagoj, rimarkinte la reduktiĝon de la afablo, plendis:

“Buljono per almoz’ ne plaĉas.  
Poto plenas sed digno aĉas.

Panon multigas, sed famon difektas,  
For la fi-pet’! Malriĉon mi elektas.”

*(1) Religia sciencisto, islama teologo. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 11**

Derviŝo ekbezonis monhelpon. Amiko diris al li, ke persono havas nekalkuleblan riĉon: “Kaj plejeble li donos al vi ion se li scios pri vi.” Ĉar la derviŝo ne konis lin, la amiko proponis akompani la derviŝon al la domo de la riĉulo. La derviŝo akceptis. En la hejmo de la riĉulo, la derviŝo vidis iun, kiu paŭte kaj bruske sidis. La derviŝo silente revenis. Oni pri la kialo demandis lin. Li respondis: “Nek lia donaco, nek lia grimaco!”

De paŭtemulo petu nenion ajn,  
ĉar ja vin frustros lia temperament’!  
Konfidu vian malĝojon al tiu,  
kiu bonvenigas en ĉiu moment’!

## **Rakonto 12**

Dum jaro en Aleksandrio okazis tia seka vetero, ke eĉ al derviŝoj mankis tolero. La ĉielo siajn pordojn al la tero blokis kaj la krio de teranoj la ĉielon vokis.

Bestoj, birdoj, fiŝoj kaj insektoj,  
ĝemis al ĉiel’ pro malabundoj.  
Mi miras kial krioj kaj larmoj  
ne fariĝas nuboj kaj inundoj. (1)



En tiu jaro estis samseksama viro, la amikoj ne estu tiaj, pri kiu skribi estas kontraŭ ĝentilo. Tamen absoluta neglekto ĉe granduloj ja ne decas ĉar oni dirus, ke la poeto ne kapablas esprimi tiajn aferojn. Tial mi mallongigas la parolon je du distikoj, ĉar eto estas specimeno de ego kaj ero estas specimeno de aro:

Se tataro murdus tiun ĉi homon,  
la tataro ne estu punmortonto!  
Akv' iras sube, homoj iras sure:  
Li ja estas kiel Bagdada ponto.

La viro pri kiu mi skribis iom, en tiu jaro havis multan riĉon, donis al malriĉuloj oron kaj arĝenton afable, kaj nutris vojaĝantojn ĉirkaŭtable. Aro da derviŝoj, malsataj kaj ĝisoste turmentataj, ekvolinte eniri lian korton petis mian konsilan vorton. Mi maljesis kaj versis:

La leon' ne tuŝas hundan lasaĵon  
eĉ se ĝi malsate en kavo mortas.  
Pli bonas al pari' (2) ne manetendi,  
eĉ se pro malsat' vi ege malfortas.  
Se fihomo regas kiel Ferejdun (3),  
Neniu kun lia reĝec' komfortas.  
Lazurit' aŭ oro sur muro estas,  
Silkaĵ' aŭ faj', kion fiulo portas.

(1) *Oni imagas la ve-spirom kaj suspirom kiel vaporon kaj fine nubon.*

(2) *Mizerulo eljetita el la socio.*

(3) *Irana mita reĝo. Li batalis kontraŭ mita kruela reĝo kaj venkinte lin fariĝis la reganto. Vidu la vortareton!*

### **Rakonto 13**

Hatam la Tajano (1) estis demandita: “Ĉu vi iam renkontis iun pli grandaniman ol vi?”

Li jesis kaj konfesis: “Ĝam mi oferis kvardek kamelojn por arabaj generaloj. Kiam mi foriris al angulo en la dezerto por fari ion, mi vidis laboriston kolektantan dornarbustojn por kameloj. Lin mi demandis, kial li ne iras al la festeno de Hatam, ĉar tie ariĝis multaj homoj. Li respondis:

“Manĝu ĉiam vian propran panon,  
Al Hatam ne etendu la manon.”

Lin mi trovis pli nobla kaj pli grandanima ol mi.”

*(1) Araba antaŭislama poeto kaj generalo de la tribo Taj, fama pro sia malavareco kaj nobleco. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 14**

Moseo, saluton al li, renkontis nudan malriĉulon, kiu iris sub la sablojn por kovri sin. Li petis Moseon: “Bonvolu preĝi por mi, ke Dio, La Kara kaj Granda, riĉigu min. Ĉar ne plu eblas toleri tiun ĉi malriĉon.” Moseo tion faris kaj foriris.

Post kelkaj tagoj, li revidis la viron, kiam oni lin arestis kaj ĉirkaŭ li multaj homoj estis. Moseo demandis la kialon. Oni respondis, ke la viro drinkis kaj ebrige iun mortigis. Nun oni volas mortpuni lin. Ja sprituloj diras:

“Se flugilojn la mizera kat’ havus,  
Ĝi ja ekstermus ĉiujn paser-ovojn.  
Foje la manojn de malfortul’ rompas  
senpovulo kiu atingas povojn.”

Se Allah pliigus por Siaj servantoj la vivtenon, ili malhumiliĝus sur la tero, ...(1)

Moseo, saluton al li, konfesis Dian ĉio-scion kaj pentis pro sia aŭdaco.

La vivon de aroganta amiko  
minacas spekto de l’ flug’ de formiko.

Se al lakeo arĝenton vi donas,  
kapofrapon aldone li bezonas.

Estas fama maksimumo de Platono:

”Por formik’ senflugileco pli bonas.”

La patro havas multe da miel’, sed la filo ŝatas sukeraĵon  
neniel.

Pro tio Li ne provas vin riĉigi,  
ke Li ne volas vin malfeliĉigi.

*(1) La Nobla Korano, ĉapitro 42, parto de la verso 28*

## **Rakonto 15**

Inter juvelistoj de la urbo Basra (1), mi renkontis arabon, kiu rakontis al mi: “Iam mi vojaĝis en dezerto. Mi perdis la vojon. Finiĝis miaj provianto kaj forto, kaj preskaŭ mi cedis al la morto. Subite mi trovis saketon. Neniam mi forgesas tiun ĝojon, kiam mi supozis, ke mi trovis saketon da rostitaj tritikoj. Ankaŭ neniam mi forgesas tiun amaran malĝojon, kiam mi malkovris ke ĝi estas saketo da perloj.”

En dezerto, kie la sabloj fluas,  
perlo por soifo ne kontribuas,  
Por homo falinta sen provianto,  
enpoŝe ĉu terbul’ ĉu diamanto.

*(1) Urbo sude de Irako.*

## **Rakonto 16**

Arabo en dezerto pro ega soifo deliris kaj diris:

“Ve! Se antaŭ iro al edeno  
mi farus iom da piedtreno!

De river' plaĉa pro akvopleno  
mi min distru nur per akvopreno!"

### **Rakonto 17**

Vojaĝanto perdis sian vojon en vasta dezerto, elĉerpiĝis liaj forto kaj provianto, havis kelkajn dirhamojn en la monsako, vagis multe sed senrezulte, kaj finfine mortis mizere. Iuj renkontis lin mortintan, ĉirkaŭ li verŝitan lian monon, kaj surtere mesaĝon skribitan:

Kiom ajn da or' oni havas,  
sen provianto, tio ne savas.  
Dezerte por malsata mizerul',  
rapradiko pli ol arĝent' gravas.

### **Rakonto 18**

Neniam mi plendis pro malkomforto kaj neniam mi paŭtis pro mia sorto, krom kiam miaj piedoj estis nudaj kaj mi ne havis monon por aĉeti ŝuojn. Mi eniris malĝoje la grandmoskeon de Kufa (1) kaj tie vidis senpiedulon. Mi esprimis al Dio grandan dankon kaj decidis elteni ŝumankon.

Koko fritita por sata homo  
valoras ete kiel legomo.  
Por la personoj sen aĉetpovo  
koko kostegas, sufiĉas ovo.

*(1) Urbo en Irako, kun fama granda moskeo. Vidu la vortareton!*

### **Rakonto 19**

Reĝo, kun kelkaj siaj korteganoj, dumvintre en ĉasejo perdiĝis. Vespere ili vidis domon de kamparano. La reĝo proponis iri tien kaj savi sin de la malvarmo. Unu el la veziroj diris: "Ne

decas por la rango de la reĝo tia fuĝo al kamparana hejmo. Ni tendumu, faru fajron kaj tranoktu ĉi tie.”

La kamparano eksciis. Li preparis manĝaĵojn, alportis ilin al la reĝo, kisis la teron kaj diris: “Ne malaltiĝos la alta rango de la sultano, sed oni ne deziris altiĝon de la rango de kamparano.”

Plaĉis al la sultano la vortoj de la kamparano. Ili tranoktis en lia hejmo. Matene la reĝo rekompencis per kostumo kaj monsumo. La kamparano iris kelkajn paŝojn post la reĝo dirante:

”Ne malaltiĝos la rango de la reĝo,  
bonvole veni hejmen de la kamparan’.  
Kamparana ĉapelrand’ frotos la sunon,  
se ĵetos sian ombron sur lin la sultan’.”

## **Rakonto 20**

Oni rakontas pri abomeninda almuzulo, kiu kolektis enorman riĉon. La reĝo petis lin: “Oni diras, ke vi havas multan monon, kaj mi bezonas. Se vi solvos parton, revenos rekompenco kiam pli boniĝos la financo.”

Li respondis: “Ho dio sur la tero! Ne decas al la eminenta rango de la reĝoj malpurigi siajn manojn per havaĵo de almuzulo kiel mi, kiu gran-al-grane kolektis monon.”

La reĝo diris: “Ne gravas, ĉar mi donos ĝin al neislamanoj.

**Malbonaj aĵoj estas por la malbonaj homoj...(1).”**

Se akvaĉon kristana puto havas,  
Ne gravas! Ĉar vi mortan judon lavas.

Se oni avertas pri past-malpur’,  
Nur ŝtopu per ĝi fendojn sur la mur’!

Mi aŭdis, ke li malobeis la reĝon kaj impertinente serĉis pretekstojn. La reĝo ordonis, ke oni pune kaj turmente ricevu de li la postulatan monon.

Se subtile afero ne sukcesas,  
Per perforto la afero progresas.

Se vi pardonu vin mem ne kapablas,  
Pardon' de aliuloj ne probablas.

*(1) La Nobla Korano, ĉapitro 24, verso 27.*

## **Rakonto 21**

Komercisto en la insulo Kiŝ (1) invitis min dum vespero al sia ĉambro. Pri li mi jam aŭdis, ke li havas cent kvindek kameleojn kaj kvardek sklavojn kaj lakeojn.

La tutan nokton li ne ripozis kaj senĉese parolaciis pri sia kunkomercano en Turkestano aŭ tiu vendrabato en Barato, kaj la registropapero de tero aŭ la garantiaĵo de tiu komercaĵo. Li iam diris, ke li vojaĝos al Aleksandrio, kies vetero tre ĉarmas kaj tiam diris, ke ne, ĉar la okcidenta maro malkalmas. Foje li alparolis min: “Ho Sadio, mi planas alian vojaĝon, se mi faros ĝin, la reston de mia vivo mi sidos en angulo.”

Mi demandis lin pri tiu vojaĝo. Li daŭrigis:

“Persan sulfuron mi eksportos al Ĉinio, ĉar mi aŭdis, ke tie ĝi multekostas, kaj de tie mi portos porcelanaĵojn al Romo, kaj de tie mi portos roman fajon al Barato, kaj de tie mi portos baratan ŝtalon al Alepo, kaj de tie mi portos alepan kristalon al Jemeno, kaj de tie mi portos jemenan ŝtofon al Persio, kaj poste mi ĉesos komercvojaĝi kaj ja sidos en mia komercejo.”

Tiom da ĉi tiaj melankoliaj deliraĵoj li diris ĝis li literasence ne kapablis plu paroli.

Nur tiam li turnis sin al mi kaj petis: “Ho Sadio, ankaŭ vi diru ion pri tio, kion vi vidis aŭ aŭdis.” Mi respondis:

En la lando Gor (2) estis fruvespero:  
Ĉevalfalinta vargardist' kun sufero  
diris: “Mallarĝokulon de avidul'  
plenigas aŭ kontento aŭ tombtero.”

*(1) Insulo sude de Irano, en la Persa Golfo.*

*(2) Provinco en la nuna Afganio*

## Rakonto 22

Mi aŭdis pri riĉulo tiom fama pro avareco, kiom estas fama Hatam la Tajano (1) pro malavareco. Ekstere mondaj riĉoj lin ornamis sed interne avara fajro flamis. Li ne donis panon, eĉ se oni estis mortanta pro malsato. Li ne donacis viandopecon eĉ al la kato de Abu-hurajra (2) nek ĵetis ostopecon eĉ al la hundo de La Sep Dormantoj (3). Resume, lian dompordon neniu vidis malfermita, kaj lian manĝotablon neniu vidis preparita.

De lia manĝo, nurodoro alblovas,  
De lia manĝo, birdo nenion trovas.

Mi informiĝis, ke li ekvojaĝis al Egiptio en la okcidenta maro, pensante, ke li estus unu el la faraonaro. ...**ĝis alproksimiĝis la drono**... (4). Kontraŭa vento ekblovis.

Tolerendas via temperament' ĉiam,  
Laŭ ŝipdirekto ne blovas la vent' ĉiam.

Li komencis preĝi kaj krii, sed estis tute vane! **Kiam ili enŝipiĝas, ili alvokas Allahon en sincera obeemo al Li**... (5)

Ne etendu manojn preĝe al ĉiel',  
se vi fermis ilin al monopetant'.  
Por vivi bonas oro kaj arĝento,  
Zorgu pri la najbaro kaj proviant'!  
Post via mort', la dom' lasota de vi,  
ne gravas ĉu el or' ĉu el brilant'.

Oni diras, ke li havis en Egiptio malriĉajn familianojn, kiuj riĉiĝis pro la heredaĵoj. Pro lia morto ili la malnovajn vestaĵojn forŝiris (6) kaj por mendi Damietan felveston ĉe tajloro iris (7). En la sama semajno iun el ili mi vidis, kiu sur luksa ĉevalo sidis kaj lia sklavo post li rapidis.

Ho, se revenintus la mortinto  
inter la familio kaj domo,

Hered-redoni pli malfacilus  
ol akcepti morton de la homo.

Ĉar ni estis konatoj, mi aŭdacis alparoli lin:  
“Manĝu vi, feliĉulo kaj vera vir”!  
Ĉar kolektis sed ne manĝis tiu sir’.”

*(1) Hatam de Tajo estis homo fama pro sia donacemo. Tajo estas nomo de tribo en Arabio. Vidu la vortareton!*

*(2) Unu el la apostoloj de Mohamedo. Vidu la vortareton!*

*(3) La Sep Dormantoj aŭ La Amikoj de la Kaverno, estas legendo pri kelkaj kredantaj junuloj en la tempo de la imperiestro Decio, kiuj endormiĝis en kaverno por fuĝi de la persekuto kaj dormis tie kelkcent jarojn. Ili havis hundon kiu dormis ĉe la enirejo de la kaverno kaj estis ŝatata kaj respektata. Vidu la vortareton!*

*(4) La Nobla Korano, ĉapitro 10, verso 91.*

*(5) La Nobla Korano, ĉapitro 29, verso 66.*

*(6) Dusenco: forŝiri vestaĵojn pro ies morto estas orienta rita kutimo, sed samtempe en tiu ĉi frazo laŭ kunteksto ni vidas ke tiu disŝiro estis ne nur pro la morto de riĉa familiano sed por liberiĝi de tiuj vestaĵoj kaj prepari novajn vestojn per la hereda mono.*

*(7) Damietta estas urbo en Egiptio kies felo estis fama.*

## **Rakonto 23**

En la reto de malforta fiŝisto kaptiĝis forta fiŝo; li ne kapablis teni ĝin, do la fiŝo superis kaj forprenis la reton kaj foriris.

Sklavet’ iris riverakvon alporti,

La rivero kunportis la sklaveton.


La ret’ ĉiufoje kunportis fiŝojn,

Ĉi-foje fiŝo kunportis la reton.

Aliaj fiŝistoj bedaŭris kaj riproĉis lin: “Kial kaptinte tiun ĉasaĵon vi ne povis teni ĝin?” Li respondis: “Ho fratoj, kion mi



povas fari kiam la sorto diktis, ke mi nenion ĉasu kaj tiu fiŝo alian tagon pasu?” Kontraŭsorte fiŝisto el Tigriso ne fiŝkaptivas kaj laŭ-sorte fiŝo eĉ sur la tero plu vivas.



## **Rakonto 24**

Senmanpiedulo (1) mortigis miriapodon. Spritulo preterpasis kaj diris: “Mirinde! Kun mil piedoj ĝi ne povis eskapi el senmanpiedulo, ĉar ĝia mortotempo jam alvenis.”

Se persekutas malamikema rival’,  
ja ligas la sort’ piedojn de l’ ĉeval’.

Kiam atakas vera malamiko,  
al reĝa pafarko mankas efiko.

*(1) Homo, kies manojn kaj piedojn oni jam detranĉis ekzemple pune pro ŝtelado k.s. post ripetado de la samspeca delikto laŭ la islama leĝo. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 25**

Stultulo dika, vestita per talaro ŝika, rajdanta sur bona ĉevalo kaj portanta egiptan turbanon, pasis, kaj iu min demandis: “Sadio, kion vi opinias pri tiu fajdo gracia sur tiu besto senscia?”

Mi respondis:” Malbela skribo per ora inko.” Aŭ: “Unu bela estaĵo pli bonas ol milo da felaj vestaĵoj.”

Azeno, kiu jam al hom’ similas,  
Statubovo, kiu muĝi kapablas.

Ne diru, ke li similas al homo,  
krom liaj vestaĵoj, turbano kaj vang’.  
Serĉu inter liaj havaĵoj kaj viv’,  
Nenio estas “halal” krom lia sang’! (1)

*(1) La teksto uzas la religian terminon “Halal” (libere uzebla). Ĝi havas kelkajn signifojn. Se oni akiris havaĵon per ĝustaj rimedoj kaj ne ekzemple per ŝtelo, ruzo ktp, ĝi estas “halal”, kaj oni rajtas uzi ĝin. Se ies sango estas “halal”, tio signifas, ke oni rajtas mortigi lin. Sadio uzis tiujn du signifojn en ĉi-tiuj versoj.*

## **Rakonto 26**

Ŝtelisto diris al almozulo: “Ĉu vi ne hontas, kiam por ricevi monon vi etendas vian manon antaŭ ĉiun avaran personon?” La almozulo respondis:

“Prefere mane almozi dirhamojn,  
ol perdi fingrojn por ŝteli kvar gramojn. (1)”

*(1) Laŭ islamo, en certaj kondiĉoj oni tranĉas la manfingrojn de ŝtelisto. Unu el la kondiĉoj estas la pezo de la ŝtelaĵo, kiu devas esti almenaŭ 4 gramoj. Vidu la vortareton !*

## **Rakonto 27**

Oni rakontas pri boksisto, kiu plendis pri la vivkondiĉo kaj lamentis pro la malriĉo ĉe sia patro kaj petis permeson forvojaĝi en serĉo de komforto per brakforto.

Ne uzitaj lerto kaj arto senutilas.  
Incenson oni bruligas, moskon muelas.

La patro admonis: “Ho filo mia, forigu fantaziaĵojn el via kapo kaj metu piedojn de la ŝparemo en la baskon de imune-co. Saĝuloj diras: “Bona vivo ne venas per laborvasto, do havu malpli da drasto!”

Atingi al feliĉ’ per glavo ne indas.  
Ne beligu ties brovon, kiu blindas!  
Iĝas malforta fortulo misfortuna,  
Sorto ol forto estas pli oportuna.  
Se en ĉiu haro estus cento da saĝ’,  
ne utilas se laŭ sorto estus damaĝ’.

La filo insistis: “Ho patro mia, vojaĝo utilas multe: Ĝi igas la humoron bona, kaj la vivon profitdona, oni strangaĵojn vidas aŭ fremdaĵojn aŭdas, oni vizitas belajn lokojn kaj trovas bonajn amikojn, oni povas realigi siajn ambiciojn aŭ pliigi siajn sciojn, kaj eĉ riĉaĵojn kaj havaĵojn, kaj oni ekkonas lertojn kaj ekhavos spertojn. Sufioj diras:

Se vi restas en la butik’ aŭ dom’  
vi ne maturiĝas, ho kruda hom’!  
Iru vojaĝi kaj vidi la mondon  
antaŭ malapero de via nom’! “

La patro konfirmis, ke vojaĝo utilas sed aldonis, ke tio taŭgas por kvin grupoj: Unue komercisto, ĉar li estas riĉa, havas servistinojn belajn kaj sklavojn viglajn. Tagon en urbo, nokton aliloke, li promenas kaj ĝuas la vivon.

Dezert’ aŭ mont’, estas por riĉulo etendo.  
Li povas facile loĝi ĉie en tendo.  
Sed se iu ne povas atingi riĉecon,  
Eĉ en sia urbo li estos en ofendo.

Due por ulemo: Tiu, kiu per dolĉa logiko, flua parolado kaj elokventa rezonado, trovas komplimenton kaj atenton kie ajn li iras.

Saĝa persono similas al pura oro  
Li estas valora kien ajn li vojaĝas  
Nobelido stulta similas al loka mon'  
Neniu eksterlande preni ĝin kuraĝas

Trie por belulino: Kun ŝi deziras interparoli la interno de la homoj. Oni diras: “Beleta mieno pli bone ol multe da bieno.” Oni ankaŭ diras: “Beleco kuracas malordon kaj malfermas ĉiun pardon.” Do, oni invitas ŝin favore kaj servas ŝin elkore!

Belulinon oni akceptas respekte  
se la gepatroj ŝin el la dom' forpelas.  
Inter Koran-paĝoj pavplumon mi vidis,  
Mi diris: “Ĝi altrangas ĉar ĝi ja belas,”  
Ĝi diris: “Silentu! Kiu belas plaĉe  
ĉie ajn neniu vir' kun ŝi kverelas.”

Se la filo belece prominentas,  
Ne gravas, ke lia patr' ne konsentas.  
La perlo pli kostas ol la parlamot',  
Fajnan perlon ja ĉiuj komplimentas.

Kvare por kantisto: Tiu, kiu per sia Davida (1) gorgo haltigas akvofluon kaj birdoflugon. Per sia bela sono li ĉasas ĉiun kantamanton kiel leono kaj por ili estas farenda ĉiu lia ordono.

Miaj oreloj al kant-belec' sin direktas  
Kiu estas tiu, kies kordoj perfektas?

Mola kaj ĉagreneta kanto dolĉas  
al l' oreloj de l' ebriaj amikoj.  
Belkanto pli bonas ol bela vizaĝ',  
Ĉar ĉi estas korpa, tiu en psikoj.

Kvine ankaŭ metiisto: Ili per sia metio ĉie ajn povas gajni sian panon kaj gardi sian famon. Jen saĝa diro:

Se forlasas sian urbon flikisto  
ne suferos fremdlande tre severe.  
Se reĝo foje falas el sia lok',  
Li ja vagos malsate kaj mizere.

Tiuj metioj, ho mia filo, en la vojaĝo kaŭzas certecon kaj vivtenrimedojn. Tiu al kiu mankas ĉiu el tiuj metioj sur la mondo suferos kaj sen nomo kaj famo malaperos.

Se la sort' volas al iu atenci,  
Lin misgvidos la destin' al malutil'.  
Birdon, kiu la neston ne revidos,  
puŝas la sorto al semo kaj kaptil'.

La filo diris: "Ho patro, ĉu vi kontraŭas la saĝulojn, kiuj kredas ke kvankam ĉies pano estas destinita, ankaŭ strebo estas bezonata?" Kaj: "Kvankam la plago probablas, eviti ĝiajn enirejojn necesas."

Sendube vian panon Dio donas,  
Sed prilaboru ĝin per via brako!  
Ekster mortotempo neniu mortas,  
Tamen ne iru al buŝo de l' drako!

En tiu ĉi mia forto, mian adversulon, ĉu elefanto kolera aŭ leono rora, mi venkos. Do, ho mia patro, la bontrovo estas, ke mi ekvojaĝu, ĉar mi ne plu toleri povas la malriĉon.

Ne gravas domoperdo por homo,  
Ĉar ĉie fariĝos lia domo.  
Riĉul' nokte iras al la hejmo,  
Derviŝ' dormas kie venas dormo.

Dirinte tion, li adiaŭis la patron kaj petis lian benon kaj ekiris frustrante al si mem:

Se al artist' neniu monon donas,  
Li iru kie lin neniu konas!

Tiel li iris ĝis la bordo de enorma rivero, kies fluo rulis ŝtonon kaj, kies bruo veturis mejlon.

Akvego sur kiu anas' ne sekuris,  
Eĉ post ĝia flueto ŝtonoj postkuris.

Li renkontis homojn, kiuj post monetpago sidis en ŝipaĉo kun ŝirita flago. Estis neniu groŝo en lia poŝo. Li preĝis cent fojojn ĝis eĉ milo, sed ĉiujn sen ajna utilo.

Sen oro pri perfort' neniu rezonas.  
Kun oro plu forton neniu bezonas .

La senkompata ŝipisto turnante sian vizaĝon ride diris:

“Sen oro oni ne faras maran transporton,  
Unuvira or' superas dekviran forton.”

La junulo, ĉagrenita pro la sarkasmo de la ŝipisto, deziris venĝi sed la ŝipo jam ekveturis. Li kriis: “Se vi konsentas pri mia vesto, mi donas ĝin.” La ŝipisto ekavidis kaj revenigis la ŝipon.

L' avido blindigas eĉ la saĝon,  
Kaj enfaligas birdon en kaĝon.

Tuj kiam la ŝipisto alproksimiĝis, la junulo kaptis lin kaj aŭdace batis. La amiko de la ŝipisto intervenis sed li same liajn batojn ne eltenis. Ne estis alia vojo krom akcepti kunporti lin senpage en ĉi tiu fojo.

Dum kolero nur utilas tolero  
por malpliigo de via sufero.  
Per la dolĉa parolo kaj belkanto,  
Eĉ eblas forporto de elefanto.  
Restu mola se oni akre klaĉas!  
Silkon molan akra glavo ne tranĉas.

Pardonpetante pro antaŭa konduto, la ŝipistoj ekkisis lin hipokrite al liaj okuloj kaj kapo kaj enŝipigis lin. Kiam oni atingis

enakvan kolonon restintan el iu greka konstruaĵo, la piloto diris: “Io okazis al la ŝipo kaj ĝi bezonas riparon. Unu el vi, kiu estas pli forta ol aliaj, iru al tiu kolono kaj tenu la ŝnuron de la ŝipo, por ke ni riparu la ŝipon.” La junulo, pro sia orgojlo, ne pensante pri la ruzo de la ofendita malamiko, akceptis fari tion. Li forgesis jenan rekomendon de la saĝuloj: “Se vi ofendis iun, ne plu sentu vin sekura ĉe tiu, eĉ se vi post la ofendo centfoje faris afablaĵojn. La sago eliras el la vundo, sed ne eliras la memoro pri tiu ago el la korprofundo.”

Ĉefulo prave diris al sia subul’:  
Timigas la respond’ al malamik-stimul’.

Vi ja ne plu sentos sekuron  
se vi malsekure ofendas.  
Ne al remparo ĵetu ŝtonojn,  
La rempar’ ŝtonojn al vi sendas.

Tuj post kiam li turninte la ŝnuron ĉirkaŭ sia brako supreniris la kolonon, la piloto liberigis la ŝnuron kaj komencis ŝipan veturon. La mizera junulo konsterniĝis. Du tagojn li suferis kaj toleris. La trian tagon la dormo superis kaj en la riveron li falis. Post unu tagnokto li troviĝis sur bordo. Li ankoraŭ vivis, do li trivis la arbofoliojn kaj plantradikojn kiujn la naturo kultivis, ĝis li refoje aktivis. Sencele li marŝis sur dezerto kiel bruto, ĝis li venis ĉe akvoputo. Homoj ĉirkaŭis la puton vendante la akvon. Al la junulo mankis mono, do li petegis, sed ne okazis akvdono. Li ekis perforte akiri akvon sed sensukcese. Li batis kelkajn homojn sed la viroj grupe atakis kaj vundis lin.

Malgraŭ elefantaj forto kaj dimensio,  
kuloj batas ĝin en aro de miliono.  
Se formikoj unuiĝas en granda grupo,  
ili senhaŭtigas la korpon de leono.

Sen alia elekto, li postsekvis karavanon. Vespere ili atingis tranoktejon danĝeran pro banditoj. Li rimarkis, ke la karava-

nanoj terure timis. Li proponis: “Ne zorgu ĉar mi estas kun vi kaj sole kontraŭos kvindek banditojn.” La homoj en la karavano kuraĝiĝis pro lia arogo kaj ĝoje donis al li akvon kaj manĝon. Pro la longdaŭra malsato li manĝis kaj trinkis inunde ĝis li dormis profunde. Maljunulo sperta estis en la karavano, kiu diris: “Ho amikoj, mi timas vian akompananton pli ol la ŝtelistojn. Laŭ la rakontoj, arabo kolektis iom da mono kaj pro tio ne povis trankvile dormi, ĉar li timis, ke la ŝtelistoj ŝtelos lian monon. Li invitis amikon akompani lin nokte por forigi la timon. Pasis kelkaj noktoj kaj la amiko ekkonis la lokon de la mono, ŝtelis ĝin kaj foriris. Matene oni vidis la arabon ploran kaj senoran, kaj demandis lin ĉu liajn dirhamojn ŝtelis rabobandano. Li respondis; Ne, damne, ŝtelis mia kunvojano!”

Ekde kiam mi konis la serpenton.  
Pro ĝia eco, mi estis en panik’,  
Al dentdoloro similas fi-amik’,  
Oni toleras malgraŭ la akra pik’.

Eble li mem estas unu el la banditoj, kiun ili sendis inter ni por informi ilin pri la taŭga okazo por ataki nin. Mi proponas, ke ni lin ellasu kaj preterpasu. Al la karavanoj plaĉis la bontrovo de la maljunulo. Ili ekmalŝatis la junulon, lasis lin dormantan kaj foriris. La junulo nur tiam vekigis, kiam la suno brilis sur liaj ŝultroj. Li turnis sian kapon kaj ekrimarkis, ke la karavano jam iris for. Soifa kaj mizera, li falis surteren kaj al si mem flustris:

“Kiu donacas al mi interparolon?  
Ĉu garol’ havas amikon krom garolon?”

Neniu homo fremdulon damaĝis,  
Krom tiu, kiu neniam vojaĝis.

La mizerulo ankoraŭ flustris, kiam aperis ĉe li princo, kiu dum ĉasado foriĝis de aliaj ĉasistoj. La princo staris ĉe li kaj rigardis al li. La junulo ŝajnis vizaĝe bela sed farte malhela. La princo lin demandis de kie li venas kaj al tiu ĉi loko kiel li venis.



La junulo rakontis iom da travivaĵoj siaj. La princo kompatis lin, donis al li kostumon kaj monsumon kaj kunsendis iun kun li al lia urbo. La patro tre ĝojis revidante sian filon kaj dankis Dion. Vespere la filo rakontis al sia patro pri la ŝipo kaj la pilota konduto, malbonaj vilaĝanoj ĉe la akvoputo, kaj malfideleco de la karavananoj en tuto. La patro diris: “Ho mia filo, ĉu mi ne diris al vi, kiam vi volis foriri, ke al la malriĉuloj ne helpas iliaj fortohavaj manoj kaj bravaj organoj?”

Pravis malriĉulo en jena vorto:

“Or-gran’ superas talanton da forto!”

La filo diris: “Ho patro, akiri trezoron postulas suferon, venki malamikon postulas riskon kaj por rikolti oni devas unue semi. Ĉu vi ne vidas, ke mi per iom da turmento kunportis tiom da prudento kaj post iomete da piko de abelo kolektis tiom da mielo?”

Kvankam la pano estas difinita,

Tamen oni devas ĝin perlabori.

Se subakvisto ja timas balenon,

Neniam li rajtas perlon memori.

Subŝtono de la ŝtonmuelilo ne moviĝas, tial la pezon ĝi eltenas.

Forta leon’ en kavfundo kion trovas?

Falinta agl’ sur sekgrundo kion trovas?

Se vi nur enhejman ĉasadon konsilas,

Viaj kruroj al l’ araneaj similas.

La patro respondis: “Ho filo, ĉi-foje la sorto helpis vin kaj la fortuna zorgis, ke altrangulo atingu kaj kompatu vin kaj donu al vi ion. Tia ĉi okazo estas malofta kaj oni ne ĝeneraligu maloftaĵon. Mi avertas vin, ke vi refoje ne avidu pri tiaj aferoj.

Ĉasist’ ne kaptas beston ĉiufoje,

Ankaŭ tigro kaptas ĉasiston malĝoje.

Unu el la persaj reĝoj, kiu havis tre multekostan gemon en sia fingroringo, kun kelkaj kunuloj iris al la preĝkampo de la

urbo Ŝiraz (2). Li ordonis, ke oni instalu lian fingroringon al la pinto de kupolo. Kiu sukcesas trapasigi sian sagon tra la ringtruo, la ringon kaj la gemon oni dediĉos al tiu. Kvarcent arkpafistoj maltrafis. Knabo, kiu surtegmente lude ĵetis sagojn ĉiufanken trafis hazarde per la helpo de orienta vento. Oni donis al li reĝan kostumon kaj multan monsumon. La knabo bruligis la arkon kaj sagojn. Oni demandis lin pri la kialo. Li respondis: “Por ke la komenca prospero restu eterne.”

Okazas, ke filozofarano  
ne povas konsili vorton trafan.  
Okazas, ke mallerta infano  
arkpafas hazarde sagon trafan.

*(1) En la persa literaturo Davido famas i.a. pro sia bela voĉo.*

*(2) Persa urbo, kie vivis Sadio.*

## **Rakonto 28**

Mi aŭdis pri ŝejko, kiu kiel loĝejon elektis kavernon, kaŝis komplete sian vivinternon, kaj al potenculoj aŭ riĉuloj ne havis koncerton.

Kiu permesas al si almozpeti,  
Tiu restos tia ĝis morto sia,  
Se vi lasas la avidon, vi reĝos,  
Via kolo restos longdimensia. (1)

Reganto mesaĝis al li: “Ni atendas, ke la ŝejko pro sia afablo bonvolu konsenti kunmanĝi kun ni.” (2) La ŝejko konsentis, ĉar laŭ la tradicio oni devas akcepti la invitojn, Alian tagon la reganto iris al lia angulo. La ermito ekstaris, brakumis la reganton, kondutis afable kaj faris komplimentojn (3). Post la foriro de la reganto, unu el la kamaradoj de la ŝejko demandis lin: “Kun la reĝo tiom da intimo estis ja kontraŭ via kutimo kaj jam ne vidita?” La ŝejko respondis: “Ĉu vi ne aŭdis jenan eldiron:

Ĉe ies manĝtablo se vi jam sidis,  
Ĉe ties ekapero vi ekstaru!

Orel' ja povas en sia vivtuto  
eviti la ĝuon de harp' aŭ fluto.  
Okul' toleras ne vidi florkorton,  
Cerb' ne perdos pro rozmanko la forton.  
Se kusen' plena de lanugo mankas,  
Kun la dorm' ja kusenbriko amikas.  
Se kunulino sur liton ne venas,  
Brakoj mem brakumi la korpon penas.  
Sed se murmuras malsata stomako,  
Ĝin satigas manĝ', ne nura sumako. (4)

*(1) Longa kolo estas simbolo de fiero, riĉo, nebezono ktp kontraste al la klina kolo/kapo.*

*(2) Teorie estas malpermesite al sufiistoj/derviŝoj akcepti donacojn de regantoj.*

*(3) Dum, teorie, li ne devis agi tiel. Perfektaj homoj ĉiam restas ĉe la flanko de la regatoj, ne regantoj!*

*(4) Arbo kies sekigitan kaj pulvorigitan frukton oni uzas kiel spicon en multaj landoj, interalie en Irano por kebabo. La nomo de la spico estas sama (sumako).*

## Ĉapitro 4

### La Avantaĝoj de Silenteco

#### Rakonto 1

Mi komunikis al amiko kial mi ofte evitas prediki: “Ĉar en la parolo estas kaj bonaj kaj malbonaj vortoj, sed malamikoj vidas nur la malbonajn.” Li diris: “Estas pli bone, ke malamiko ne vidu la bonajn.”

Malamiko ne pasas preter bonulo,  
ne pikante lin per malica okulo.

Ĉe ĵaluzul’ mia art’ kaŭzas ploron,  
Kvankam floras Sadi’ kaj donas floron.

Ĉu la sunon povas percepti talpo  
per sia limigita blinda palpo?

#### Rakonto 2

Komercisto perdis mil dinarojn. Li ordonis al sia filo: “Pri tio diru al neniu!” La filo demandis: “Tio estas via ordono kaj do mi ne diros, sed bonvolu diri al mi pri la profito ricevota de tiu kaŝado.” Li respondis: “Por ke la ĉagreno ne duobliĝu: perdo de dinaroj kaj riproĉo de najbaroj!”

Kaŝu vian perdon de malamiko,  
Li ja ĝojus per kanto kaj muziko.

#### Rakonto 3

Estis foje saĝa junulo, kiu havis bonan edukon sed obsedan karakteron. Li kondukis timide kaj silentis kunside. Lia patro demandis lin, kial li en la kunsido de kleruloj diras nenion el siaj sciaĵoj. La filo respondis: “Mi timas la honton, se oni demandos min pri io, kion mi ne scias.”

Ĉu vi ne aŭdis, ke iam derviŝo  
riparis per najloj sian sandalon.  
Lian manon ekkaptis generalo:  
“Por huf-feri venu en mian stalon!”

#### **Rakonto 4**

Fama teologo diskutis kun unu el sendiuloj; Dio nur malbenu ilin. Li ne povis konvinki kaj venki, do li haltigis la diskuton kaj revenis. Iu demandis lin kial li, malgraŭ sia ampleksa scio, ne konvinkis la senreligiulon? Li respondis: “Mia scienco estas el Korano, kaj paroloj de sanktuloj kaj ŝejkoj, kiujn li ne kredas kaj ne aŭskultas. Ĉu liaj sendiaĵoj utilas por mi?”


Se per religiaĵoj vi ne sukcesas,  
Provu silenton ĉar silent’ necesas.

#### **Rakonto 5**

Galeno (el Pergamo, 1) vidis, ke kreteno kverelas kun saĝulo kaj insultas lin. Galeno diris: “Vera saĝulo ne kverelas kun mal-saĝulo.”

Du saĝuloj inter si ne kverelas,  
Ankaŭ ne kun tiu, kiu malkleras.  
Se idioto parolas malbone,  
La saĝul’ devas komplezi sindone.  
Bonuloj dum diskuto ne misfaras,  
Eĉ kiam ilia rilat’ malklaras.  
Se idiotoj plenumas debaton,  
Ili ŝiras eĉ tre firman rilaton.  
Miskondutulo al iu blasfemis,  
Tiu diris ĉar sakri li ne emis:  
“Mi ja pli malbonas ol vi mencias.  
Miajn difektojn mi pli bone scias.”

*(1) Romia kuracisto, kirurgo kaj filozofo (129–210 p.K.).*



## **Rakonto 6**

Sahban Vael (1) estis unika oratoro ĉar dum jaro da paroladoj li ne ripetis eĉ unu esprimon kaj kapablis rakonti saman aferon per aliaj vortoj. Kaj tio estas kutimo ĉe korteganoj.

La vorton, eĉ se ĝi dolĉas kaj bonas,  
eĉ se oni ĝin jesas kaj rekonas,  
ne ripetu! Unu fojo sufiĉas.  
Eĉ kuk' duafoje je plaĉ' malriĉas.

*(1) Arab(lingv)a oratoro, fama pro sia elokventeco (?– 674 p.K.)*

## **Rakonto 7**

Mi aŭdis saĝulon, kiu diris: “Neniel iu sian malsaĝecon konfesas, krom se li ekparolas dum alia parolas kaj ankoraŭ ne ĉesas.”

Parolo havas komencon kaj morton,  
Dum iu parolas, ne diru vorton!  
Ne parolas homo inteligenta,  
kiam alia estas malsilenta.

## **Rakonto 8**

Korteganoj de Sultano Mahmud (1) demandis la ministron Hasan Mejmandi (2): “Kion diris la sultano pri tiu afero?”

– “Ankaŭ vi scias tion!”

– “Ho ne! Kion diras la sultano al vi, tion li neniam diras al ni.”

– “Li konfidis al mi ĉar li certas ke mi ne citos al iu. Do, kial vi demandas?”

Ne rediru ion ajn sed distingu!  
La reĝan koleron antaŭestingu!

*(1) La unua kaj potenca reĝo de la Gaznavida dinastio, kiu regis inter 998 kaj 1030. Vidu la vortareton!*

*(2) Fama ministro de Mahmud kaj de lia filo Masud. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 9**

Mi estis dubanta ĉu subskribi aĉetkontrakton de domo. Judo rekomendis: “Mi estas samkvartalano. Mi konas bone la domon.

Aĉetu ĝin! Ĝi havas nenian difekton.” Mi respondis: “Krom, ke vi fariĝos mia najbaro.”

Domo, en kies najbaro vi loĝas,  
Dek dirhamojn (1) aŭ similon valoras.  
Tamen oni certe povas esperi,  
Post via morto ĝi milon valoras.

*(1) Monunuo. Vidu la vortareton!*

## **Rakonto 10**

Poeto ĉe la estron de banditoj iris kaj laŭdis lin per poezio. La estro senvestigis la poeton kaj forpelis lin el la vilaĝo. La povra poeto marŝis en la malvarmo kaj hundoj postsekvis lin. La poeto volis per ŝtoneto forpeli la hundojn sed la tero frostis kaj ne eblis elpreni ŝtoneton. Li insultis: “Kia bastarda popolo! Ili ligis la ŝtonojn sed malligis la hundojn!”

La estro el sia ĉambro vidis kaj aŭdis kaj ride diris: “Ho saĝulo, petu ion ajn!”

La poeto respondis: “Redonu al mi mian propran veston! La plej bona donaco estas mia forlaso!”

Oni esperas, ke l’ homoj aliajn helpu,  
Mi ne deziras vian helpon, ne malhelpu!

La banditestro kompatis lin kaj redonis lian veston plus peltan veston kaj iom da mono.

## **Rakonto 11**

Ĉielsciencisto alvenis hejmen kaj vidis fremdulon, kiu sidas kun lia edzino. Li diris insulton kaj estigis tumulton. Saĝulo informite pri tio, diris:

“Ĉu vi vere scias stelofazojn  
ne sciante viajn hejmokazojn?”



## Rakonto 12

Raŭka predikisto supozis sin belvoĉa oratoro kaj ĝenis homojn per sia malfavoro. Li parolis korvakre. Kvazaŭ la Korana verso dirus pri li “**vere la plej malagrabla voĉo**”(1)

Se la retoro azene ekbruas,  
la bleko la urbon Estaĥr (2) detruas.

La vilaĝanoj, pro lia alta rango, toleris kaj ne forpeli lin preferis. Hazarde vizitis lin alia predikanto, kiu kaŝe estis lia kritikanto.

Ekdiris la amiko: “Mi sonĝis pri vi. Espereble tio bonaŭguras.”

Demandis la predikisto: “Kion vi sonĝis?”

Respondis la amiko: “Mi sonĝis, ke vi havas tre belan voĉon kaj ricevas admiron de la homoj.”

La predikisto iom pensis kaj respondis: Pro via sonĝo, mi dankas! Vi sciigis al mi, kio al mi mankas. Evidente mi havas malbelan voĉon kaj homoj suferas pro mia laŭta voĉo. Mi pentas, kaj ne plu parolos krom mallaŭte.

Ne verdire al vi amikas,  
Kiu al vi nur komplimentas.  
Ĉe kiu vi ĉiam perfektas,  
Tiu veron ja ne prezentas.  
Malamikon senhontan serĉu!  
Kies kritikoj ja aŭtentas.

Se kritikojn vi ne aŭskultas,  
Ne perfektas vi sed nur stultas.

(1) *La Nobla Korano, ĉapitro 31, verso 20.*

(2) *Antikva nun ruina urbo proksime al Persepolo.*



### **Rakonto 13**

Muezino kriis missonne en la moskeo de Senĝar (1). Liajn kriojn malŝatis la aŭdantoj. La moskeestro estis bonkora kaj justa emiro. Li ne volis ofendi la muezinon, tial li proponis: “Kara muezino, en tiu ĉi moskeo laboris eksmuezinoj al kiuj mi pagis

po kvin dinarojn. Al vi mi donas dek dinarojn por ke vi iru al alia moskeo.”

Ili interkonsentis kaj la muezino foriris. Sed li revenis post iom da tempo kaj renkontante la emiron rakontis: “Ho via emira moŝto, mi bedaŭras, ke vi per dek dinaroj forpelis min! Tie, kie mi nun laboras, oni proponas al mi dudek dinarojn por ke mi iru aliloken, sed mi ne akceptas.”

La emiro laŭte ridis kaj avertis: “Ho, neniel akceptu! Baldaŭ ili proponos eĉ kvindek!”

Granit’ ne skrapigās per adzo tiel,  
kiel, per via voĉo, mia orel’.

*(1) Urbo en Irako kun Jezidisma plimulto.*

## **Rakonto 14**

Misvoĉulo legis la Koranon laŭte. Sciulo preterpasis kaj diris: “Kiom estas via monata salajro?” Li respondis: “Neniom.” Li demandis: “Kial do vi penigas vin tiel?” Li respondis: “Por Dio mi legas.” Li diris: “Pro Dio ne legu!”

Tiom aĉe laŭtlegi Koranon,  
ŝokas vere eĉ neislamanon.

# Ĉapitro 5

## La Amo kaj Junaĝo

### Rakonto 1

Hasan Mejmandi (1) estis demandata: “Sultano Mahmud (2) posedas multajn belajn sklavojn el kiuj ĉiu havas apartan belecon. Kaj Ajazo (3) ne havas superecon al la aliaj. Kio estas la kialo de la okazo, ke lia amo estas pleja al Ajazo?”

Li respondis: “Kiu estas al la koro plaĉa, tiun la okuloj vidas malaĉa.”

Kiu al sultano plaĉas,  
tiun neniu riproĉas.  
Kiun la ŝaho malŝatas,  
tiu ja ne estimatas.

Se vi pesimiste rigardas al Jozef’  
en lia beleco venas granda dubo.  
Se vi optimiste rigardas al demon’,  
lia beleco ŝajnas kiel Kerubo.

*(1) Persa veziro de Sultano Mahmud (mortis 1032 p.K.).  
Vidu la vortareton!*

*(2) Sultano Mahmud Gaznavi (971–1030 p.K.) estis la plej  
elstara reĝo de la Gaznavida dinastio. Vidu la vortareton!*

*(3) Sklavo, servisto, kaj poste generalo, de Sultano Mahmud.  
En la persa literaturo multas rakontoj pri samseks-amrilatoj in-  
ter ili. Vidu la vortareton!*

### Rakonto 2

Oni diras, ke altrangulo havis serviston al kiu li bone rilatis pro samkredeco kaj amikeco. Tamen, iutage li plendis ĉe amiko pri sia servisto, ke li kondukas malĝentile kaj impertinente mal-

graŭ virtoj kaj bonecoj, kiujn li havas. La amiko konsilis: “Frato mia, se vi amikiĝis kun via servisto, ne plu bonan servadon atendu!” Kie temas pri amanto kaj amato, tie ne plu oni parolas pri posedanto kaj posedato.

Se sklavisto ludas kaj ridas  
kun sklavo, kiu belas rave.  
Ne miru se la sklav’ ordonas  
kaj la estro obeas sklave!

### **Rakonto 3**

Mi renkontis piulon, kiu okupiĝis pri amrilato kaj povis nek pacienci, nek rakonti pri sia stato. Tamen ju pli li ricevis riproĉon kaj punvoĉon, des malpli li volis forlasi sian amon. Li diris:

“Mi neniam ĉesos peti vian manon  
eĉ minacate per akrega tranĉilo.  
Al vi mem mi alfuĝas se mi elfuĝas,  
Krom vi estas nek rifuĝej’, nek azilo.”

Nu, mi riproĉis lin: “Kie via kara saĝo estas dum via malkara volupto tempestas?”

Li post iom da pensado respondis:

“Ne restas, kiam aperas la reĝamo (1),  
ja forto en la brakoj de la kredo (2).  
Enfalinta ĝiskole en la koton (3),  
kiel mizerul’ ĉastus sur la planedo?”

(1) *Amo similigita al sultano.*

(2) *Amo superas kredon.*

(3) *Amo similigita al koto. La literatura negativa demando: ne eblas falinte en amon plu vivi ĉaste.*

### **Rakonto 4**

Iu en amon falis, kaj lia vivo ne plu normalis. Lia amato estis en neatingebla loko, kies alproksimiĝo havis riskon de sufoko

(1). Nek la amo estis sufero adaptebla, nek la amato estis birdo kaptebla.

Se vi ne ricevos de l' amat' aprezon,  
ĉe vi or' kaj tero havos saman prezon.

Nu, oni riproĉegis lin: “Lasu tiun ĉi nerealigeblan fantazion ĉar multajn homojn pro simila deziro oni malserenigis kaj enkaŝtenigis. Li ĝemis kaj diris:

“Ho amikoj, bonvolu min ne admoni,  
ĉar neniun plu volas mi ekkoni.  
Militistoj mortigas malamikojn  
per la forto, kaj beluloj amikojn (2).

Ne estas laŭ fideleco, por havi bonan staton ĉesi ami la amaton.

Kiu ja nur pri si mem pripensas,  
ties amo nepre ne intensas.  
Kial pro l' neatingo suferi?  
Estas dece sin pro l' am' oferi.

Aŭ mia mano atingos lian manikon,  
Aŭ mi mortos elserĉante tiun amikon.”

Familianoj pri lia stato angoris kaj por helpi lin fervoris. Ili provis admonon kaj eĉ prizanon. Tamen nenio utilis.

Ho ve, ke l' kuracist' paciencon receptas,  
dum la deziranimo sukeron voluptas (3).

Ĉu vi l' diron de amat' aŭdis  
kiam al l' amanto li plendis:  
“Dum vi sole por vi valoras  
pri mi vi ne multe fervoras.”

Oni rakontis, ke la princo informiĝis pri tiu junulo, kiu insistas pri la amo kaj, ke li estas junulo talenta kaj elokventa, kiu belajn vortojn eldiras, arde deziras kaj perturbe admiras. La prin-

co komprenis, ke li estas la origino kaj destino de tiu inklino. Do li ekrajdis al la amanto. La amanta junulo ekplore lamentis, vidante la princon, kiu alproksimiĝis:

“Kiu ammortigis min, ties piedoj batas.  
Ĉu li ĉeeste sian mortigiton kompatas?”

La princo afable demandis lin pri liaj deveno, nomo, sinokupo, sed la amo tiom absorbis la amanton, ke li tute ne estis konscia.

Se vi bone recitas la tutan Koranon,  
Alfabeton vi forgesas, post fal’ en amon.

La princo demandis lin: “Kial vi ne parolas kun mi? Ja mi apartenas al la rondo de derviŝoj, eĉ ilian orelingon mi alportas (4).” Nur tiam la amanto pro la amvortoj de la amato, aŭdacis levi la kapon de la perturbaj sentoj kaj diri ion:

“Strange, ke ĉe via ekzist’, mi ekzistas ankoraŭ!  
Vi ekparolas kaj mi vortojn posedas ankoraŭ!”

Dirinte tiujn vortojn li eligis krieton kaj tuj cedis la animon al Dio.

Min mirigas ne mortinto pro am’.  
Min mirigas la vivanto tiam.

*(1) Poste ni ekscios, ke la amato estis princo. La persa lingvo ne distingas inter li kaj ŝi.*

*(2) La amato en miaj revoj brakumis min kaj senvoligis min. Nun mi estas kvazaŭ ĉasita kadavro por li sen ia ajn volo kontraŭ lia volo.*

*(3) Vortludo per SABR kaj ŜEKAR. SABR= pacienco, kaj ankaŭ aloo (kuracplanto kaj ankaŭ simbolo de amareco) kaj ŜEKAR= sukero. La kuracisto receptis aloon/paciencon (ambigue), kiu estas maldolĉa kaj saniga, sed mi bezonas atingon al mia amiko, kiu estas dolĉa kaj malsaniga kiel sukero. Kial malsaniga? Ĉar la amato estas filo de ŝaho, do, danĝera amo.*

*(4) Havi ies ringon en sia orelo signifas aparteni al tiu grupo.*

## Rakonto 5

Instruisto havis lernanton, sone kaj persone belan. Pro sia vira naturo, la instruisto aparte rilatis al lia altira staturo! Ĉe punoj aŭ malfacilaj taskoj, la instruisto ĉiam esceptis ĉi tiun lernanton. Kiam li trovis la knabon sola, li amflustris:

Absorbis min via eden-vizaĝ'  
kaj restis al mi neniom da saĝ'.  
Fermi okulojn al vi ne eblas,  
Eĉ se oni per arksag' min celas.

Foje la knabo petis la instruiston: “Vi sufiĉe bone zorgas pri miaj lecionoj, mi petas vin ankaŭ bonvole observi miajn kondutojn. Se vi vidas malbonan konduton, kiun mi supozas bona, bonvole sciigu min, por ke mi korektu ĝin.” La instruisto respondis: “Ho knabo! Pri tio petu alian! En miaj okuloj vi estas perfekta!

Ne benatas malicaj okuloj,  
kiuj rigardas nur al makuloj.  
Cent makuloj kaj ununura art',  
Nur l' arton vidas amika rigard'.

## Rakonto 6


Nokton mi rememoras, kiam kara amikino travenis la pordon; tiel embarasite mi ekstaris, ke mian lampon mi estingis per la maniko.

Venis amikino pro kies brilo foriras mallum',  
Min mirigas mia sort': de kie venis tia fortun' ?

Ŝi eksidis kaj riproĉon komencis: “Kial vi estingis la lampon, kiam vi vidis min?” Mi diris: “Pro du kialoj: unue mi pensis, ke la suno leviĝas kaj krome mi rememoris jenajn versojn miajn:”



Se abelo venas al via kandel',  
ekstaru kaj mortigu la abelon,  
kaj se venas ridantino plaĉlipa  
prenu ŝin kaj mortigu la kandelon."



## **Rakonto 7**

Iu diris al amiko, kiu longtempe estis for: “Al mi vi mankas.”  
La amiko respondis: “Manko pli bonas ol enuo.”

Malfrue venis ho vi dolĉulin’!  
Sed mi ne tre frue ellasos vin.  
Pli bonas fojfoja aperantin’  
ol tiu, kiu enuigas nin.

Amata knabo, kiu venas por viziti kun siaj amikoj, venas por  
malamuzi, ĉar liaj amikoj povas ĵaluzi kaj misuzi.

Kiam vi kun viaj amikoj al mi revenas,  
vi venas kvereli eĉ se vi pace mienas.

Momente se li kun aliaj kunvenas,  
la ĵaluzo tre baldaŭ min ja venenas.  
Li ride diras:”Ho Sadi’, mi kandelas!  
Mi ne kompatas se papilio brulas.”

## **Rakonto 8**

Mi memoras, ke iam intima amiko, kiel mano kaj maniko,  
post longa foresto aperis kun kritiko, kial mi dume ne sendis al li  
kurieron. Mi respondis: “Kiel mi eltenus la domaĝon, ke la sen-  
dito donante la mesaĝon rigardus vian vizaĝon dum mi ne havas  
tiun avantaĝon?”

Ne trudu penton al mi de la amo,  
Eĉ glavo ne kapblas je la samo.  
Mi ĵaluzas se li vin satrigardas,  
Ĉiam al vi sen satiĝo mi ardas.

## **Rakonto 9**

Estis foje ulemo pro kies ulemo oni mokis lin kaj en riproĉon  
lokis lin. Subtile mi kritikis lin: “Mi scias, ke via emo kaj via

amtona voĉo pri tiu amato estas platona amo kaj ne alia gamo. Tamen al ulemego decas nek pri tia afero akuziĝi, nek kiel malpia modelpastro uziĝi.”

Li ĝemis: “Ho amiko, amiku kaj ne moku! Mi multe la afe-ron ĉirkaŭvidis kaj finfine decidis, ke mi povas toleri neavidon sed ne nevidon. Mi foje aŭdis sciulon, kiu diris: “Pli facilas por la koro asketi ol por la okulo amaton ne enketi.”

Tiu, sen kiu malbonege mi fartas,  
ties senatenton mi enkore portas.  
Iun tagon ĉe li mi multe malkvietis,  
Mil tagojn pro tio mi ja pardonpetis.  
La amanto pri la amato ne plendas.  
Ties volo valoras kaj ne ofendas.  
Se li min afable alvokas, mi ĝojas!  
Se li min malmilde forpelas, mi ojas!

## **Rakonto 10**

En la juneco-printempo, kiel ofte okazas dum tiu tempo, kun bela knabo mi umadis. Lia voĉo estis dolĉa kaj lia korpo plaĉa.

Li donis vivon per la vizaĝkando.  
Kiel kando estis lia liprando.

Tamen foje, li nekutime tiom malbone kondutis, ke ties malplaĉo absolutis. Mi estingis mian flamon, deprenis mian amon kaj diris:

“Iru kaj faru kion vi volas!  
Se ne min, amu kiun vi volas!”

Kaj li iris kaj la jenan diris:

“Se vespert’ ne ŝatas sunon,  
Suno ne alfrontas punon.”

Dirinte tion li foriris kaj pro tio mi sopiris.

Mi perdis kunectempon, ja ni neglektas  
la valoron de ĝojo, antaŭ malĝojo.

Revenu kaj murdu min, ja morto ĉe vi  
Pli bonas ol vivon trivi poste de vi

Dion mi dankis ke li revenis. Sed la aĝo kaj damaĝo ŝanĝis  
lian gorĝon Davidan kaj lian vizaĝon Jakobidan (1). Sur lia adam-  
pomo cidonia lanugo kreskis kaj lia belec-bazaro fiaskis. Li mian  
ĉirkaŭprenon volis sed mi lin forpelis kaj aldonis:

“Kiam vi havis dolĉajn molajn harojn  
al miaj rigardoj vi metis barojn.  
Hodiaŭ vi ja volas reamori,  
kiam vi rememorigas barbarojn?”

Flaviĝis viaj folioj: l' eksprintemp'.  
Aridas vi nun, pasis via ard-temp'.  
Kial vi pav-koketas kaj fazan-marŝas?  
Ĉu vi supozas, ke mi ree alpaŝas?  
Al tiu aliru, kiu vin varmpetas!  
Koketu ĉe tiu, kiu vin dorlotas!

Gazono, oni diras, en ĝarden' bonas;  
scianto de la senco la celon konas.  
Se vi plian klarigon postulas, jen ĝi:  
Verdaj lipharoj (2) pli da amoro donas.  
Ĉar ŝenoprazo (3) multe kreskas postraze,  
via ĝardeno tiun planton deponas.

Se vi lasas aŭ razas, ne diferencas,  
Ĉiukaze nek bel', nek viv' pacienas  
Nek kontraŭeblas elkresko de la haroj,  
Nek kontraŭeblas forflugo de la jaroj,

Mi demandis lin: “Kial via belo  
ŝanĝiĝis al formikoj sur la luno (4)?”  
Li diris: “Mi ne scias la kialon.  
Eble funebr' estas por mia junoo.”

(1) *En la persa literaturo, la voĉo de Davido simbolas la absolutan homvoĉan belecon kaj la vizaĝo de Jozefo, filo de Jakobo, simbolas la absolutan viran belecon.*

(2) *Verdaj lipharoj ĉe puberaj knaboj (foje knabinoj) karakterizas la amorplezuron.*

(3) *Ŝenoprazo aperas ankaŭ en aliaj verkoj de Sadio kiel simbolo de senvalora planto kiu rapide kaj abunde kreskas. En tiu ĉi verso ĝi aludas al barboplena vizaĝo.*

(4) *Kial li havas tian taŭzitan nigran barbon.*

## **Rakonto 11**

Oni demandis arabiĝintan arabon (1) de Bagdado: “Kion vi opinias pri junuloj, kiuj ankoraŭ ne havas barbon?”

Li respondis: “Ili ne havas avantaĝon. Dum ili mildas, ili malmildas; kaj kiam ili malmildas, ili mildas.” Tio signifas, ke kiam ili estas delikatkorpaj kaj mildvizaĝaj ili kondutas akre kaj perforte, sed kiam ili fariĝas pli aĝaj kaj ilia korpo fariĝas malde likata, ili kondutas milde kaj afable.

Kiam senbarbula korp’ dolĉe glatas,  
tiam li akre maldolĉe parolas.

Kiam estas barbo kaj vire statas,  
tiam li afable mole kaĵolas.

(1) *Laŭ la araba genealogio, oni distingas la arabdevenajn arabojn de la arabiĝintaj araboj.*

## **Rakonto 12**

Ulemon oni demandis: “Viro kaj belulino sidis sole. La pordojn li fermis kaj la rivaloj jam dormis, la animo voluptas kaj la volupto dominas, kiel araboj diras: “La daktilo maturas kaj la daktilĝardenisto ne murmuris.” Ĉu tiu viro estas kapabla sin savi de tiu situacio per sia pio? La ulemo respondis: “Se li savos sin de tiu puŝo, li ne savos sin de via buŝo.”

El diablaj tentoj ja eblas elkaviĝi.  
De diablaj onidiroj ne eblas saviĝi.

Facilas forpeli muŝojn de domoj.  
Malfacilas fermi buŝojn de homoj.

### **Rakonto 13**

Grandan korvon kaj papagon oni metis kune en kaĝon. La papago suferis pro la malbela vizaĝo de la korvo kaj flustris: “Kia malbela vizaĝo, kia abomena pejzaĝo, kia malbenita kaĝo, kia damaĝita saĝo! Ho kaŭzo de disiĝo (1), se nur estus inter vi kaj mi distanco de la mateniĝo kaj vesperiĝo!

Se matene iu vekigigas ĉe vi,  
Ties maten’ nigriĝas kiel vesper’.  
Por vi taŭgas malbenito kiel vi,  
Sed kie troviĝas tia sur la ter’? “

Strange, ke ankaŭ la korvo ekenuis kaj malŝatis kunesti kun la papago. Ĝi plendis pri sia sorto kaj lamentis: “Ho ve, kia inversa vivo kaj perversa drivo! Estus dece se mi anstataŭ tiu vulturo kun alia korvo de bela staturato sur la ĝardenmuro ame marŝus.”

Bonulon sufiĉe punus la fatalo,  
se li estus samstalano de brutalo.

Ho ve, mi ne scias kiun malbonon mi faris, ke oni min firekompetence punas per kunparolo kun tiu ĉi ŝovenisto, egoisto, sadisto, kaj fanfaronisto.

Fiŝo evitas en lok’ la naĝon,  
kiu reflektas vian vizaĝon.  
Se vi loĝas iam en edeno,  
Fuĝas la aliaj al geheno.

Tiun ĉi rakonton mi rakontis por sciigi, ke se saĝulo malŝatas malsaĝulon, malsaĝulo centoble malŝatas saĝulon.

Piul' ĉeestis dancon de derviŝoj.  
Balĥa (2) belul' al li diris sarkasme:  
"Malplaĉas ridanta mevo al fiŝoj,  
Se vi enuas, ne sidu plu spasme!"

Aro da rozoj kaj tulipoj kunas,  
vi kiel seka branĉ' maloportunas,  
kiel neĝ' sidas, kiel glaci' firmas,  
malvarme frid' aĉas, kiel vent' tajfunas.

*(1) La frazo estas en la araba lingvo. La esprimo "korvo de disiĝo" oftas en la arabaj kaj persaj versoj. Oni rilatigas la disiĝon inter la (ge)amantoj al la korvo. Tial la korvon mem oni konsideris kiel malbonaŭguran birdon kaj simbolon de disiĝo.*

*(2) Balĥo estas urbo en Afganio.*

## **Rakonto 14**

Amiko, kunvojaĝinto, kunmanĝinto kaj dume intimiĝinto, finfine pro eta prefero forlasis min en sufero kaj forpasis nia afero. Tamen inklino ankoraŭ restis ambaŭflanke. Iam oni laŭtleĝis tiujn ĉi miajn versarojn:

Se mia kara amatin' salridas (1),  
sur la vundoj tiu salo eksidas (2).  
Mi sentas feliĉon ĉar mi havas vin,  
kiel ŝtelistoj juvelojn avidas.

Tiuj bonkoraj amikoj, ne pro subtileco de miaj distikoj sed pro siaj aŭtentikaj radikoj, sen polemikoj kaj kritikoj, miajn poemojn aplaudis. Intertempe mia eksamiko la okazon uzis kaj troige min aprezis kaj pro ĉeso de nia rilato bedaŭris kaj sin ekskuzis. Mi konstatis, ke li ŝatas reveni al la antaŭa stato, do mi sendis jenajn versojn kaj ni denove enpaciĝis:

Ni estis ĉiam fidela paro, ĉu ne?  
Nin ja trafis ne bela faro, ĉu ne?  
Mi volis esti ĉiam kun vi, kara,  
Sed ne eblis pro via raro, ĉu ne?  
Ne gravas, se vi deziras, revenu!  
Revenint' havas pli da karo, ĉu ne?

(1) *En la persa literaturo kaj sukerrido kaj salrido signifas dolĉan kaj plaĉan rid(et)on.*

(2) *Verŝi salon sur vundon kompreneble pliigas la doloron kaj tio estas plaĉa se temas pri amdoloro!*

## **Rakonto 15**

Ies juna bela edzino mortis kaj laŭtradicie ŝia maljuna patrino restis liahejme. Kunparoladon kun ŝi li devis akcepti kaj kontakton kun ŝi li ne povis eviti, ĝis aro da amikoj venis por lin viziti.

Unu el ili demandis: “Kiel vi fartas dum la foresto de via karulino?”

Li respondis: “Ne vidi edzinon por mi ne estas tiom malagrabla, kiom vidi ŝian patrino!”

Restis dorno kaj forpreniĝis floro,  
Restis serpent' kaj rabiĝis trezoro.  
Plibonas vidi l' okulon sur lanco  
ol vidi malamikon de distanco.  
Kun mil amikoj ĉesigi rilaton  
preferindas ol vidi malŝataton.

## **Rakonto 16**

Mi memoras, ke en mia junaĝo mi frekventis straton kie kun vizaĝo mi havis amrilaton. Tage de Tamuz (1), kies varmego alportas fuŝon en la buŝon kaj bolon en la medolon, mi ne plu eltenis la sunan tagmezon pro homa malforto, kaj tial mi fuĝis



al murombro. Mi atendis iun, kiu estingu ĉe mi la fajron de Tamuz per malvarmeta akvo. Subite lumiĝis la malhelo de koridoro per apero de lumanta vizaĝo por kies beleco stranga mankas esprimkapablo langa. Kvazaŭ en noktomezo suno lumus aŭ dum polusa nigro oni eternecakvon konsumus (2). En ŝia (3) mano estis pokalo da neĝsorbeto dolĉigita per sukero kaj aromigita per herbero. Mi ne scias ĉu estis la bonodoro de rozakvo aŭ de kelkaj ŝvitgutoj el ŝia vizaĝo! Tuj mi la pokalon el ŝia mano prenis, kaj trinkinte la akvon al normala stato mi revenis.

Tre fortunus ties sort', kies vido  
matene turniĝas al vi direkte.  
Vin-ebria noktmeze ekvekiĝas,  
Ebria de l' verŝistin'; resurekte.

*(1) Tamuz estas antikva babilona monato, kiu komenciĝas en la somera solstico.*

*(2) En la persa literaturo, la norda poluso estas loko de daŭra nokto, tre malluma, kie troveblas speciala akvo, kiu donas eternecon al tiu, kiu ĝin trinkas. Aleksandro la granda estis unu el ĝiaj serĉantoj.*

*(3) La persa lingvo ne konas apartajn pronomojn kiel la esperantaj li/ŝi. Nur laŭ la kunteksto oni povas diveni ĉu temas pri li aŭ ŝi.*

## **Rakonto 17**

En la jaro kiam Mohammad Ĥarazmŝah (1), Dian gracon al li, faris pactraktaton kun Ĥitaanoj (2), mi vizitis la grandan moskeon de Kaŝgar (3). Tie mi vidis belan knabon, kiu studis la araban. Li havis vizaĝon tre belan kaj staturon vere fabelan. Mi povas priskribi lin nur per jena fama esprimo:

Oni instruis vin koketi tiel,  
ke el via staturato gutas miel'.  
Vi rabas korojn kiel faras fein',  
Ĉu vi eble iam falis el ĉiel'?



Li havis la libron de Zamahšari (4), La Rudimento de la Sintakso, en sia mano kaj ripetadis: “Zejd batis Amr-on (5) , ĉe bati ne forgesu transitivon, ĉe Amr ne forgesu akuzativon...”

Mi kompatis lin jene: “Ho knabo, Ĥarazmo kaj Ĥitao en-paciĝis, sed ĉu ĉe vi Zejdo kaj Amro ankoraŭ malamikas?”

Li ridis kaj min pri mia naskiĝurbo demandis. Mi respondis: “Lando de Ŝiraz.” Li petis ion de Sadio. Mi donacis:

“Min suferigas sintakso atakante.

Kvazaŭ inter Zejd kaj Amr, estus atakaĉ’!

Li tiras la baskon, ne levas la ĉapelon (6),

Kvazaŭ li hontus preni l’ ĉapelon de kaĉ’!”

Li iom ekpensis kaj petis: “Oftas liaj persaj poemoj en mia lando. Se vi citos persan, mi pli bone komprenos. Parolu kun homoj laŭ iliaj saĝoj (7).” Mi diris:

“Ĉar via humor’ sintakson ekpetas,  
mia kor’ paciencon eltapetas.  
Mi kaj l’amistoj okupiĝas pri vi,  
Sed vi ame Amro-zejdon ripetas.

Frumatene, kiam mi decidis ekvojaĝi, oni informis lin, ke mi estas Sadio. Li kuris al mi kaj afablatone bedaŭris, ke mi pli frue ne prezentis min al li. Li diris: “Alie mi servus vin plu.” Mi respondis: “Kiam vi ĉeestas, mi ne diros kiu mi estas.” Li petis: “Ĉu vi povus plu resti, por ke ni kaj servu vin kaj lernu de vi?” Mi neis laŭ tiu ĉi rakonto:

“Mi vidis piulon sur monto  
en kavo sed ja en kontento.  
Veni al urbo mi petis lin  
por helpi al viro kaj virin’.  
Li neis: “La urbo belplenas,  
eĉ elefant’ ne sin detenas.”

Dirinte tion, ni kisis unu la alian sur la kapo kaj vangoj kaj adiaŭis.

Survange kisi amikon tre duras,  
kiam vi samtempe ekforveturas.  
Pomo tial flavruĝas sur du vangoj,  
ke el ĝarden’ devige ĝi elkuras.

Se mi justas en amikec’, vivdaŭro  
haltos ĉe amik-disiĝ’ kun bedaŭro.

*(1) Fama reĝo de la dinastio Ĥarazmŝahoj. La sunaisma dinastio, origine el Mamlukoj kaj turkaj subuloj de la bagdadaj kalifoj, regis Persion inter 1077 kaj 1231 p.K..*

(2) *La Kara-Ĥitanaĵoj Ĥanoj (1124–1218 p.K.) estis Imperio en Centra Azio.*

(3) *Kaŝgar aŭ Kaŝi estas ĉina urbo en la aŭtonoma provinco Ŝjingĵiango (Sinkiango).*

(4) *Al-Zamaĥŝario, ekzegezisto pri la Korano, teologo, filologo, filozofo, gramatikisto, primoralstudemulo, mezepoka erudiciulo (1074–1144 p.K.). Lia fama libro estas Muqaddimat al-adab (Enkonduko al literaturo, Araba-Ĥarazma vortaro kaj lernolibro de la araba lingvo).*

(5) *Zejd kaj Amr aŭ Esperante Zejdo kaj Amro estas virnoj oftaj en la arabaj landoj kaj plej uzataj en arabaj lernolibroj. En la moka formo “Amrozejdumi” signifas sin tro okupi pri tedaj, etaj, ofte senutilaj, sintaksaĵoj aŭ gramatikaĵoj.*

(6) *Originale anstataŭ ĉapo estas kapo. Figurasence estas fiere marŝi, esti egoista.*

(7) *Ebla citaĵo de Mohamedo aŭ Ali.*

## **Rakonto 18**

Derviŝo (1) estis en nia karavano al Heĝazo (2). Araba emiro jam donis al li cent dinarojn por oferi. Ŝtelistoj el Ĥafaĝa (3) atakis la karavanon kaj forŝtelis ĉion. La komercistoj ekploris kaj ekĝemis kaj vane ekkriis:

“Se vi ploras aŭ ĝemas horojn,  
la ŝtelist’ ne redonas orojn.”

Nur la pia derviŝo estis kiu tute trankvila restis. Mi demandis lin: “Sed ĉu vian monon ne ŝtelis la bandito?”

Li respondis: “Jes, oni ŝtelis, sed mi ne tiom avidis al ĝi, kiom senti doloron okaze de la disiĝo.”

Ho vi! Ne amu iun ĝisoste!  
Ne facilos disiĝ’ pli poste.

Mi rakontis al li, ke lia situacio rememorigas min pri pasinta okazo. Mi, en la aĝo juna, kun homo juna havis amrilaton, tiel ke lia beleco estis la kiblo (4) de mia okulo kaj lia vizito estis la tuto de mia kapitalo.

Ne estos kiel li bela sur la ter',  
Ja nur eblas ĉe anĝeloj de l' aer',  
Mi ĵuras je am', post li ne plu ami.  
Unika li estis, unika afer'.

Subite li mortis kaj min en doloron portis. Tagojn kaj tagojn mi brakumis lian tombon kaj jene funebris:

“Ho ve, mi ja mian morton ŝatis  
en la tag' kiam la mort' vin batis.  
Tro malfacilas sen vi plu vivi,  
Aŭ sur via tombo vivon trivi.

Ho ve, li dormi apenaŭ povis  
se florojn ĉe la lit' li ne trovis.  
La paso de l' tempo lin velkigis,  
Dornojn sur lia tombo kreskigis.”

Kiam mi lin perdis, mi decidis, ke la reston de la vivo mi pasigu pie kaj serĉu novan koramikon nenie.

Mar' utilis se ĝi ne ondus baldaŭ,  
Rozo plaĉus se ne pikus dorn' ĉirkaŭ,  
Pro kunĝu' mi pave marŝis hieraŭ,  
Pro disiĝo mi serpentas hodiaŭ (5).

(1) En la teksto estas la vorto “krud-lanaĵ-vest-ulo”, alia nomo por derviŝo, ĉar derviŝoj kutime vestas sin per tiaj krudaj, maldelikataj vestaĵoj.

(2) Por iri al Mekko kaj fari pilgrimadon (islama pilgrimado = haĝo per araba radiko).

(3) Loknomo. angle kaj france Khafaja.

(4) Kiblo estas la direkto al kiu turniĝas islamanoj dum preĝoj. Vidu la vortareton!

(5) *Asoci-vortludo per “pavo” kaj “serpento” implicanta la paradizon kaj la ĝuon, kiam la homo (amanto) kunestis kun Dio (amato).*

## **Rakonto 19**

Al araba reĝo oni rakontis pri la amo de Maĝnun al Lejli (1). Oni priskribis Maĝnun-on, la amanton, kiel frenezulon, kiu malgraŭ sia nobla pozicio fuĝis al dezerto. La reĝo ordonis, ke oni alvoku la freneziĝintan amanton. La reĝo komencis riproĉi la alvenintan amanton: “Kial vi lasis la homan noblecon kaj prenis la bestan kutimon eviti homojn?” Maĝnun respondis:

“Multaj riproĉas kaj nomas ĝin skandal’,  
sen vidi ŝin demandas pri la kial’.”

Se nur povus vian belecon vidi  
tiuj kiuj min kritikis por sabot’,  
Sendube ili tranĉus siajn fingrojn  
anstataŭ la ŝelon de bergamot’ (2).

Nur tiele eblas malkovri la veron kaj kompreni la **“Jen do tiu, pri kiu vi riproĉis min”** (3). La reĝo volis ekvidi Lejli-on por kompreni kial tiu skandalo ekestis pro ŝi. Li ordonis kaj oni tuj serĉis en la arabaj triboj, oni trovis kaj portis ŝin al la reĝo. La reĝo ekrigardis ŝin. Li vidis nigran, maldikan, malplaĉan virinon. Ĉiuj aliaj sklavinoj estis pli belaj kaj pli korŝtelaj ol ŝi. Maĝnun eksciis kaj protestis: “Por kapti intuicie la misteron de la Lejlia beleco, oni devas rigardi al ŝi el Maĝnunaj okuloj, ne de aliuloj.”

Multajn klaĉojn mi aŭdis pri mia pozici’,  
Krius kun mi kolomboj se aŭdus ili.  
Helpu se vi ne havas amaflikton!  
Mi bezonas kvieton, ne konflikton!

Kiu sanas, al tiu mankas dolor’,  
Pri koro ja nur povas rakonti kor’.

Pri vespo nenion scias la homo,  
ja sen sperto de provespopika plor'.  
Se vi nin ne komprenas, ho amiko!  
Nia amikec' ĉe vi estas humor'.  
Kiel mia ne estas lia dolor',  
Al li la mano brulas, al mi la kor'.

(1) *Amrakonto araba inter Maĝnun (viro) kaj Lejli (virino).  
Vidu la vortareton!*

(2) *Aludo al la amo de Zulejĥa al Jozefo. Zulejĥa invitis la  
riproĉantajn virinojn, donis al ĉiu po unu bergamoton kaj mon-  
tris al ili Jozef-on. La virinoj gapante al Jozefo kiu konsternis  
ilin, tranĉis siajn fingrojn anstataŭ la bergamoton.*

(3) *La Nobla Korano, ĉapitro 12, verso 33, pri Zulejĥa kaj  
Jozefo.*

## **Rakonto 20**

Kadio (1) de la urbo Hamadan (2) ekamis knabon. La knab-  
patro forĝis hufumon sur la forĝejfajro kaj la knabo forĝis la  
juĝistan koron sur la amfajro. Longan tempon li pasigis, kaj la  
kadio estis la knabon amanta, per tiu amo flamanta, kaj jenan  
kanton deklamanta:

”Ravis miajn okulojn tiu cipres'.  
Rabis mian animon tiu kares'.  
Lia rigardo la koron katenas.  
Nur per okulfermo, amo ne venas.”

Iam la knabo vidis la kadion survoje. Informo pri la amo es-  
tis jam al la knabo sendita kaj li estis enorme ofendita. La knabo  
ekklaĉis, la nababon (3) riproĉis, insultis torente, ŝtonon prenis  
kaj eĉ ŝtonbati lin mienis. La kadio diris al reputacia kamarado  
el ulemoj:

“Rigardu! Tiu ne havas eltenon.  
La dolĉa knab' havas vinagrmienon.”

En arabaj landoj oni diras: “Bato de amiko estas rosino.”  
Fakte plaças al mi pli ol trafo de pan’  
pugnotrafo al mia buŝ’ per via man’.

Se lia ago malice malbelas, tamen li implice min celas.  
Ne plaças vinagre acida vinber’.  
Vi atendu! Ĝi dolĉiĝos kiel suker’.

Dirinte tion la kadio revenis sian juĝejon. Kelkaj fidindaj  
justuloj de lia oficejo petis permeson diri ion, kvankam ne estas  
ĝentile, ĉar niaj granduloj diris:

“Ne pri ĉiu parol’ decas polemiki,  
Eraras grandulo-eraron kritiki.”

Tamen nur pro tio, ke lia moŝto ĉiam malavare al ni afablis,  
ni perfidus se ni ion dirindan vidus kaj ne dirus. Estus dece, ke li  
forgesu tiun volupton kaj lasu tiun korupton; ĉar la juĝista poste-  
no estas ege valora kaj ĝi devas esti de la pekoj kaj akuzoj fora.  
Li estas homo perversa kaj la rakonto estas renversa!

Kiu ne zorgas sian bonan nomon,  
nepre ne zorgas aliulan domon.  
Ŝanĝiĝas kvindekjara reputaci’,  
ja per nur unu fivorto al fikci’.

Al la kadio plaĉis la admono de la sinceraj amikoj. Li bone  
aŭdis kaj aplaŭdis ilian opinion sed aldonis:

“Riproĉu min kiom ajn vi volas!  
Ne blankiĝas nigrul’ se li bolas.  
Memori pri li mi ja ne pentas.  
Batita serpento ja serpentas.”

Dirinte tiujn vortojn la kadio komisiis al iuj priserĉi la situa-  
cion de la knabo. La kadio dediĉis grandan sumon. Oni diras:  
“Kiu havas oron en la ŝranko, tiu havas forton en la brako.” kaj  
“Kiu ne havas dinaron, tiu ne havas duonparon.”



Ĉiu vidante oron klinas la nukon,  
eĉ se li fortas kiel ferŝultra pesil’.

Finfine iam nokte aperis trankvila angulo por tiuj du for de  
iu ajn aliulo, sed en la sama nokto oni denunciis la kadion al la  
polico: “La kadio tutnokte drinkis vinon kaj prenis la junulon sur  
sian sinon, ne dormante lulkante:

“Kial koko frue kokerikas?  
Sufiĉe da kis’ kaj kares’ mankas.  
Momenton kiam agit’ dormemas,  
Ĝuu la nokton, tio unikas!  
Fermu l’ orelojn al muezino (3)!  
aŭ al urba timbal’, kiu vekas!  
Preni la lipon de sur lia lip’,  
estas stulte, nur ĉar koko vokas.

La kadion, ankoraŭ en la festeno, avertis konfidulo, ke ĵalu-  
zuloj denunciis malice aŭ eĉ prave. “Ekfuĝu! Ankoraŭ restas tem-  
po ĉar la fajro fragilas kaj estingi ĝin facilas. Se la fajro cirkulas,  
la tuta mondo brulas.” La kadio ekvidis, ridis kaj diris:

“Leono perkrife ĉasaĵon tenas,  
Kaj ne zorgas, ke hundo boji penas.  
Sidu vizaĝ-al-vizaĝe de l’ amat’!  
Ne gravas se mi malamikon ĝenas.”

La ĵaluzaj rivaloj denunciis la nababan kadion ĉe la reĝo: “Ho  
via reĝa moŝto! En via regno okazas granda peko. Kion vi ordon-  
nas?” La reĝo konfirmis, ke li konsideras la kadion unika erudito,  
kaj ke eble liaj malamikoj denunciis maljuste kaj malĝuste. La  
reĝo volis persone vidi la situacion, ĉar li kredis:

Tuj tiri glavon ne sonas prudente  
Poste vi mordos mandorson perdente. (4)

La reĝo mem, kun kelkaj konfiduloj, frumatene alvenis al la  
domo de la kadio. Li vidis, ke la kandelo staras, la belulo sidas, la

vino estas verŝita, la pokalo estas rompita, la kadio ebrie dormas kaj pri la ĉeesto de la reĝo seninformas. La reĝo komencis afable veki lin dirante, ke la suno aperis. La kadio vekiginte ekkomprenis ĉion! Li tuj demandis: “El kiu flanko aperis la suno? La reĝo diris: “El oriento.” La kadio diris: “Danke al Dio, ke ankoraŭ eblas pento. Ĉar sanktulo diris: “Ne estas fermita la pordo de la pento al la kredantoj ĝis la suno ekleviĝas el la okcidento.” Do, mi pentas, ho mia Dio, kaj mi revenas al via religio!”

“Pro du okazis la peko damaĝa:  
sorto malbona kaj raci’ damaĝa.  
Se vi punos min, mi tion meritas.  
Se vi pardonos min, jen ago saĝa.”

La reĝo diris: “Pento en tiu ĉi momento, kiam vi eksciis pri via puno ne estas medikamento; **Al ili tamen neniom utilos ilia kredo post kiam ili jam vidis Nian punon (5).**”

Ĉu utilas nur tiam penti la ŝtelon  
Kiam vi ne povas eniri kastelon?  
Se vi altas, ne tuŝu fruktojn de najbar’!  
Se vi etas, vi ne kapablas je l’ fifar’!

La reĝo informis lin, ke li farinte tiun grandan abomenaĵon ne liberiĝos. Post tiu parolo, la policanoj akompanantaj la reĝon arestis la kadiion. La kadio petis diri sian lastan vorton al la reĝo. La reĝo jesis kaj permesis. La kadio diris:

“Enue de mi, se vi min forpelas,  
Mi daŭre vian afablecon celas.  
Se ne eblas liberiĝi nun por mi,  
esperi vian komplezon ja eblas.”

La reĝo respondis: “Vi uzis poeman beletran punkton sed ne eblas pardoni vin, ĉar nek la racio, nek la religio permesas al mi pardoni vin nur pro via elokventeco. Laŭ mia bontrovo oni devas ĵeti vin malsupren el la bastiono, tial ke por aliaj ĝi estu leciono.

La kadio petis: “Ho vi reĝo de la lando! Mi apartenas al via hordo kaj tiun pekon faris ne nur mi sola. Bonvolu ĵeti alian por fari lecionon por mi.” La reĝo ekridis kaj la kadio pardonis kaj al liaj malamikoj, kiuj la murdon de la kadio volis, diris:

“Ĉiu respondecas pri siaj makuloj  
Ĉu ja decas nomi aliajn pekuloj?”



(1) Juĝisto.

(2) Irana urbo.

(3) Nababo: titolo de supera oficanto kun varia enhavo en malsamaj islamaj landoj kaj epokoj.

(3) *Islama religia anoncisto kiu islamajn preĝhorojn anoncas.*

(4) *Signo de pento.*

(5) *La Nobla Korano, ĉapitro 40, verso 86.*

## **Rakonto 21**

Knab' kun beleca kaj pieca tipo,  
iam estis kun belulin' en ŝipo.  
En maron, kiu torentis tajfune,  
Mi aŭdis, ke ili ekfalis kune.  
Kapitan' volis preni lian manon,  
por ke li ne falu en l' oceanon.  
En ondoj li petis la kapitanon:  
“Ne helpu min! Helpu mian kunanon!”  
Mortante pro la ondoj, kiuj kuris,  
La jenajn versojn li tiam murmuris:  
“Ne aŭskultu de tiu amrakonton,  
kiu dum problem' forgesas l' amaton.”  
Tiel ja faris amikoj dumvivaj,  
Lernu de homoj spertaj, ne naivaj!  
Sadio scias la vojon de amad',  
kiel l' araban la homoj en Bagdad'.  
Nur amu amatan, kiun vi havas,  
kaj forgesu aliajn kiuj ravas!  
La manieron ami lernus Maĝnun (1)  
de ĉi tiu libro se li vivus nun.

(1) *Fama amrakonto inter Maĝnun kaj Lejli. Vidu la vortareton!*

# Ĉapitro 6

## La Malforto kaj Maljunaĝo

### Rakonto 1

Kun aro da ulemoj en la granda moskeo de Damasko mi diskutis. Tiam venis junulo kaj demandis ĉu inter ni iu scipovas la persan lingvon? Oni fingre montris min. Mi jesis. Li petis: “Maljunulo centkvindekjara agonias kaj el lia gorĝo en la persa lingvo vortoj elvenas kiujn ni ne komprenas. Se vi venos traduki, ni dankos kaj eĉ pago ne mankos. Eble li volas testamenti.”

Mi iris al lia lito. Li diris:

“Temp’ pasis kiam eblis deziri,  
Tamen nun eĉ ne eblas iom spiri.  
Ho ve! La bunta tablo de l’ vivo!  
Ni ne satiĝis kaj devas iri.”


Mi arablingve klarigis al la sirianoj. Ili miris, ke la maljunulo malgraŭ sia longa vivo ankoraŭ bedaŭras pro la morto. Mi demandis la agonianton: “Kiel vi fartas en tiu ĉi situacio?” Li diris: “Kion diri?”

Ĉu vi ne komprenas kiom doloras  
de la korp’ eligi nur incizivon?  
Komparu tion kun momento kiam  
oni eligas tutan karan vivon.

Mi konsolis: “Ne pensu pri la morto, nek la naturo. Grekaj filozofoj diris, ke eĉ la tute sana korpo ne certe restos ĉiam viva kaj la malsano, eĉ se grave danĝera, ne nepre kaŭzos morton. Se vi volas mi povas alvoki kuraciston.” Li fermis la okulojn kaj ride diris:

“Ĉu kuracisto kuracadon komencas,  
kiam lia paciento jam demencas?  
La dom’ detruigis el sia fundament’,

La mastro planas pentri sur ĝia tegment'.  
Maljunulo pro agonio lamentis,  
Lia edzin' liajn piedojn unĝentis.  
Se perturbiĝas la korpa temperament',  
Ne kuracas amulet', nek medikament'."



## Rakonto 2

Maljunulo rakontis, ke li faris knabinon sia edzino, kaj kun ŝi eniris la deflorejon florumitan. Ili du sidis sole kaj la viro parolis mole, por ke la knabino ne timu kaj emu la edzon vole. Tiel ili pasigis noktojn, rakontante ŝercojn kaj anekdotojn. La maljunulo interalie diris: “Vi estas bonsorta kaj komforta, ĉar via edzo estas aĝa, saĝa, multvojaĝa, maljuna, bonfortuna, mature oportuna, sperta, lerta, afabla, kapabla, bonhumora, kaj dolĉoratora.

Mi ŝatas forrabi vian koron,  
Se vi molestos, mi ja toleros.  
Se vi papage ŝatas sukeron,  
La dolĉan animon mi oferos!

“Vin ja ne kaptis la manoj de junulo fiera, fanfaronata, egoista, malsaĝa kaj kaprica, kiu ĉiumomente havas alian emon kaj ĉiunokte alian hejmon. Male, la maljunuloj vivas prudente kaj ne incidente.

La junuloj viglaj estas ja belaj,  
Sed mankas fidelo en ilia kor’.  
Ili nefidindas kiel najtingal’  
kiu kantas ĉiam sur alia flor’.

Male al la maljunuloj, kiuj vivas laŭ prudento kaj ĝentilo, ne malinteligento kaj juna stilo.

Ho vi! Serĉu ol vi pli bonan homon!  
Kun sama homo vi ne faru domon!”

La maljunulo daŭrigis: “Tiel mi parolis kaj parolis kun la knabino kaj finfine, kiam mi supozis, ke ŝi jam mildiĝis kaj ŝia koro ekemis al mi, subite ŝi ve-spiris kaj sopire diris, ke ŝi iam de sia vartistino aŭdis, ke pli bone estas se al junulino trafas sago puna ol edzo maljuna.”

Kiam l’ edzino vidas ion sur l’ edzo,  
kio pendas ja kiel fastanta lip’.  
Tiu kaco similas al mortinto,  
kaj ne povas stimuli eĉ kiel ŝtip’.  
Se virin’ vekiĝas sen kontent’ el la lit’,  
En la domo flamos kverelo kaj milit’.  
Maljunul’, kiu nur per baston’ sin levas,  
Ĉu levi alian bastonon ja povas?

Finfine ne eblis kunvivi kaj ili disiĝis. Post cent tagoj, ŝi reedziniĝis al junulo aĉa, malriĉa, maldolĉa, kiu molestis ŝin, sed ŝi toleris kaj dankis Dion, ke ŝi liberiĝis de tiu malbenita maljunulo kaj atingis al tiu ĉi ada plezuro!

Malgraŭ viaj mishumor’ kaj kverelo,  
Mi ja deziras vin pro via belo.

Por virinoj estu bela la vesto,  
vizaĝ', koketad', kosmetika kesto,  
odoro, koloro, kapric', kaj paco.  
Por viroj sufiĉas nur rekta kaco.  
Kun vi bruli en fajra infer-eben'  
Pli bonas, ol kun aliul' en eden'.  
Cepodoro el belulina buŝo,  
Pli plaĉas ol kun aĉulino, kuŝo.

### **Rakonto 3**

Mi gastis ĉe riĉa maljuna noblulo en Dijarbakiro (1). Li havis belan filon. Vespere li rakontis al mi, ke li ne havas alian idon. Proksime estas arbo, kien pilgrimas homoj kaj preĝas por plenumiĝo de siaj deziroj. Longajn noktojn sub tiu arbo li lamentis kaj Dion pri ido petis, ĝis Dio tiun idon al li donis.

Mi aŭdis, ke la filo flustris al siaj amikoj: “Ho ve! Se mi scius kie tiu arbo situas, mi iros tien kaj preĝos por ke mia patro mortu!”

La noblulo feliĉas, tial, ke lia filo saĝas; kaj la filo sarkasme mokas, ke lia patro aĝas.

Pasas jaroj kaj vi ne paŝas  
al la tombo de via patro.  
Kion vi faris por via patr',  
faros la fil' en viv-teatro.

*(1) Urbo en la nuna Turkio.*

### **Rakonto 4**

Iam pro la juneca orgojlo, mi tutan tagon rajdis rapide kaj vespere ripozis montpiede. Maljunulo malforta sekvante karavanon vidis min. Li avertis, ke mi ne sekuras se mi tie dormas. Mi plendis, ke ne eblas plu rajdi ĉar la laco enormas. Li diris: “Ĉu vi



ne aŭdis la eldiron de sprituloj, ke pli bonas iri kaj halti ripoze, ol kuri kaj laciĝi serioze?”

Se vi atingon celas, paciencon!  
Uzu mian rekomendan sciencon!  
Haste galopanta ĉevalo havas, ol  
kamel’ malrapida, ne plian ŝancon.

## **Rakonto 5**

Junulo sprita, subtila, ridema kaj dolĉa estis inter nia amikaro, kiun ĉagrenis nenio kaj lin malgajigis neniu. Iom da tempo mi ne vidis lin. Dum la unua revizito mi vidis ke li edzinon prenis kaj infanojn tenis. Tial iĝis lia gajo flanka kaj lia rido manka. Mi demandis pri lia farto. Li respondis, ke lia infaneco mortis ekde kiam infanojn li portis.

Kiam viv’ grizigis la harkoloron,  
Mi ne plu serĉu ludon, sed laboron!

Ne plu juna, ĉesigu infanludon!  
Lasu ludon kaj ja komencu studon!


Tia gajeco decas nur dum pubero,  
Irinta akv’ ne revenos al rivero.  
Rikoltotempe ne verdas grenkampo.  
male printempe verd’ multas en kampo.

La pasinta juneco malsufiĉis.  
Feliĉa mi estis dum tiu aĝo.  
Nun foriĝis mia leona forto,  
mi kontentas kiel mus’ je fromaĝo.  
Maljunulino la hararon farbis,  
“Ho maljuna panjo”, mia damaĝo.  
Grizajn harojn vi nigrigis tre lerte,  
Sed la ĝibo estos malavantaĝo.

## Rakonto 6

Kiam pro malsaĝo de junaĝo mi kriis al mia patrino, ŝi ĉagrenite eksidis en angulo kaj plorante diris: “Ĉu vian malfortecon vi forgesis, kaj tiel forte vi min agresis?”

Rigardante sian ribeleman filon,  
kiom ĝuste kaj prave ŝi riproĉis lin:  
“Se vi rememorus pri la infaneco,  
kiam vi estis malforta sur mia sin’,  
tion vi ja ne farus al via patrin’,  
kiam vi estas vir’, kaj mi maljuna in’.”



## Rakonto 7

Avarulo riĉa havis filon malsanan. Konsilantoj rekomendis, ke por resaniĝo de la filo, aŭ la riĉulo devas tralegi la Koranon aŭ oferi greganon. La avarulo post hezito respondis: “La grego estas fora, sed la Korano estas ankora.” Spritulo aŭdis kaj diris: “Tralegon li elektis ĉar mono estas kiel lia sango kaj Korano sur lia lango.”

Ho ve! Multe da preĝ' li ĉiam faras,  
Sed por monhelpo, li ĉiam avaras.  
Por mondoni, senmova kiel statu'.  
Por legi versojn, cent fojojn kaj plu. (1)

*(1) Temas pri La Nobla Korano, ĉapitro 1, versoj 1-7. Legi tiujn versojn estas por peti benon de Dio por homo.*

## **Rakonto 8**

Oni diris al maljunulo: “Kial vi ne edziĝas?” Li respondis: “Mi ne havas emon al maljunulinoj.” Oni diris: “Petu junulinon se vi posedas riĉon.” Li respondis: “Maljuna mi ne havas emon kuniĝi kun maljunulinoj, do juna ŝi apenaŭ emos kuniĝi kun maljuna mi.”

Sepdekjarul' kondutas kiel junulo,  
Simile al blindulo kaj Koran-lego.  
Forto necesas, ne or', ĉar sinjorino  
preferas karoton al viandpecego.

## **Rakonto 9**

Mi aŭdis, ke estis viro maljuna  
edziĝi kun virgulin', lia celo.  
La junulino nomiĝis Juvelo,  
kiun juvele li kaŝis en kelo.  
Kutime gastoj atendas la venkon, (1)  
Sed lia baston' dormis dum ribelo!  
Li pafis sed malvenkis, ĉar nur kudras  
ŝtala kudrilo veston el flanelo.  
Ĉe amik' ultimaton la ŝejk' faris, (2)  
ke mi misfamiĝis pro ŝia belo.  
Inter la geedzoj leviĝis problem',  
Necesis Sadio kaj kolonelo. (3)

En tia skandal', ne kulpas la edzin',  
Ne tenas juvelon man' kun ŝancelo.

*(1) Venko temas pri sukcesa sekskuniĝo la unuan nokton post geedziĝo.*

*(2) "La ŝejko" temas ĉi tie pri la maljunulino, kaj versaĵne "amiko" estis la homo kiu prezentis la junulinon al li.*

*(3) Kolonelo temas pri polickolonelo aŭ simple policano.*

# Ĉapitro 7

## La Efikoj de Edukado

### Rakonto 1

Unu el la ministroj havis filon malinteligentan. La ministro sendis la filon ĉe ulemon kaj petis: “Eduku lin esperante, ke li inteligentiĝos.” Longtempe li edukis tiun filon sed vane. Li sendis kurieron al la ministro: “Mi ne povis klerigi lin, sed li povis kolerigi min!”

Edukado ne estos efika,  
krom se estas akceptema la natur’.  
Fero, kiu esence malbonas,  
povas brili per neniu polur’.  
Post laviĝo de hund’ en sep maroj,  
malseke pliiĝas ĝia malpur’. (1)  
Jesua mul’ se iras al Mekko, (2)  
reveninte ja estas mulo nur.

(1) *Laŭ islamo, hundo estas esence malpura besto.*

(2) *La sankta urbo de islamanoj. Vidu la vortareton!*

### Rakonto 2

Saĝulo admonis siajn filojn : ”Miaj karaj! Lernu arton ĉar mondaj riĉo kaj posedaĵo ne fidindas; kaj arĝento kaj oro estas en danĝero dum vojaĝo; aŭ rabisto ŝtelas subite aŭ fraŭdisto ekposedas hipokrite; sed la arto estas ŝpruca fonto kaj eterna konto. Ne gravas se artisto perdas riĉon ĉar arto mem estas riĉo, ĉie oni ĝin laŭdas kaj aplaŭdas; sed senartulo devas vagabondi kaj honti.”

Obeo malfacilas se kutim’ estis ordon’,  
Se akcept’ estis kutim’, ne tolereblas opon’.

Kiam okazis ribel’ en Siri’  
ĉiuj foriris al landanguloj;

Fariĝis ministroj de l' sultano  
kampare naskitaj scienculoj;  
La filoj de stulta eksministro  
en vilaĝo iĝis almozuloj.

### **Rakonto 3**

Instruisto instruis reĝidon. Kun la reĝido, la instruisto estis tro rigora kaj severa, kaj eĉ punbatis lin. La reĝido ne plu povis toleri, do li iris plendi ĉe la patro kaj montris sian vergitan korpon. La reĝo emociiĝis kaj alvokis la instruiston kaj demandis lin: “Vi ne estas tiom rigora kontraŭ la filoj de ordinaruloj kiel vi estas kontraŭ la mia, kial?” La instruisto respondis: “Ĝenerale ĉiuj devas lerni paroli elpensinte kaj konduiti dece, sed la reĝoj speciale aparte. Ĉar kion la reĝoj faras, tio iras en la publikon, sed la diroj kaj faroj de la publiko ne tiom gravas.”

Se derviŝo cent blasfemojn diras,  
Liaj amikoj ĉiujn neglektas.  
Se reĝo unu ŝercon rakontas,  
Tiu ŝerc' tuj sep landojn infektas.

Do, necesas strebi pli multe al klerigo de reĝidoj – **Dio kreskigis ilin fortaj** (1) – Ol al instruo de ordinaruloj.

Kiu infane ne bone edukiĝas,  
ties konduto ja estos malperfekta.  
Ĉiudirekte turniĝas juna branĉo,  
Sed nur fajro igas sekan branĉon rekta.

Al la reĝo plaĉis la klarigoj de la ulemo kaj lia respondmaniero. La reĝo donacis al li monsumon kaj kostumon, kaj plialtigis lian postenon.

*(1) La Nobla Korano, ĉapitro 3, verso 38.*

## **Rakonto 4**

Mi renkontis lernejan instruiston en Maroko. Li estis senpacienca, paŭta, malbonhumora, ofenda, malica, avara, kaj malpia. Vidi lin kaŭzis indignon kaj aŭdi lian Koran-laŭtleĝon kvazaŭ forigis ĉiun vivsignon. En lia klasĉambro estis kelkaj knaboj bonstilaj kaj knabinoj ĝentilaj. Ili ne kuraĝis rideti nek paroloti, ĉar la instruistaĉo foje pugnus ies arĝentkoloran vangon kaj foje pinĉis la kristalan kruron de alia. Mi aŭdis finfine, ke oni punis kaj forpelis lin eksciinte pri parto da liaj malicaĵoj. Lian klason oni donis al alia instruisto; pie bonhumora, kaj pacience bonkora, kiu ne ekparolis krom pri io parolenda, kaj per neniu akreta vorto ofenda. La knaboj, forgesinte de la antaŭa rigora instruisto la hororon kaj ekkoninte en la nuna instruisto anĝelan humoron, mem fariĝis monstroj! Ili ne plu lernadis diligente, misuzante la toleremon de la instruisto. Ili ade ludis kaj rompis siajn tabuletojn, malplenajn de la lernotaskoj, unuj sur la kapo de aliaj.

Se al instruisto mankas rigor’,  
Ludiras infanoj el klaso for.

Post du semajnoj mi preterpasis tiun lernejon kaj vidis, ke oni redungis la unuan instruiston, petinte lian pardonon. Mi vere indignis! Kial satanon oni faris instruisto de la anĝeloj? Haleluja! Maljunulo sperta kaj sprita diris:

“Reĝo sendis la filon al lernejo,  
kun arĝent-tabul kun jena proklamo,  
skribita sur la tabul‘ per ora ink’:  
Docent-bato pli bonas ol patramo.”

## **Rakonto 5**

Piulido el Omano ekheredis enorman riĉon. Li komencis distriĝi kaj diboĉi. Resume, ne restis bordelo, kiun li ne vizitis,



nek botelo, kies vinon li ne drinkis. Nu, mi admonis lin: “Ho filo, la enspezo similas al akvofluo kaj la elspezo similas al akvomuelilo. Alivorte, kiu havas certan enspezon povas certamezure elspezi.

Sen enspezo elspezu modere,  
Ĉar la ŝipistoj kantas, ho frato!  
Se ne pluvas en alta montaro,  
Fariĝas seka river’, Eŭfrato (1).

Uzu vian saĝon kaj prudenton, evitu diboĉajn festojn, ĉar kiam finiĝos via arĝento, restos al vi amaro de la pento.”

Al la oreloj de la knabo ne venis eĉ silabo, pro drono en karafo kaj kanabo. Li eĉ kontraŭis proteste: “Lasi ĝuan momenton kaj zorgi pri venonta turmento estas kontraŭ la saĝo:

Havantoj de komforto kaj bonsorto,  
Ne malĝoju pro onta malkomforto!



Ho amiko mia! Ĝoju ankoraŭ!  
Prokrastu morgaŭ-malĝojon al morgaŭ!

Des pli mi, famigita je malŝparo, ligita al malavaro, kaj reno-  
ma inter la popolo por donacema rolo.

Se vi famas pro via malavaro,  
Ne decas meti ĉenon al dinaro.  
Se pri l' afabl' homoj havas akordon,  
vi ne povas fermi al ĝi la pordon.”

Mi rimarkis, ke li ne akceptas mian admonon kaj mia varma  
blovo ne efikas sur lia malvarma fero. Mi ĉesis admoni kaj evitis  
oponi. Ja la saĝuloj diras: “Diru kion vi devas diri sed se ne efi-  
kas, ĉesu, ĉar ne plu estas via tasko.”

Eĉ se vi certas pri neefikec', diru!  
Kiom ajn vi povas el bonvortoj, donu!  
Neprudenta hom' mem kulpas se li falas,  
Se li estas en kaptilo; ne admonu!  
Li batas la manon mane: “Ho ve!  
Kontraŭ l' admono de saĝul' ne oponu!”

Post iom da tempo mi vidis tion, pri kio mi avertis lin. Li  
falas en mizeron: fliko sur fliko, neniu amiko, tagnokte en paniko.  
Mi kompatis lin sed ne plu vortbatis, tamen mi diris al mi mem:

“Dum ebrio ne funkcias la menso,  
kaj pri futura malriĉ' mankas penso.  
Printempe sur arbo estas folio,  
Tamen vintre troviĝas ja nenio. “

*(1) Granda rivero en Irako kaj Turkio.*

## **Rakonto 6**

Reĝo konfidis sian filon al klerulo kaj diris: “Jen via filo!  
Eduku lin kiel vian propran filon!” La klerulo riverence akceptis.  
Li edukis la princon dum kelkaj jaroj kun siaj filoj. La filoj de

la klerulo kleriĝis; tamen pri la reĝido oni senesperigis! La reĝo pridemandis la klerulon kaj riproĉis, ke li ne fidelas kaj ne plenumas sian promeson. La klerulo respondis al la reĝo, ke la eduko estis sama sed la talentoj estas malsamaj!

Oro kaj arĝento el erco ja venas,  
Sed ne el ĉiu erc' ili prepariĝas.  
Samaj radioj lumigas ĉiujn ledojn,  
El iu sak', el iu maroken' fariĝas.

## **Rakonto 7**

Mi aŭdis pri sperta ŝejko, kiu diris al disĉiplo: “Ho filo, kiom la homo interesiĝas pri la manĝaĵoj, se tiom li interesiĝus pri ties provizanto (1), lia rango estus pli alta ol la anĝeloj.

Dio forgesis vin neniam,  
nek viron, nek spermon, nek infanon.  
Li donis animon kaj penson,  
prudenton, bonhumoron, sanon.  
Li donis ja ŝultrojn kaj brakojn,  
Li metis por ĉiu brak' manon.  
Dio donis parolon kaj saĝon,  
Li ne forgesos vian panon.

*(1) Temas pri Dio.*

## **Rakonto 8**

Arabon mi vidis, kiu al sia filo diris: “Ho filo mia, oni demandos vin dum la Releviĝa Tago pri via ago, ne pri via patro.”

La silkraŭpo ne estas la kialo,  
ke oni kaaban kovrilon kisas. (1)  
Silkŝtofo estas kara ĉar ĝi loĝas  
kie ĝi de Kara Dio ne disas.

*(1) Sur la Kaab-domo estas silka kovrilo, kiun islamanoj kisas por respekti.*

## Rakonto 9

En sciencaj tekstoj oni skribis, ke skorpio ne naskiĝas laŭ normala maniero kiel aliaj bestoj. Sed la ido, manĝinte la abdomenon de la patrino, la ventron ŝiras kaj eliras. La felo, kiun vi vidas en la skorpia nesto estas ĝia resto. Mi rakontis tion ĉe iu. Li diris: “Jes, vi pravas kaj tiu fakto tre gravas! Ĝi infanaĝe faris tiel pri sia patrino, tial plenaĝe estas tiom abomenata!”

Al sia filo patro testamentis:

“Ho feliĉulo! Lernu ĉi admonon:

Kiu perfidas la familianojn,

Tiu ne vidos feliĉon kaj bonon.”

## Rakonto 10

La edzino de derviŝo estis graveda. La derviŝo ne havis idon. Li votis, ke se Dio donos al li filon, li donacos ĉiujn siajn havaĵojn al malriĉaj derviŝoj, krom sian portatan mantelon. Hazarde naskiĝis filo. Li plenumis la voton kaj regalis derviŝojn. Post kelkaj jaroj, kiam mi revenis el Sirio, pasante tra lia kvartalo mi demandis pri lia farto. Oni respondis, ke la derviŝo estas en malliberejo. La kialon mi demandis. Oni diris, ke lia filo drinkis, ebriiĝis, mortigis homon kaj forfuĝis. La patron oni anstataŭe arestis kaj enkatenis. Mi diris, ke tiun ĉi peston li preĝe petis de Dio.

Se gravedulin' naskus serpentidon,

Pli bonas ol naski insolent-idon.

## Rakonto 11

Iam dum mia infanaĝo, mi demandis plenaĝulon pri adolesko. Li respondis, ke laŭ la tekstoj, ĝi havas tri signojn: unue, atingon al dekkvin jaroj; due; noktajn malpuriĝojn per spermarioj kaj

trie, kreskon de la pubharoj. Sed verdire ĝi havas nur unu signon: obei Dion pli ol obei la voluptojn. Kiu ne estas tia, tiu ankoraŭ ne estas adoleskanto.

Homiĝas facile akvero,  
post kvardek tagoj en utero.  
Por ne saĝa kvardekjaraĝa,  
la nomo hom' estas domaĝa.

Homec' estas favor' kaj afablo,  
Ne pensu pri korpo kaj staturó!  
Estu humana, ĉar ja pentreblas  
el verdigro aŭ cinabr', figuro.  
Homo sen afablo, sen favoro,  
similas al pentraĵo sur muro.  
Konkeri mondon ne estas grave,  
Konkeri koron estas plezuro.

## **Rakonto 12**

Dum jaro, kverelis la pilgrimantaro de piedira karavano, kaj ankaŭ mi estis ĝia ano. Fakte, ni kverelis sovaĝe kaj interbatadis domaĝe. Mi aŭdis, ke pasaĝero sur kamelpalankeno (1) diris al sia kunvojaĝanto: “Ho strange! Ebura piediranto (2), trapasinte la ŝaktabulon, fariĝas ministro (3), t.e. pliboniĝas; sed religia piediranto, trapasinte la dezerton, plimalboniĝas!”

Diru al tiu fi-pilgriminto,  
pro kiu la homoj malkomfortas:  
“Vi ne pilgrimis, sed tiu kamel',  
kiu dornmanĝas, tamen ŝarĝportas.”

*(1) Riĉaj vojaĝantoj en karavanoj rajdis ĉevalojn aŭ kamelojn.*

*(2) Peono en la persa nomiĝas Piediranto aŭ Soldato.*

*(3) Ŝaka damo en la persa nomiĝas Veziro aŭ Ministro.*

### **Rakonto 13**

Baratano lernis elblovi fajrojn el sia buŝo. Saĝulo diris al li: "Kiam via domo estas kankovrita, tiu ludo estas ne saĝe elektita."

Ne diru parolon, kiu ne parolendas!

Ne diru demandon, kies respond' ofendas!

### **Rakonto 14**

Viro suferis okuldoloron. Li iris al bestkuracisto, petante kuracon. La bestkuracisto metis en lian okulon bestmedikamenton. Li blindiĝis. Li procesis ĉe juĝisto. La juĝisto senkulpigis la bestkuraciston de ajna rekompencpago argumentante, ke se la paciento ne estus azeno li ne irus al bestkuracisto!

Mi celas: kiu konfidas gravan aferon al homo ne kompetenta, tiu fariĝos penta kaj oni konsideros lin malinteligenta.

Se vi prudentas, ne donu

al aĉul' gravan postenon!

Matisto estas teksisto,

Sed ne por teksti satenon.

### **Rakonto 15**

Mortis filo de granda religia estro. Oni petis lin pri teksto por la tombŝtono. Li respondis: "La versoj de la Nobla Korano estas pli karaj ol por skribi en tiaj lokoj, ĉar tempopaso difektas, homopaso skrapas, kaj hundopaso malestimas. Se nepre estas bezono, sufiĉas jenaj versoj:

Kiom multe freŝiĝas mia koro,

kiam kreskas herboj en la ĝardeno.

Ho mia amik'! Freŝiĝu printempe,

ĉe mia tombo dum via promeno!"

## Rakonto 16

Piulo renkontis riĉulon, kiu punbatis sklavon liginte liajn manojn kaj piedojn. La piulo protestis: “Ho filo, li estas kreitulo kiel vi mem, kiun Dio donis je via dispono. Anstataŭ molesti lin danku Dion pro via supereco! Eble en la Releviĝa Tago, li estos pli bona ol vi kaj vi hontos.”

Ne koleru kontraŭ via sklavo!  
Kaŭzu nek doloron nek suferon!  
Vi aĉetis lin kontraŭ dinaro,  
Vi donis nek vivon nek aperon.  
Kial tiom da ordon’, kaj orgojl’?  
Ja atentu Dian konsideron!  
Ho vi mastro de Arslan kaj Aguŝ (1)!  
Vi ne forgesu Dian koleron!

Estas eldiro de la Sinjoro de la mondo, Diaj saluto kaj paco al li (2): “La plej granda bedaŭro en la Releviĝa Tago estas la bedaŭro de la pekema mastro, kiam oni portas lian pian sklavon al la paradizo kaj lin al la infero.”

Al vi honeste servantan sklavon,  
Neniam humiligu kolere!  
Estos skandal’ en Releviĝa Tag’:  
Mastro katene, sklavo libere.

*(1) Du turkaj nomoj por viroj kaj virinoj, tie ĉi uzitaj kiel du ĝeneralaj nomoj por gesklavoj.*

*(2) Temas pri Mohamedo, la profeto de islamo.*

## Rakonto 17

Dum jaro, de Balĥo al Bamjano (1) mi vojaĝis, kaj sur tiu rabista tereno vere kuraĝis. Akompanis min junulo forta, sporta, ŝilduze lerta, kaj arkpafe sperta. Estis bezonataj dek fortaj viroj

por tiri lian pafarkŝnuron, kaj neniu tergloba luktanto sukcesis froti lian dorson al la tero. Tamen, li estis riĉulido; li neniam aŭdis la tondron de la tamburkavo kaj neniam vidis la brilon de la akra glavo. Dorlotita, sed ne frotita.

Neniam kaptita de malamiko,  
Nek pro pluvo de sagoj en paniko.

Hazarde mi estis kunulo de tiu junulo. Li montris sian forton faligante ĉiujn murojn ruinajn kaj arbojn klinajn. Li, pri sia forto fieris kaj diris:

“Kie estas elefant’ por fali pro miaj brakrifoj?  
Kie estas leono por timi pro miaj virkriroj?”

Ni estis en tiu situacio, kiam du hindoj venis de malantaŭ roko kun celo de nia sufoko. Unu havis vergon kaj la alia flambergon. Mi diris al la junulo: “Kiun vi atendas?”

Montru viajn forton, povon, kaj pompon,  
La malamik’ mem venis en la tombon.

Mirinda rimarko estis la falo de liaj sagoj kaj pafarko. Li tremis pro la timo fariĝi viktimo!

Ne ĉiu harfendanto per sago,  
rezistas dum la milita tago.

Ni preferis la armilon, veston kaj monkeston malhavi kaj la vivon savi.

Por tiom grava task’ sendu spertulon:  
kapti virleone uzante lazon.  
Junulo eĉ fortkola kaj egkorpa,  
svenas se oni premas lian nazon.  
Nur sperta militant’ scias militon,  
Kiel ulemo, teologian bazon.

*(1) Du urboj en la nuntempa Afganio.*

## Rakonto 18

Sur la tombo de sia patro, riĉulido disputis kun malriĉulido: “La ĉerko de mia patro pezas kaj ĉiuj la surskribojn de la tombo aprezas. Ĝia ŝtono estas marmoro kun gravuraĵoj el oro. Kio estas sur la tombo de via patro? Frakasita brikerio kaj manpleno da tero.” La malriĉulido respondis: “Kiam via patro sub tiom da pezaj ŝtonoj sin moviĝi penas, mia patro jam al la paradizo alvenas.”

Ju malpli da ŝarĝo sur azeno,  
Des pli bona estos ĝia treno.

Malriĉulo suferinta pro mankoj,  
tra la mortpordo pli facile pasas.  
Sed riĉulo kiu en abund' vivis  
sian vivon ne trankvile forlasas.  
Esti libera sklavo ja pli bonas,  
ol reĝo, kiun malamiko ĉasas.

## Rakonto 19

Mi demandis sinjoron pri la senco de la hadito (1) “Via plej malamika malamiko estas via memo (2) kiu situas inter viaj du flankoj.” Li respondis: “Ĉar ĉiu malamiko amikiĝas se kun tiu oni afablas. Krom la memo, kiu pli malamikiĝas se oni ĝin toleras.”

Ete manĝi faros homon anĝela,  
Ege manĝi, li finfine pereos.  
Plenumi revon estigos obeon,  
Krom por la memo, kiu malobeo.

*(1) Diroj kaj faroj de profeto aŭ imamo. Vidu la vortareton!*

*(2) Laŭ islama teologio, la homo havas diversajn memojn; tio estas riproĉan, malbongvidan, certan, kontentan, inspiran, puran.*



## Disputo de Sadio pri riĉo kaj malriĉo kun pretendanto

Iu, derviŝ-aspekte sed ja malperfekte, misvoĉe en kunsido plendis kaj riproĉe riĉulojn ofendis. Li diris: “Malriĉulo ne havas kapablon kaj riĉulo ne havas afablon,

Emantoj al dono ne plu havas monon,  
Havantoj de mono ne plu emas donon.”

Al mi, kiu kreskis per la favoroj de granduloj, malplaĉis tiuj vortoj kaj do mi reagis: “Ho amiko! La riĉuloj estas fonto por malriĉuloj kaj konto por mizeruloj, savo por pilgrimantoj kaj kavo por vojaĝantoj. Ili akceptas pezajn taskojn por preventi fiaskojn de aliaj homoj. Ili nur tiam ekmanĝas, kiam ili certiĝas, ke oni manĝon por gastoj kaj subuloj jam aranĝas. Ili donas donacojn al homoj solaj kaj izolaj, separaj kaj najbaraj, rilataj kaj malsataj, maljunaj kaj vivmaloportunaj.

Riĉuloj donas donacaĵojn, votojn, esperojn,  
Impostojn, liberigojn, akcizojn, buĉoferojn.  
Ĉu vi volas rivali ilin kaj senti fieron?  
Vi preĝetas nur kaj atentis proprajn suferojn!

Se donacemo alportas komforton kaj preĝemo forton, ambaŭ estas eblaj por kapablaj homoj, kiuj havas purajn investon (1) kaj veston, famon neefemeran kaj koron serenan. Forto por preĝo dependas de ĝusta digesto, kaj ĝusteco de preĝo dependas de pura vesto (2). Malplena stomako ne fervoras kaj malplena mano ne favoras. La piedo de soifulo ne povas paŝi kaj la mano de malsatulo ne povas donaci.

Tiu nokte dormas malkomforte,  
Al kiu mankas la morgaŭa mon’.  
Formik’ kolektas somere por ke,  
Vintre ĝi fartu en sato kaj bon’.

Malriĉulo trankvilon ne vidas kaj komforto ĉe mizerulo ne sidas. Unu komencas vesperpreĝon, kaj la alia atendas vespermanĝon (3). Ĉu tiu similas al tiu ĉi?

Sinjoro okupiĝas pri la Sinjoro,  
Derviŝo pri sia maltrankvila koro.

Do, Dio pli akceptos la preĝojn de la riĉuloj ĉar ili preĝas per trankvila menso kaj koncentrita penso. Riĉulo estas ekonomie stabila, kaj dum la preĝo trankvila. Araboj diras: “Azilon ĉe Dio (4)! Pro malriĉo kiu ekstremas kaj najbaro al kiu mi ne emas.” Estas hadito (5): “Malriĉo nigrigas la vizaĝon en ambaŭ mondoj (6).”

Li demandis min: “Ĉu vi ne aŭdis ke la profeto, saluton al li, diris: “Mizero estas mia fiero?”

Mi respondis: “Silentu! La aludo de la Mondreganto, saluton al li, estas al grupo kiuj estas viroj de la areno de kontento kaj cedo al sorta fundamento, ne tiuj ĉi, kiuj estas derviŝoj supoze sed vivas almoze! (7)

Ho tambur’! Brua laŭte kaj kava ene,  
sen provizo, kion vi faros dum milit’.  
Deturniĝu de l’ popol’, se vi honestas!  
Ne tenu rozarion pro ĝia kredit’! (8)

Malsaĝa derviŝo komforton ne ricevas ĝis pro la malriĉo forgesi ion li devas. Proksimas malriĉo al sendieco (9). Sen riĉo, oni ne kapablas nudulon vesti aŭ problemsolvanto esti. Homoj kiel ni neniam povas esti kun ili samnivelaj, kaj donantaj manoj neniam al la ricevantaj estas similaj. Ĉu vi ne legis, ke Dio, La Plej Glora kaj La Plej Valora, en la Nobla Korano heroldis pri la paradizanoj, **kiuj ricevos provizaĵon konatan** (10)? Tiel vi povas scii, ke forta kredo mankas al serĉanto de vivrimedo, kaj pro komforto dankas nur homo kun sufiĉa posedo.

Dormanta soifanto sonĝas,  
Ke li en puran akvon plongas.”

Kiam mia parolo atingis ĉi tien, la pacienco de la derviŝo foriris, kaj li sian glaveskan langon eltiris, kaj sur elokventecan

ĉevalon en la senbrideca areno iris, kaj atakante min diris: “Tiom vi komplimentis ilin kaj sensencaĵojn prezentis, ke oni supozas, ke ili estas kuraciloj por ĉiu doloro aŭ ŝlosiloj por ĉiu trezoro. Ili estas aro da arogantaj fanfaronaj orgojlaj malŝatataj uloj. Ili estas okupataj de mono kaj favoro, kaj trompitaĵoj de ambicio kaj trezoro. Ili neniam parolas digne kaj ĉiam rigardas indigne. Laŭ ili, ulemoj estas almozpetaĵoj kaj malriĉuloj, kanajletaĵoj. Pro riĉeco evidenta kaj grandiozo senta, ili pli supre ol la aliaj sidas kaj sin pli altrangaj vidas. Ili absolute ne intencas demandi pri ies farto, nek okupas sin pri ies varto. Ili ne scias pri la eldiro de la saĝuloj: “Kiu malpli preĝas sed pli riĉas, tiu aspekte riĉas sed vere malriĉas.”

Filistro riĉa kaj kontraŭ pensuloj aroganta,  
estas azenpugo, eĉ se kiel bovo giganta.”

Mi diris: “Ne riproĉu ilin, ĉar ili estas anĝeloj de dediĉo.”  
Li diris: “Vi eraras, ĉar ili estas sklavoĵoj de riĉo. Kiel marta nuboj, ilia pluvo estas en dubo. Ili estas suno sed brilas nur kiel luno. Ili sidas sur ĉevaloj de senbezono, sed ne rajdas je mejlkvarono. Ili ne metas paŝon al Dia regno kaj ne donas dirhamon sen ĝena degno. Ili kolektas monon daŭre, tenas ĝin kaŭre kaj forlasas ĝin bedaŭre. La trezoro de avarulo elteriĝas, kiam li enteriĝas.

Iu monon ja per peno deponas,  
Alia sen peno ĝin disponas.”

Mi diris: “La avarcon de la riĉuloj rimarkas nur almozuloj. Se vi ne estus almozulo, egalus al vi avarulo kaj malavarulo. Provŝtono (11) scias kiu estas pura oro kaj almozulo scias kiu estas homo sen favoro. Li diris: “Laŭsperte mi diras, ke riĉuloj atendigas siajn vizitantojn ĉe la pordo, kaj ordonas la severajn pordistojn ne enlasi la petantojn kaj mensogi, ke la mastro ne estas hejme! Kaj ili pravas, ĉar:

Kiu ne saĝas, bonkoras, helpemas, bravas,  
Tiu ne estas hejme! La pordisto pravas.”

Mi diris: “Ĉar ili laciĝas pro petantomulto kaj krias pro la  
almozultomulto. Por plenigi la okulojn de la almozuloj mankos  
kapablo eĉ se perliĝos sur la dezerto ĉiu ero de sablo.

Ne satiĝos avidul’ per valuto,  
Nek per roso pleniĝos seka puto.

Kie ajn suferinto kaj humiligito troviĝas; tie, tiu sin avide  
en hororajn aferojn ĵetas kaj la konsekvencojn ne evitas. Li Dian  
punon ne estingas kaj inter permesitaĵoj kaj malpermesitaĵoj ne  
distingas!

Se al hundo oni ĵetas ŝtoneton,  
Ĝi ĝojas pensante, ke ĝi estas ost’.  
Se kadavron oni al tombo portas,  
almozulo pensas pri manĝo sen kost’. (12)

Sed la riĉulo pro Dia afablo jam estas favora kaj de malpermesitaĵoj fora. Mi, kvazaŭ ne dirinte ĉi tiujn vortojn kaj ne argumentinte konvinke, petas de vi juston. Ĉu vi iam vidis katenitan manon, malliberan ĉarlatanon, perfortitan virinon aŭ detranĉitan fingron, pro alia kialo ol malriĉo? Nobluloj, kiujn oni dum ŝtelo arestis, povas esti tiuj kun granda neceso. Okazas foje, ke la voluptemo de malriĉulo superas kaj li ne toleras kaj pekas. Ĉar stomako kaj peniso ambaŭ estas en la korpa centro kaj venas de la ventro. Ili dependas unu de la alia kaj defendas unu la alian. Mi aŭdis, ke oni malriĉulon arestis, kiu knabon incestis. Estis ne nur granda honto, sed ankaŭ risko de ŝtonekzekuto en estonto. Li lamentis: “Ho islamanoj, kion mi faru? Mi nek estas tiom riĉa por fari paron, nek tiom pia por eviti eraron.” En Islamo ne estas monaĥismo! (9) Inter la kaŭzoj de trankvilo ĉe riĉa popolo, estas idolo kun kiu ili ĉiunokte estas kune kaj per kiu ĉiutage ili aspektas pli june. Bela virino al kies brila naturo ĵaluzas la suno kaj al kies alta staturato, cipreso.

Ungon enmetis ŝi en sangon de amant’,  
Ruĝas ŝiaj ungoj jam kiel amarant’.

Do ne eblas, ke kun tiom bela amatino la riĉulo al malpermesitaĵo ekos, aŭ pekos.

Kies koron rabis belulino edena,  
Tiu al rabtriba belulin' (13) ne rigardas.  
Kiu jam havas apetitivekan daktilon,  
Tiu ja ŝtonbati daktilarbon ne ardas.

Ofte mizeruloj peke malpurigas la manon kaj malsatuloj ŝtelas panon.

Sovaĝ-hund' trovinte viandon ne demandas:  
Ĉu kamel' de Saleh, ĉu azen' de Kontraŭ-krist' (14)?

Kiom da virinoj pro malriĉo iĝis perversaj kaj la karajn famojn igis inversaj.

Ĉe malsato ĉasto ne eblas,  
Ĉe malhavo pio ja feblas.

Hatam la Tajano (15) loĝis en dezerto. Se li loĝus en urbo, la almuzuloj detruus liajn festojn kaj disŝirus liajn vestojn."

Li diris: "Mi kompatas ilin."

Mi diris: "Ne! Vi ĵaluzas pro ilia riĉo."

Ni varme diskutis kaj disputis. Ĉiun moviĝon de lia piediranto mi defendis kaj ĉiun sinmovon de lia reĝo mi respondis per mia ministro (16). Finfine ne restis ne uzita forto en lia vorto kaj ne pafita sago en lia saĝo.

Atentu atakon de elokventa retor',  
kies armiloj estas bombast' kaj metafor'.  
Alprenu kredon kaj scion ĉar bona aŭtor'  
ĉe forlasita fortikaj' estas en deĵor'.

Ne estis bezono al plia rezono: li malvenkis. Li komencis kvereli kaj krueli kaj tio estas tradicio de nescio; se vi ne regas fatalon, ekigu batalon. Same kiel Azar la Idol-skulptisto (17) kiu diskute ne povis venki Abrahamon kaj do ekigis malamon kaj

diris: “**Se vi ne ĉesos, mi ŝtonmortigos vin**” (18). La diskutanta derviŝo insultis min. Mi insultis lin. Li disŝiris mian pantalonon, mi kaptis lian mentonon...

Li falis sur min, kaj mi falis sur lin,  
Kaj aro da homoj ridis kaj vidis.  
Kun grandega miro kaj maladmira,  
la homamaso aŭdis nin kaj sidis.

Fine, ni iris ĉe kadio kun interkonsento pri akcepto de tio, kion verdiktos la juĝisto de islamanoj pri la diferenco inter riĉaj kaj malriĉaj homoj. La kadio, post informo pri niaj implikoj kaj aŭskulto al niaj logikoj, profunde ekpensis kaj post longa cerbumado diris: “Ho vi, kiu komplimentis la riĉulojn kaj turmentis la malriĉulojn, sciu, kie estas dorno apud floro, post ebrio venas langvoro, serpento troviĝas ĉe trezoro, kaj perlo ne atingeblas sen ŝarkhororo. Piko de la morto sekvas vivplezuron kaj ĝuo de la paradizo postulas abstinmuron.

Krom amikoj, estas malamikoj, kiuj punas.

Serpent’ kaj trezor’, dorn’ kaj flor’, ĝoj’ kaj malĝoj, ĉiuj kunas.

Ĉu vi ne vidas, ke en la ĝardeno estas kaj bela tulipo kaj seka ŝtupo? Ankaŭ inter la riĉuloj troveblas kaj dankemaj kaj mal-dankemaj, kaj inter la malriĉuloj kaj toleremaj kaj plendemaj.

Se perliĝus ĉiu rosoguto,

Perl’ senvaloriĝus, sen diskuto.

Proksimuloj de Dio, La Plej Glora kaj Plej Valora, estas tiuj riĉuloj, kiuj vivas derviŝe kaj tiuj derviŝoj, kiuj pensas riĉule. La plej granda riĉulo estas tiu, kiu helpas derviŝojn; kaj la plej bona derviŝo estas tiu, kiu ne bezonas riĉulojn. **Kaj por tiu, kiu konfidas je Allah, Li sufiĉas** (19).”

La kadio poste sin turnis de mi riproĉe al la derviŝo kaj diris: “Ho vi, kiu diris, ke la riĉuloj pro multe da diboĉo difektas,

Dion neglektas, kaj kiel ebruloj aspektas. Jes ja, iuj estas tiaj kaj laŭ vortoj viaj; riĉi sed ne dediĉi, porti kaj almeti ĝis putri kaj forĵeti. Se ekzemple ne pluvas dum longa tempo, aŭ detruas ĉion tempesto; pri la farto de malriĉuloj ili ne demandas, ĉar ilia provizo sufiĉe grandas. Ili ne timas Dion, La Plej Gloran kaj Plej Valoran, kaj diras:

Se pro malhavo, aliaj senanimas.  
Mi havas! Anaso ŝtormon ne timas.  
Kamelrajdantinoj sur la palankenoj  
ne rimarkas dronon, eĉ se ĝi proksimas.  
Malnobluloj, kiam savas sin tuj diras:  
“Mi ne zorgas se aliuloj viktimas.”

Jes, kelkaj estas tiaj laŭ eldiroj miaj. Sed kelkaj aliaj aranĝas grandan manĝotablon kaj prezentas grandan afablon, serĉas famon kaj amon en la mondo kaj postmorta mondo. Unu el ili estas lia moŝto, sinjoro de la popolo, mondo sub lia bonvolo, patrono de la islama metropolo, justeca simbolo, helpato de Dio, heredinto de la Salomona teritorio, venkinto en mondo kaj religio, Atabak Abibakr Saad (20), Dio daŭrigu liajn tagojn kaj flirtigu liajn flagojn:

Kiom vi afablis al la homaro,  
patro afablis al la fil' neniam.  
Dio faris vin reĝo de la mondo,  
ĉar Li ja ŝatis la idojn de Adam'.”

Kiam la kadio al tiu ĉi stadio alvenis kaj lian ĉevalon de juĝo pli ol niaj meritoj trenis; laŭ lia verdikto ni ĉesigis argumenton, faris interkonsenton, kaj forgesis la tutan eventon. Ni, post la kolero, marŝis sur la vojo de tolero, metis la kapon de respekto unu sur la ŝultro de la alia, kisis unu la aliajn je kapo kaj vizaĝo, kaj finis la aferon jene:

Ho derviŝo! ne plendu pri la epoko,  
Morti plende estas morti malfeliĉe.  
Ho riĉul'! Se doneman koron vi havas,  
Manĝu, donacu kaj gajnu ĉion riĉe.

(1) *Enspezojn oni purigas donante la religiajn impostojn.*

(2) *En Islamo oni devas preĝi en puraj vestaĵoj.*

(3) *Por tagnoktaj preĝoj oni devas povi sen aliaj zorgoj koncentriĝi nur pri Dio.*

(4) *Estas frazesprimo ĉe araboj, kiun oni uzas ĉe miro aŭ grava afero kaj kiu signifas: "Mi serĉas azilon/rifuĝon ĉe Dio pro rakontota okazo."*

(5) *Diro aŭ faro de Mohamedo aŭ ŝijajmaj imamoj. Vidu la vortareton!*

(6) *Viv-mondo kaj post-morta mondo. Vidu la vortareton!*

(7) *La diferenco inter derviŝo kaj almozulo. La unua uzas simplajn vestaĵojn ĉar li ne zorgas pri mondaj aferoj sed pri la spiritaĵoj. La dua uzas tiajn vestaĵojn por allogi homojn pagi.*

(8) *Ĉar religiuloj ofte uzas rozarion, hipokrituloj uzas ĝin por ricevi krediton ĉe la popolo.*

(9) *La frazo estas hadito (diro aŭ faro de Mohamedo aŭ ŝijajmaj imamoj).*

(10) *La Nobla Korano, ĉapitro 37, verso 42.*

(11) *Speciala ŝtono uzata de juvelistoj por difini la proporcion de oro, arĝento ktp.*

(12) *Estas tradicio regali la partoprenantojn en la funebra ceremonio.*

(13) *Jagma, turka tribo en centra Azio, de kie oni importis sklavinojn, kiuj onidire estis belegaj. La vorto Jagma en la persa signifas "rabo" kaj tiel Sadio ludis kun vortoj.*

(14) *Unu el la Koranaj profetoj, kies kamelo estas en la rakonto pri li. Kontraŭ-kristo (Antikristo) venos sur azeno dum la Releviĝa Tago laŭ islamismo. Vidu la vortareton!*

(15) *Hatam la Tajano, homo fama pro malavareco. Vidu la vortareton!*



(16) Sadio uzas ŝakludajn terminojn por priskribi la disputon. Reĝo/Damo en la persa ŝakludo estas Ŝaho/Veziro.

(17) Azar aŭ Azer estis laŭ iuj islamanoj la patro de Abrahamo, kaj laŭ iuj aliaj lia onklo. En Judismo, Terah. Ŝijaistoj absolute ne akceptas, ke la patro de profeto estu idoladoranto. Sadio estis sunaisto.

(18) La Nobla Korano, ĉapitro 19, verso 47.

(19) La Nobla Korano, ĉapitro 65, verso 3.

(20) La granda reĝo en Ŝirazo kiam Sadio vivis.

# Ĉapitro 8

## La Reguloj de Parolado

### Admono 1

Mono estas por vivkomforto; vivo ne estas por monkolekto. Oni demandis saĝulon: “Kiu estas feliĉa kaj kiu estas malfeliĉa?” Li diris: “Tiu feliĉas, kiu portis kaj konsumis, kaj tiu malfeliĉas, kiu mortis kaj ne gustumis.”

Ne preĝu por fiulo nenion farinta (1),  
neniam elspezinta kaj ĉiam ŝparinta.

*(1) Islamanoj preĝas apud la kadavro de ĵusmortinto.*

### Admono 2

Moseo, pacon al li, admonis Karun-on (1): “**Bonfaru kiel Allah bonfaras al vi!** (2)” Li ne aŭskutis; tamen vi nepre aŭskutis lian rakonton.

Kiu ne faris bonon per dirham’ kaj dinar’,  
Tiu perdis la vivon pro dirham’ kaj dinar’.  
Se vi ŝatas profiti ĉi-monde kaj poste,  
Kiel Di’ faris al vi, bonfaru al homar’!

Araboj diras: “Bonfaru sen atendo por repago kaj estu certa, ke vi profitas de tiu ago!”

Kie ajn radikis la bonfararbo,  
ties branĉoj superis la ĉielon.  
Se vi esperas ion manĝi de l’ arbo,  
per postul’ ne metu sur ĝi segilon.  
Ja danku al Dio pro via sukceso  
kaj pagoj kaj panoj kiujn Li provizis.  
Ne atendu repagon ĉar vi servas Lin!  
Repagu Lin, kiu vivon organizis!

*(1) Karun estis riĉa kaj avara kuzo de Moseo. Moseo ordonis lin pagi imposton sed li ne akceptis. Moseo malbenis lin kaj Dio sendis tertremon kiu enterigis Karun-on kaj lian havaĵaron. Vidu la vortareton!*

*(2) La Nobla Korano, ĉapitro 28, verso 78.*



### **Admono 3**

Du personoj senrezulte penis kaj vane sin ĝenis: perlaborinto sed ne konsuminto, kaj esplorinto sed ne plenuminto.

Eĉ se vi lernas multe da matematiko,  
matematikist' vi ne estos sen apliko.  
Kapablas nek profesori nek priesplori  
libroportanta azeno, sed nur labori.  
Por tiu sensaĝa best' ne estas afero,  
sur ĝi ĉu estu brulligno, ĉu studkajero.

## **Admono 4**

Islama teologio (1) servu al religiosekuro kaj ne estu ilo por monda plezuro!

Vendanto de scienc', piec' kaj abstin'  
plenigis grenejon kaj bruligis ĝin.

*(1) La vortoj “scienco” kaj “sciencisto” aludas al islamaj teologio kaj teologo (ulemo), respektive, en plej multaj okazoj sur la Florejo. Vidu la vortareton! Tiel Sadio rekomendas, ke ulemoj devas esti reale piaj.*

## **Admono 5**

Ulemo malpie kondukanta similas al blindulo torĉoportanta.  
Kiu vane sian vivon pasigis,  
Tiu ricevis nenion sed pagis.

## **Admono 6**

La regno pro kleruloj belaspektas kaj la kredo pro piuloj perfektas. La reĝoj bezonas maksimumon de kleruloj pli ol tiom, kiom la kleruloj bezonas intimon de reĝoj.

Ho Reĝo! Se vi deziras admonon,  
Jen la plej bona surgloba koncepto:  
Dungu nur klerulojn por gravaj taskoj!  
Sed mi dubas pri ilia akcepto.

## **Admono 7**

Tri aferoj ne longe daŭras: varo sen butikoj, scienco sen komunikoj kaj regno sen politiko.

Oni povas allogi ĉies koron,  
Kiam afablas parolmaniero.

Mala parol' similas al kolocint', (1)  
eĉ kune kun cent tasoj da sukero.

*(1) Tre akra frukto de samnoma herbo. Vidu la vortareton!*

### **Admono 8**

Favori maliculojn estas turmenti bonulojn, kaj pardoni tiranojn estas suferigi derviŝojn.

Maliculon se vi tro flegas,  
sub via flago, li pekegas.

### **Admono 9**

Ne indas fidi la amikecon de sultanoj kaj belan voĉon de infanoj, ĉar la unua maligias kiam la sultano suspektas, kaj la hariĝo de l' pubo la duan difektas.

Al milamika amat' ne lasu la koron,  
Kaj se vi donas, toleru disiĝdoloron!

### **Admono 10**

Ne malkovru ĉiun sekreton al via amiko, ĉar eble iam li malamikiĝos. Ne ofendu vian malamikon per ĉiu ebla metodo, ĉar eble iam li amikiĝos.

Sekreton, pri kiu vi deziras, ke ĝi restu sekreta, ne diru al aliaj, eĉ al via amiko fidela, ĉar li havas pliajn amikojn fidelajn, kaj tiel plu.

Silento ja superas sekreton  
diri kaj peti: "Ja ne pludiru!"  
Oni ne povas ŝtopi riveron.  
Krom de la komenco de akvoflu'.

Sekrete ne dirindas la vorto,  
kiu ne direblas al kohorto.

## **Admono 11**

Malforta malamiko, kiu obeas ordonon kaj petas pardonon, nenion celas krom fortiĝon. Kaj oni diris: “Oni ne povas fidi ŝatadon de amikoj, do kiel oni povas fidi flatadon de malamikoj? Tiu, kiu ne gardas sin kontraŭ malamiko mizera, similas al tiu, kiu ne zorgas pri fajro modera.”

Hodiaŭ mortigu lin se eblas!  
Pro fajreg ' povas forbruli Persi'.  
Ne permesu al malamik' pafi!  
Per arko pafu sagon tuj al li!

## **Admono 12**

Inter du malamikoj tiel parolu, ke en okazo de ilia amikiĝo vi ne hontu!

Similas al fajro, militekzisto.  
Raportist' similas al lignportisto.  
Malamikoj venos al paco onte,  
Li inter ili malfeliĉos honte.  
Malsaĝas fari fajron interhome:  
Ekzistas risiko de membrulo krome.

Parolu ĝentile inter amikoj,  
Oni misuzos ĝin por fia celo.  
Parolu atente ĉe ĉiu muro:  
Povas esti malantaŭ ĝi orelo.

## **Admono 13**

Kiu kun si pacigas malamikojn, tiu celas ĉagreni amikojn.  
Ho vi klera! Evitu tiujn amikojn,  
kiuj rendevuas viajn malamikojn.

## **Admono 14**

Se vi hezitas inter akcepto de taskoj, elektu la pli facile plenumeblan!

Kontraŭ ĝentiluloj ne kverelu!  
Kontraŭ pacemuloj ne ribelu!

## **Admono 15**

Se afero solviĝas per mono, ne indas endanĝerigi per opono.  
Se ĉiuj penoj ne portas savon,  
Indas en la mano preni glavon.

## **Admono 16**

Ne kompatu malamikon pro lia malforteco, ĉar li ne kompatos kiam li iĝos forta!

Ne fieru pro l' lipharoj, se malfortas malamik'!  
Estas medol' en ĉiu ost', viro en ĉiu tunik'.

## **Admono 17**

Kiu pereigas maliculon, tiu liberigas la popolon de lia malico kaj lin mem de la puno de Dio, La Plej Valora kaj La Plej Glora.

Laŭdinda estas pardonemo, tamen  
ne metu sur fiula vund' unĝventon!  
Tiu ofendas la idojn de Adam',  
Kiu kompatas venenan serpenton.

## **Admono 18**

Akcepti konsilon de malamiko estas eraro sed aŭskulti ĝin estas preparo por agi male kaj tio ja estas logika.

Kion malamiko diras, evitu,  
por ke poste pro tio vi ne pentu!

Ne iru se li montras vojon rektan,  
Sed vi iru vojon alidirektan!

### **Admono 19**

Troa kolero kaŭzas timon kaj malĝustatempa afablo detruas estimon; ne tiom kolero, ke oni malŝatu vin kaj ne tiom toleru, ke oni mastru vin.

Kolero kaj tolero kune iras.  
Sang-eltiristo kaj ŝiras kaj ŝmiras (1).  
Saĝulo faras nek tro da kolero,  
nek submetiĝon, nek tro da tolero.  
Saĝul' nek sin gloras, nek ĉiujn neas,  
nek sin malgloras, nek ĉiujn obeas.

Ŝafist' diris al la patro: “Ho saĝa!  
Diru al mi admonon de vir' aĝa!”  
“Bonfaru kara, sed ne tiom multe  
ke lupoj formanĝu vin tumulte!”

*(1) Temas pri la unĝento, kiun sang-eltiristo aplikas sur la haŭton. Sang-eltirado estas populara kuraca metodo en islamaj landoj.*

### **Admono 20**

Du personoj estas malamikoj de la lando kaj religio: reĝo sen pacienco kaj religiulo sen scienco.

Ne regu landon la reĝo,  
Kiu Dion ne obeas.

### **Admono 21**

Reĝo devas al siaj malamikoj ne tiom furiozi, ke liaj amikoj komencu pri lia fidindeco missupozi. La furiozŝajro unue bruli-



gas la furiozulon kaj poste ties flamoj eble jes aŭ eble ne atingas la malamikon.

Ne decas por terana adamido  
Tiom da fier', koler' kaj senbrido.  
Kun varma kaj malmilda karaktero  
Ĉu vi estas el fajro aŭ el tero?

En Bilekano (1) mi petis piulon:  
“Helpu min per viaj vortoj edukaj!”  
Li diris: “Aŭ toleru kiel la ter’!  
Aŭ viaj lernaĵoj iĝos kadukaj.”

*(1) Malnova malgranda irana urbo en la provinco Alborz.*

## **Admono 22**

Maliculo havas internan malamikon de kies konsekvencoj li ne povas eskapi kie ajn li iras.

Eĉ se li fuĝus al la ĉiel',  
li povas savi sin neniel.

## **Admono 23**

Kiam en la malamika armeo ne videblas ordo, vi restu en ordo; kaj kiam videblas ordo, vi ne restu en ordo!

Trankvile sidu kun viaj amikoj,  
kiam malamikoj faras kverelon!  
Kaj se vi vidas ĉe ili akordon,  
Pafu sagon, ŝtonon sur la kastelon!

## **Admono 24**

Kiam al ĉiu malico mankas efiko, malamiko strebas iĝi amiko. Tamen kiam li iĝas amiko, malicojn li faras pri kies apliko kapablas neniu malamiko.



### **Admono 25**

Frapu serpentkapon per malamikmano ĉar tio havos almenaŭ unu bonan rezulton: se la malamiko venkos, vi mortigos serpenton; kaj se la serpento venkos, vi forigos turmenton.

Militkampe vi ne imunas de malamiketo,  
Leone li atakas, kiam li sentas danĝeron.

### **Admono 26**

Se vi scias novaĵon, kiu iun ĉagrenos, tenu ĝin en via koro ĝis kiam alia homo ĝin maltenos.

Ho najtingal', raportu pri vintrofino,  
Malbonan informon lasu al gufino (1).

*(1) Najtingalo estas simbolo de ŝatinda birdo kaj gufo de abomeninda birdo.*

### **Admono 27**

Ne informu reĝon pri mallojaleco se vi ne certas pri ties akcepto, alie vi klopodas perdi vian vivon.


Ne parolu se vi ne scias  
ĉu via parolo funkcias!

### **Admono 28**

Kiu admonas obstinan personon, tiu mem bezonas admonon.

### **Admono 29**

Ne trompiĝu per ĉarlatano kaj ne pompiĝu per panegiristo, ĉar la unua metas kaptilon por vivteno kaj la dua etendas kaptikon por monpreno (1). Al malsaĝulo plaĉas laŭdo, kiel ŝafkadavro, kiu ŝajnas pli granda kiam la buĉisto blovas sub ĝia haŭto (2).



Ne aŭskultu panegiriston!  
Li laŭdas vin nur porprofite.  
Kaj se vi ne donos profiton,  
li komencas mallaŭdi spite.

(1) *Tio aludas al almozuloj, kiuj etendas tukon por kolekti monon.*

(2) *Por facile disigi la haŭton disde la viando, la buĉisto blovas sub la haŭto de la ŝafkadavro.*

### **Admono 30**

Se oratoro ne kritikiĝas, kiel perfektulo li ne kvalifikiĝas.  
Ne fieriĝu pro via bona diro,  
Laŭ via penso kaj stultula admiro.

### **Admono 31**

Al ĉiu, lia saĝo ŝajnas perfekta kaj lia filo belaspekta.  
Judo kaj islamano tiel disputis  
vere mi ekridis pro la parol-torent’.  
La islamano: “Ho Dio! Mortigu min  
kiel judon se falsas mia dokument’ (1)!”  
“Se mi mensogas mi tuj islamaniĝu,”  
La jud’ diris post ĵuro sur la Testament’.  
Neniu akceptas, ke li mem malsaĝas,  
nek en la okcident’, nek en la orient’.

(1) *Gabale en la persa signifas “dokumento” aŭ “ĉeko”. Tamen ĝi povas aludi al la hebrea “kabalo” ankaŭ.*

### **Admono 32**

Dek homoj pace manĝas ĉirkaŭtable, sed du hundoj ĉirkaŭkadavre bojas malafable. Postulema homo ne satiĝas per oceano,

sed kontentiĝema homo satiĝas per pano. Saĝuloj diras: “Riĉo pro kontento pli bonas ol riĉo pro arĝento.”

Eĉ per tuta mond’ ne venas postulema al satec’,  
sed kontentemula intesto pleniĝas per panpec’.

Kiam mia patro venis en mortzonon  
antaŭ forpaso, li diris ĉi admonon:  
“Volupto estas fajr’, nepre ĝin evitu!  
Pli varman inferofajron ne vizitu!  
Vi ja ne povos toleri tiun fajron,  
Verŝu estingakvon sur ĉi tiun fajron!”

### **Admono 33**

Kiu dum riĉeco ne favoras, tiu dum malriĉeco angoras.  
Pli malfeliĉan ol malicul’ mi ne konas,  
Ĉar li ne trovas helpon, kiam li bezonas.

### **Admono 34**

Ĉio rapide atinganta laŭron, havos nur mallongan daŭron.  
Mi aŭdis, ke porcelan-teler’ kreiĝas  
dum kvardek jaroj el orienta tero,  
Centoj fariĝas ĉiutage en Marvdaŝt (1);  
Certe kostas malmulte tia telero.

Kokid’ serĉas manĝon elirinte el ovo,  
sed al homido mankas saĝo kaj sinmovi.  
Rapide famiĝinta ne atingos alton,  
sed la mala superas ĉion per la povo.  
Vitro ĉie troveblas, do tio ne kostas,  
Juvelo ja estas kosta pro rara trovo.


*(1) Urbo proksime al la loĝurbo de Sadio, Ŝirazo.*

### **Admono 35**

Sukceso en pacienco kuŝas kaj hastemulo nur fuŝas.

Iam en dezerto mi mem estis vidanta,  
ke rapidantan devancis malrapidanta.

Rapidan ĉevalon galopo faris febla,  
Mala kamelo ankoraŭ estis rajdebla.



### **Admono 36**

La plej bona ago por malsaĝulo estas silento; kaj kiu agas  
laŭ tiu admono, tiu estas saĝa.

Se vi ne atingis al sciencrango,  
en la buŝ' ne moviĝu via lango!  
Homo senhonorigas per la lango,  
kaj per malfermiĝ', senkerna juglando.

Malsaĝulo edukis azenon  
uzante sian tempon kaj forton.  
Saĝul' diris al li: "Ho idiot'!  
Hontu! Ĝi havas alian sorton.

Ja lernu de bestoj silentecon!  
Bestoj ne lernos de vi eĉ vorton.”

Kiu antaŭ respond’ ne pripensas,  
Ties paroloj pli ofte sensencas.  
Aŭ parolu ĉiam inteligente!  
Aŭ ja restu kiel bestoj silente!

### **Admono 37**

Kiu diskutas kun pli saĝa persono por montri sian saĝecon,  
tiu montras sian malsaĝecon.

Kiam parolas homo pli talenta,  
Eĉ se vi scias pli, restu silenta!

### **Admono 38**

Kiu kun malbonuloj sidas, tiu bonecon ne vidas.

Lernos l’ anĝel’ akompanante diablon,  
teruron, perfidon kaj trompokapablon.  
El maliculoj vi lernos malhoneston,  
Neniam kudras vulpo ŝafpeltan veston.

### **Admono 39**

Ne malkaŝu difektojn de homoj, ĉar vi malhonorigas ilin kaj  
nefidindigas vin.

### **Admono 40**

Kiu lernis kaj ne uzis, similas al tiu, kiu plugis sed semadon  
rifuzis.

### **Admono 41**

Korpo sen honesta interno ne rekomendindas, same kiel  
fruktoŝelo sen sia kerno kiu ne vendindas.

## **Admono 42**

Ne ĉiu dum disputo bongesta, estas dum negoco honesta.  
Supoze estas beljuna trezoro,  
Fakte estas avino sub ĉadoro (1).

*(1) Virina vesto kiu kovras la tutan korpon krom la vizaĝon,  
kaj foje manojn kaj piedojn.*

## **Admono 43**

Se ĉiuj noktoj estus la nokto de Valoro (1), la nokto de Valoro estus sen valoro.

Se ĉiu ŝton' estus Badaĥšana (2) juvel',  
juvel' kaj ŝton' valorus je sama nivel'.

*(1) La nokto kiam la Nobla Korano revelaciigis komplete,  
krom la pasintaj partaj revelacioj.*

*(2) Lando kiu nun estas parte en Taĝikio kaj parte en Afganio.  
Ĝi estis fama pro juveloj.*

## **Admono 44**

Kiu havas vizaĝon kun belo, tiu ne nepre estas kondute anĝelo; la merito de frukto dependas de ĝia karno, kaj ne de ĝia ŝelo.

En tago malkovreblas de la ekstero,  
kiom iu scias kaj inteligentas.

Sed la grado de malico kaj perverso  
ja post jaroj ankoraŭ ne evidentas.

## **Admono 45**

Kiu kverelas kontraŭ personoj de alta rango, tiu sekvigas verŝiĝon de sia sango.

Ĉu vi pensas, ke vi altrangas?  
Ja la strabul' vidas unu du, (1)



Baldaŭ vundiĝos via frunto,  
Do kun virŝafo vi ne ludu!

(1) *“Strabulo” estas por humiligo. La frazo signifas ke malŝaĝulo vidas sin pli altranga ol la vero.*

### **Admono 46**

Batali kontraŭ leopardo kaj pugni kontraŭ ponardo estas kontraŭ singardo.

Kontraŭ ebriul’ maldecas batalo,  
Kontraŭ fortul’, malvenk’ estas fatalo.

### **Admono 47**

Malfortulo, kiu kun fortulo komencas batalon, por sia mortigo helpas la rivalon.

Dorlotitulo ne trapasas  
se al soldatoj li atakas.  
Molbrakulo vane ekbatalas,  
ja kontraŭ tiuj, kiuj fort-brakas.

### **Admono 48**

Senartuloj ne toleras artistojn, kiel strataj hundoj, kiuj pro ĉeesto de ĉashundo malĝojas kaj al ĝi bojas. Tio signifas, ke ordinarulo ne kapablas per arto rivali, do per akuzoj klopodas skandali.

Malforta enviul’ nur kalumnias,  
ĉar por rivali rimedon ne scias.

### **Admono 49**

Se malsato permesus, oni nenium birdon ĉasus kaj eĉ ĉasistoj la kaptilon forlasus. Saĝuloj manĝas sensuplemente, preĝemuloj

duonkontente, kaj piuloj malsatprevente. Sed junuloj manĝas la tuton en sia plado, kaj maljunuloj ĝis ŝvitado. Tamen voremuloj manĝas ĝis restas en la ventro neniu spirejo (1) kaj neniu manĝaĵo en la kuirejo.

Post vor', vorema ne dormas du noktojn:

Nokt' pro plen-stomak' kaj nokt' pro ventrovak'.

*(1) Kiam oni manĝas multe, oni ne povas spiri.*

### **Admono 50**

Konsulti virinon valoras same kiel nulo, kaj pekoplenas hel-po al koruptulo.

Se vi maliculon honore karesas,  
misuzante vian famon li agresas.

### **Admono 51**

Kiu antaŭ sia malamiko situas, tiu estas malamiko al si mem se tiun malamikon li ne detruas.

Ŝtono en mano kaj serpent' sur ŝtono,  
Heziti pafi estas sen rezono.

### **Admono 52**

Pri la ekzekuto, preferindas pripensado kaj diskuto. Ĉar la rajto restas longe: oni povas ekzekuton ordoni aŭ pardoni. Mortigo estas facila, sed ekzistas la probablo detrui oportunojn, kies reakiro estos malfacila.

Facilas iun de l' viv' ekskluzivigi,  
Tamen mortinton ne eblas revivigi.  
Ne malhaveblas al pafisto pacienc',  
Post paf' sagon haltigos neniu potenc'.

### **Admono 53**

Saĝulo kiu diskutas kun malsaĝuloj ne atendu honoron. Kaj ne estas mirinda se la malsaĝulo per nelogikaj rezonoj venkas la saĝulon; kvazaŭ ŝtono frakasas juvelon.

Ne mirindas se kanti ne kuraĝas  
najtingal', kiu kun korvo samkaĝas.

Se artiston suferigos malicul',  
L' artist' nek ĉagreniĝu, nek iru for!  
Se ŝtonaĉo frakasas oran vazon,  
Nek kariĝas ŝton', nek malkariĝas or'.

### **Admono 54**

Ne miru se saĝulo ĉe malsaĝuloj ne oratoras, ĉar harpo ĉe tamburo ne sonoras, kaj mosko ĉe ajlo fetoras.

Malsaĝul', kiu l' nukon firme tenas,  
kaj senhonte noblan saĝulon ĝenas,  
Ja ne scias ke ne estas egala  
kanto Heĝaza (1) al tambur' batala.

*(1) Tipo de muziko.*

### **Admono 55**

La juvelo, eĉ se ĝi falas en koton, restas trezora; kaj la polvo eĉ se ĝi supreniras en la ĉielon, restas senvalora. Talento sen eduko estas domaĝa, kaj eduko sen talento estas damaĝa. Ĉindro posedas altan originon ĉar ĝi estas ĉiela fajro. Tamen pro manko de prospero, ĝi valoras kiel tero. La valoro de sukero ne estas pro kano, sed pro ĝia gusta talismano.

Ĉar nature havis nenium virton Ĥam (1),  
esti profetid' fortigis lin neniam.  
Vian virton, ne rilaton, montru ĉiam!  
Venas el dorn' flor', el fajr' Abraham' (2).

*(1) Filo de Noa. Li malobeis la patron kaj ne venis en lian ŝipon, kaj malgraŭ fuĝo al montpinto, li dronis.*

*(2) Ĉar Abrahamo rompis idolojn, oni kondamnis lin al morto en fajro. Sed laŭ la volo de Dio, li ne brulis en la fajro. Ĉi tie fajro estas simbolo de malboneco kaj Abrahamo de boneco, samkiel estas dorno kaj floro.*

### **Admono 56**

La mosko estas tio, kio mem odoras ; ne tio, pri kio parfumisto oratoras. La saĝulo similas al parfumbotelo, silenta kaj artohave; sed la malsaĝulo similas al milita tamburo, malsilenta kaj kava.

Saĝulon inter homoj malsaĝaj  
tre bone komparis inĝeniulo,  
kun belulino inter blinduloj,  
Korano hejme de sendiulo.

### **Admono 57**

Ĉagreni malnovan amikon dum momento estas kontraŭ prudento.

Dum jaroj ŝtono iĝas juvelo,  
Ne frakasu ĝin per ŝton' momente!

### **Admono 58**

La saĝo estas tiel kaptita de la volupto, kiel edzo senpova pro edzino-korupto.

Fermu la pordon de bona destino  
tie, kie laŭte krias l' edzino.

### **Admono 59**

Sagaco sen potenco estas trompo, kaj potenco sen sagaco estas saĝorompo.

Sagaco, penso, saĝo, kaj poste reĝeco,  
ĉar malsaĝaj reĝ' kaj potenc' kontraŭas Dion.

### **Admono 60**

Noblulo, kiu manĝas kaj el sia riĉo disdonas, estas pli bona ol piulo kiu fastas kaj siajn riĉojn nur deponas.

### **Admono 61**

Se iu pro la popolo plezurojn ne plu ĝuas, tiu malpermesatan plezuron al permesata plezuro substituas.

Piul', kiu ne por Di' angule sidas,  
sur tiu nigra spegul' (1) nenion vidas.

*(1) Aludo al la malpia koro.*

### **Admono 62**

Malmulto sur malmulto fariĝas abundo kaj guto sur guto fariĝas inundo; tio signifas, ke malfortuloj tenu ŝtoneton por ĝustatempe venĝi kontraŭ uzurpanto.

Guto sur guto fariĝas rivero,  
Kaj river' sur river' fariĝas maro.

Malmulto sur malmulto iĝos multo,  
Gren' sur gren', grenej' estos la rezulto.

### **Admono 63**

Ne decas se ordinarulo ulemon per malĝentilaĵo ĝenas kaj la ulemo tion eltenas. Tio misefikas sur ambaŭ, malsaĝon de la ordinarulo fortigas kaj dignon de la ulemo mortigas.

Paroli kun malnoblulo afable  
pliigas lian orgojlon diable.

## **Admono 64**

Peko, farita de kiu ajn, estas maldeca; des pli de ulemoj. Ĉar religio estas armilo kontraŭ satano kaj kiam oni kaptas armiton, la honto atingos sian zeniton.

Ordinarulo naiva kaj simplaviva  
pli bonas ol sciencisto voluptmotiva.  
Ĉar la unua blinde pasigis vivtuton,  
Sed duokule la dua falis en puton.

## **Admono 65**

Vivado dependas de ĉiu bato de la koro kaj la vivo estas koridoro inter du neestoj. Vendantoj de siaj religioj faras stulte kiel vendantoj de Jozefo kontraŭ malmulte. „**Ĉu Mi ne ordonis al vi, idoj de Adam, ke vi ne adoru Satanon?**” (1)

Pro malamiko, amikecon vi frakasis.  
Vidu! Kiun vi tenis, kiun vi lasis. (2)

(1) *La Nobla Korano, ĉapitro 36, verso 61.*

(2) „*Vendi sian religion*” signifas ne obei religiajn regulojn. „*Vendi Jozefon*” aludas al la Korana rakonto pri la fratoj de Jozef kiuj faligis lin en puton. „*Malamiko*” signifas neatento al la religio, kaj „*amikeco*” estas religiemo.

## **Admono 66**

Nek satano kun sinceruloj kuniĝas, nek sultano kun mizeruloj.

Al nepreĝanta hom' ne donu prunte!  
Eĉ se li rigardas vin sulkafrunte.  
Kiu ne redonas la ŝuldon al Di',  
por tiu ne gravas la ŝuldo al vi.

Hodiaŭ kvarmane li prenas kuvon (1).  
Morgaŭ li diras: “Prenu tie uvon (2)!”

(1) *“kvarmane” estas por emfazo, “kuvo” estas por kolekti monon.*

(2) *“uvo” el lia ĝardeno kiel redono.*

### **Admono 67**

Nur la nomon de tiu homo postmorte oni citas, de kies mono antaŭmorte oni profitas. La vinberguston scias vidvino, ne kultivisto de la beroj por vino. Jozefo la verdiranto, saluton al li, en la seka jaro de Egiptio, restis malsata, por ke neniu mizerulo estu forgesata.

Kiu vivas en komforto kaj riĉo,  
ja ne scias pri manĝomalsufiĉo.  
Ja prave pri mizeruloj atestas,  
Nur tiu, kiu inter ili estas.

Ho rajdanto de galopĉevalo!  
Vilaĝana azen' pene strebas.  
Ne petu fajron de mizerulo!  
Nur ve-spiro sur lia forn' ŝvebas.

### **Admono 68**

Nur tiam demandu pri la farto de derviŝo mizera en jaro malprospera, kiam donacante malabundon vi celas kuraci lian vundon.

Se ŝarĝazen' blokiĝis en koto,  
kompatu ĝin sed de malproksimo!  
Tamen, se vi aliras proksimen,  
Je la vosto tiru ĝin el ŝlimo!

### **Admono 69**

Logike ĉion difinas la sorto: kvanton de via gajno kaj tempon de via morto.

Larmoj aŭ veoj, blasfemoj aŭ plendoj,  
per nenio ŝanĝiĝas ies destin'.

L' anĝelo respondeca pri la vento  
ne tristas pro lampomorto de vidvin'.

### **Admono 70**

Ho vi, kiu manĝaĵon serĉas: Sidu ĉar vi baldaŭ manĝos! Kaj  
ho vi, kiun morto serĉas: Haltu ĉar vi nenion ŝanĝos!

Ĉu vi klopodas gajni ion, ĉu ne,  
Donos Di', kiu gloras kaj valoras.  
Se l' kapon vi metos en leonbuŝon,  
krom dum via mortotag', ĝi ne voras.

### **Admono 71**

Nedestinitaĵon oni ne povas preni per la mano kaj destini-  
taĵon oni povas preni eĉ per la kalkano.

Aleksandr' iris ĝis Eternmallumo,  
Ne li, sed Ĥedr sukcesis en plenumo (1).

*(1) Aleksandro, la granda, vojaĝis al nordaj mallumaj landoj  
por trovi fonton kies akvo donis longan vivon. Sed malgraŭ ĉiuj  
turmentoj li ne sukcesis. Ĥedr estis profeto (aŭ religiulo), kiu tro-  
vis ĝin kaj trinkis kaj vivis longe.*

### **Admono 72**

Krom dum sia kaptotago, fiŝisto ne kaptas fiŝon eĉ de la Ti-  
gris-rivero, kaj krom dum sia mortotago fiŝo ne mortas eĉ sur  
seka tero.

Serĉas mizerul' kun fi-destin'  
ĉie manĝaĵon; kaj morto, lin!

### **Admono 73**

Ĉarlatana riĉulo estas orita kotpeco kaj pia derviŝo estas pol-  
va beleco. Tiu ĉi estas Mosea robo, ŝirita, kaj tiu estas Faraona  
barbo, orŝmirita.



## **Admono 74**

Bonula sufero hastas al malapero kaj malicula prospero falas je efemero.

Kiu havas riĉon kaj prosperon  
sed mizerulojn ne konsideras,  
Sciu, ke per tiuj riĉ' kaj prosper',  
alimonde ja li ne prosperas. (1)

*(1) Temas pri postmorta mondo. Vidu la vortareton!*

## **Admono 75**

Ĵaluzulo ne ricevas favoron de Dio, kaj kulpigas alian pro tio.

Fanatikan viron mi vidis  
enviantan al nobla riĉul'.  
Mi diris: "Se vi malfeliĉas,  
ja ne kulpas tiu feliĉul'."

Ne deziru suferon por enviul'  
ĉar ja estas en sufer', mizera li.  
Kial vi ŝatas malamiki al li?  
Li ja havas malamikegon en si.

## **Admono 76**

Studento sen intereso estas fianĉo sen dirham-milo (1); vojaĝanto sen informo estas birdo senflugilo; sciencisto sen praktiko estas palmo sen daktilo; kaj piulo sen scio estas pordo sen ŝlosilo.

*(1) Sufiĉe da mono por edziĝi.*

*(2) Scienco aludas al islama teologio.*

## **Admono 77**

La celo por sendi la Koranon al homoj estis bonigi ilian konduton, ne belvoĉe laŭtlegi la tuton. Pia ordinarulo estas piediranto, kiu iras ĝis la celo, kaj malserioza scienculo estas ĉevalrajdanto, kiu dormas survoje en hotelo. Pekulo, kiu veteranas, pli bonas ol preĝanto, kiu pekon planas.

Kolonelo, kiu plaĉas kaj serenatas,  
pli bonas ol ulem', kiu homojn ĝenas.



## **Admono 78**

Iun oni demandis: “Al kiu similas sciencisto sen praktiko?”  
Li respondis: “Al abelo sen mielo.”

Ordonu tiun senutilan abelon:  
“Ne piku min, se vi ne donas mielon!”

## **Admono 79**

Viro, kiu ne bravas, estas virino; kaj ermito por kiu mono gravas, estas bandito.

Malgraŭ tio, ke vi vestis vin blanke,  
nigras en vivolibro via rubrik'.  
Ne atingos mondaĵojn via mano,  
ĉu longa ĉu mallonga via manik'. (1)

*(1) Longa maniko estis simbolo de riĉo kaj inverse.*

### **Admono 80**

Por du personoj sopiro el la koro kaj piedo de malprofito el koto neniam eliras: komercisto, kies varŝipon tempesto rompis, kaj heredinto, kiun ĉarlatano trompis.

Ĉe derviŝoj via sango verŝeblas,  
Se el via riĉ' ne estos dediĉo.  
Aŭ ne pasigu tempon kun sufioj,  
aŭ ne okupiĝu pri dom' aŭ riĉo.  
Aŭ ne amikiĝu kun elefantoj,  
aŭ faru domon kun grandecsufiĉo.

### **Admono 81**

Reĝa kostumo estas luksa, sed ankaŭ malnova vesto estas solena; riĉula bankedo estas bongusta, sed ankaŭ seka panpeco estas gustoplena.

Pli bonas via vinagr' sur legomoj  
ol vilaĝestra ŝafaĵo kun terpomoj.

### **Admono 82**

Estas kontraŭe al la ĝusta itinero kaj male al la saĝula konsidero, uzi medikamenton nur supoze, aŭ vojaĝi sur ne konata vojo eksterkaravane. La granda imamo Gazali (Dio benu lin!) (1) estis demandita: "Kiel vi atingis tian rangon en la scienco?" Li respondis: "Mi ne hontis demandi kiam mi ne sciis ion."

Estas espero pri kuraciĝo nur  
se montri pulson al lerta kuracist’!  
Ja demandu pri ĉio ne sciata!  
Ĉar demando faros el vi sciencist’.

*(1) Abu-Hamid Mohamad al-Gazali, fama filozofo, teologo,  
kaj juĝisto irana (1058–1111 p.K.)*

### **Admono 83**

Ne hastu demandi pri afero, kiu certe malkovriĝos al vi, ĉar alie via pozicio malaltiĝos.

Lukmano, vidinte ke mirakle (1)  
per la David-manoj vaksiĝas fer’.  
Ne demandis kiel li plenumis,  
Ĉar evidentiĝos tiu afer’.

*(1) Lukmano estis homo fama pro saĝeco. Vidu la vortareton!*

### **Admono 84**

Kondiĉo por amikeco estas aŭ parolo aŭ forlaso de tiu rolo.

Rakontu laŭ aŭdanto-gusto  
por vekti aŭskultemon en li.  
Saĝulo sidanta kun Maĝnun  
devas paroli nur pri Lejli (1)!

*(1) Maĝnun kaj Lejli faris faman romantikan paron en la  
araba kaj persa literaturoj. Vidu la vortareton!*

### **Admono 85**

Kiu sidas kun maliculoj, eĉ se al tiu ne efikos ilia naturo, tiu estos akuzata pro konduto laŭ ilia kulturo. Kaj se tiu por preĝi iras en ruinon, oni akuzas tiun drinki vinon.



Certe por malsaĝo vi fariĝos simbol'  
elektante malsaĝulon por kunparol'.  
Respondis saĝul' al peto pri admono:  
“Ja ne intimu al malsaĝa persono!”  
Se vi saĝas, tamen agas vi malsaĝe,  
Se vi estas malsaĝa, eĉ pli malsaĝe.

### **Admono 86**

Toleremo de kamelo estas fama. Se knabo prenos ĝian bridon kaj rajdos ĝin cent mejlojn, ĝi ne malobeas. Sed se antaŭe estos profunda valo kaj risko de falo, ĝi haltas kaj ne obeas. Kolero ne decas kontraŭ ĉiu kolero. Oni diras: “Malamiko per kareso ne fariĝas amiko, sed akriĝas lia piko.”

Estu la ter' sub la pied' de favoranto,  
Sed plenigu agresantokulojn per tero!  
Ne parolu afable kun malnobla homo!  
Fajlil' ne forprenas ĉiun ruston de fero.

### **Admono 87**

Kiu ekparolas kiam alia ankoraŭ parolas, por montri sian avantaĝon, tiu montras sian malsaĝon.

La saĝulo neniam respondas,  
kiam oni de li ne demandas.  
Ĉar eĉ se grandas la parol-valor',  
oni pensas, ke tio malgrandas.

### **Admono 88**

Mi suferis de vundo sub mia vesto kaj la Ŝejko ĉiutage demandis pri ties stato sed ne pri ties loko. Mi komprenis, ke li evitas ĉar pro ĝentilo kelkajn organojn oni ne citas. La saĝuloj diris:” Kiu parolas senpense, tiu ne ĉagreniĝu se oni respondos intense.

Ne malfermu la buŝon por paroli  
antaŭ ol paroltaŭgon konsideri!  
Ja diri la veron kaj malliberi  
pli bonas ol mensogi kaj liberi.

### **Admono 89**

Mensogemo similas al grava vundo: Eĉ se oni bone kuracas ĝin, restas ĝia cikatro. Kiel la fratoj de Jozefo, kiuj fifamiĝis pro mensogo al kies verdiro oni eĉ ne fidis . “**Li diris: Ne! Viaj animoj igis malbonan aĵon ŝajni al vi bela. (1)**”

Kiu kutime diras veron,  
Ties kulpon oni pardonas.  
Kaj al verdir‘ de mensogulo  
ja neniu atenton donas.

*(1) La Nobla Korano, ĉapitro 12, verso 84.*

### **Admono 90**

Verŝajne homo estas la plej kara estulo, kaj hundo la malplej kara. Tamen laŭ ĉiuj saĝuloj, dankema hundo estas pli bona ol nedankema homo.

Hundo ja ne forgesas manĝpecon,  
eĉ se vi ĵetas al ĝi cent ŝtonojn.  
Sed se longe vi favoras aĉulon,  
Pro kolereto, li forgesas bonojn.

### **Admono 91**

Diboĉemulo arton ne kapablas kaj nobeleco de senartulo ne agrablas.

Ja ne afablu al pezŝarĝa bovo!  
Ĉar egas lia manĝ’ kaj etas movo.  
Dikiĝu se esti bov’ vi deziras,  
Azen’ maldikas ĉar ĝi nur ŝarĝtiras.

## **Admono 92**

Estas skribite en Biblio: “Ho adamido! Se Mi donas al vi riĉon, vi okupiĝas pri viaj havaĵaro kaj familio; kaj se Mi mizerigas vin, trafos vin melankolio. Do, kiam vi vin okupos pri evangelio kaj preĝo al Dio?

Foje fieraj kaj neglekta pro riĉo,  
Foje laca kaj malgaja pro mizero.  
Kiam vi sin okupas pri Eternulo?  
Tia vi, dum espero kaj malespero.

## **Admono 93**

Dia volo eksigas iun de lia soleno, kaj zorgas alian en la fiŝabdomeno.

Via citant' ĉiam restas bona,  
eĉ balenstomake kiel Jona. (1)

*(1) Profeto, kiu restis dum iom da tempo en la stomako de fiŝego.*

## **Admono 94**

Se Dio prenas la glavon, Li trafas profeton kaj avon; kaj se Lia favoro zenitas, maliculo kaj bonulo ambaŭ profitas.

Se releviĝtage Li malkontentigas,  
Ne efikas propeto de profeto.  
Malkovru Vian afablan vizaĝon,  
por ke restu esper' de pardonpeto!

## **Admono 95**

Kiu malgraŭ viveduko ne elektas la ĝustan vojon, tiun punos la sorto iun fojon. “**Vere Ni igos ilin gustumi la proksiman turmenton antaŭ la pli terura turmento.**” (1)



Grandula voko estas admon' kaj poste ĉen',  
Se vi ne obeos la vokon, poste katen'.

(1) *La Nobla Korano, ĉapitro 32, verso 22.*

### **Admono 96**

Feliĉuloj lernas de la rakontoj kaj spertoj de siaj antaŭuloj pli ol tiom, kiom iliaj posteuloj lernas de siaj (1). Ŝtelistoj ne tiras siajn manojn, ĝis oni tiras ilian manon for (2).

Kokino ne aliras al grajno  
vidante kokinon en prizono.  
Lernu de alihomaj suferoj,  
Ke ne iĝi via viv' admono.

(1) *Temas pri 3 generacioj.*

(2) *Oni tranĉas la manon de ŝtelisto dum certaj kondiĉoj kiel puno en Islamo. Vidu la vortareton!*

### **Admono 97**

Kiu havas surdan akceptorelon, tiu obei ne povas; kaj kiun la feliĉŝnuro altiras, tiu nepre sin movas.

Malhela nokt' de Diamantoj  
brilas ja kiel hela tago.  
Se Li ne donas ĉi feliĉon,  
Oni ne akiras per brako.

Al kiu mi plendu pri Vi, la nura juĝist',  
Rango pli supra ol Via rango ne estas.  
Kiun Vi estras, tiu la vojon ne perdas;  
Kiu Vin perdas, tiun alia ne estras.

### **Admono 98**

Esti feliĉulo malriĉa pli bonas ol reĝo malfeliĉa.

Se vi gajiĝas post malgajo,  
Pli bonas ol malgaj' post gajo.

### **Admono 99**

La tero ricevas de la ĉielo favoron kaj la ĉielo ricevas de  
l' tero pulvoron. El ĉio sekreciiĝas tio, kio estas en ĝi.

Se al vi mia kondukt' ŝajnas fia,  
Vi daŭre agu laŭ la bona via.

### **Admono 100**

Dio, la plej glora kaj la plej valora, vidas kaj toleras sed naj-  
baro ne vidas kaj koleras.

Ni rifuĝas al Alah', se homoj estus sekretsciaj,  
Neniun lasus trankvila kaj komforta la aliaj.

### **Admono 101**

Oro akireblas el mino per ago minista kaj el avarulo per ago  
insista.

Kelkaj eĉ panon ne manĝas kaj monkollektas,  
Kredante, ke esper' pli bonas ol konsumo.  
Iam vidu ilin laŭ malamika plaĉo:  
Mono restis kaj ili en mortkostumo.

### **Admono 102**

Kiu siajn subulojn ne pardonas, tiu ŝajne la pardonon de sia  
superulo ne bezonas.

Neniu homo kun fortaj brakoj  
iel rompu brakon de malfortul'!  
Ne ĝenu koron de malfortuloj!  
Por ne doni samrajton al fortul'!

### **Admono 103**

Kiam estas malpaco, la saĝulo saltas; kaj kiam estas paco, li haltas. Ĉar tie sekuro estas ekstercentre, kaj tie ĉi sukero estas centre.

### **Admono 104**

Vetludisto bezonas tri sesojn sed venas tri unuj (1).

Milfoje paŝteĵ' ol konkursej' pli bonas,  
Sed al ĉevalo la rajdanto ordonas.

(1) *Temas pri ĵetkubo.*

### **Admono 105**

Derviŝo preĝis: “Ho Dio! Favoru malicajn homojn! Ĉar bonajn Vi jam favoris, kiam per boneco ilin gloris.”

La unua persono, kiu desegnis sian vestaĵon, estis Ĝamŝid (1), kaj la unua persono, kiu metis fingroringon, estis li mem. Oni demandis lin kial li metis la ringon sur fingron de la mano maldekstra kiam la dekstra estas estra. Li respondis: “La dekstra estas ornamita per dekstreco kaj ĉiu alia oranamaĵo estos ekstra.”

Ferejdun (2) ordonis al ĉinaj pentristoj  
pentri sur lia tendo ornamoriĉa:

“Ho saĝulo! Bonfaru al malbonuloj!  
Ĉar bonul' mem estas riĉa kaj feliĉa.”

(1) *Prahistoria persa reĝo.*

(2) *Alia prahistoria persa reĝo.*

### **Admono 106**

Eminentulon oni demandis: “Malgraŭ la meritaro ekstra havata de la mano dekstra, kial la ringo estas sur la mano maldekstra?”

Li respondis: “Ĉar ofte tiu ne profitas, kiu vere meritas.”  
Kiu kreis ĉiun bonan cirkonstancon,  
tiu ja donas aŭ meriton aŭ ŝancon.

### **Admono 107**

Tiu admonas reĝojn, kiu nek timas teroron, nek ŝatas oron.  
Ĉu verŝi sur diista pied’ oron,  
ĉu minaci per glav’ sur lian koron,  
lin ja ne timigas iu krom Dio,  
tial ke diism’ baziĝis sur tio.

### **Admono 108**

Reĝo estas por forigi tiranojn, polico por forigi rabobandanojn, kaj juĝisto por forigi ĉarlatanojn. Kiam du homoj kontentas, ili neniam ĉe juĝisto argumentas.

Vi scias, ke vi devas ŝuldon pagi,  
Pagu en paco kaj evitu ies krion!  
Se iu ne pagas sian imposton mem,  
Tiu ja pagos ĝin kaj honorarion (1).

*(1) Krom imposton, oni devis pagi honorarion al la polico.*

### **Admono 109**

Oni uzas acidon por moligi ĉion, krom juĝistkoron, por kiu oni uzas monon.

Se per kvin kukumoj la kadion vi subaĉetas,  
Vian posedon de dek melonkampoj li asertas.

### **Admono 110**

Nenion povas fari maljuna putino kaj eksa policano, krom penti pro siaj malĉastoj kaj help- prokrastoj, respektive.

Juna preĝant' estas Di-voja leono,  
sed maljuna estas leon' sen impono.

Junulo devas de diboĉoj sin protekti,  
Ĉar maljuna kac' mem ne povas sin erekti.

### **Admono 111**

Oni demandis filozofon: “Tiom multajn famajn kaj altajn arbojn kreis Dio, La Plejglora kaj Plejvalora. Sed neniu el ili estas fama pro libereco krom cipreso. Kial?” (1)

Li respondis: “Ĉiu arbo havas sian frukton. Kiam aperas fruktoj, ĝi gajas; kaj kiam ili malaperas, ĝi malgajas. Cipreso ne havas frukton, kaj ĉiam estas gaja. Kaj tio estas eco de liberuloj.”

Ne zorgu pri efemeraĵoj, ĉar Tigris'  
post kalifo trapasos Bagdadon sen ĉes'! (2)  
Se vi povas, disdonacu kiel palmo!  
Kaj se ne, estu libera kiel cipres'!

*(1) Cipreso estas simbolo de libereco en la persa kulturo.*

*(2) Post la ekziĝo aŭ morto de kalifo, la rivero restos.*

### **Admono 112**

Du personoj mortis kaj sopiron kunportis: tiu, kiu havis kaj ne utiligis, kaj tiu, kiu sciis kaj ne aplikis.

Ja neniu jam vidis avaran noblulon  
ne estintan viktimo de multaj suspektoj.  
Sed se malavarulo faris ducent pekojn,  
Sub lia malavar' kaŝiĝas la difektoj.

## Finaj vortoj

Danke al la favoroj de Alaho, kompletigis la libro Florejo (Golestan). Helpe de Dio, estu honorata Lia nomo, malgraŭ la tradicio de la verkistoj ne aperis verso de antaŭuloj prunt-prene en ĉi tiu libro.

Sian malnovan vestaĉon surmeti  
pli bonas ol fremdan robon pruntpeti.

Plejmulte la Sadiaj eldiroj estas humuraj kaj plezuraj. Tial la riproĉlango de senpripensuloj longiĝas, ke troa cerbumo, uzo de plumo, kaj spiro de lampfumo kontraŭas al la saĝo. Tamen, laŭ la ideo kaj idealo de pensemuloj, kiuj estas la ĉefaj cellegantoj, maksimumoperloj estis vicigataj sur frazozarioj kaj amara siropo de admono estis miksita kun dolĉa mielo de komiko, por ke ilia ofendiĝema naturo ne perdu la profiton de akcepto. **“Estu laŭdegata Allah, Sinjoro de l’ Universo!”** (1)

Laŭ mia pozicio, mi admonis,  
kaj parton de mia vivo fordonis.  
Ja ne gravas se oni ne atentis,  
Kurier’ nur la mesaĝon prezentas.

Ho vi leganto! De Alaho petu  
benon por l’ aŭtoro de ĉi verko!  
kaj poste bonan vivon por vi mem,  
kaj pacon por l’ aŭtor’ en la ĉerko!

(1) *La Nobla Korano, ĉapitro 1, verso 2.*



# Vortareto

## **Abu Hurajra**

Unu el la disĉiploj de Mohamedo. Iam la profeto vidis lin ludantan kun kato kaj nomis lin Abu Hurajra (paĉjo de la kato, katemulo).

## **Ajaz**

En la persa literaturo multas rakontoj pri la (samseks)amrilatoj inter Sultano Mahmud la Gaznavida kaj lia plej amata sklavo/servisto (poste generalo) Ajaz.

## **Alaho**

Dio en la araba lingvo, ankaŭ en Islamo kaj la Nobla Korano. En ĉi tiu libro, plej ofte “Dio” estis uzata anstataŭ ĝi. Sed en la cititaj linioj de la Nobla Korano, konforme kun la traduko de Italo Chiussi, “Allah” estas uzata.

## **Alia mondo**

La mondo post la morto en tiu ĉi mondo. Kredo je la alia mondo estas unu el la bazoj de islameco. La vivo en la alia mondo estas eterna kaj ĝia kvalito dependos de agoj kiujn oni faris en tiu ĉi mondo.

## **Atabak**

La nomo de reĝoj de la dinastio Atabakoj de Ŝirazo (1148–1287 p.K.). Ili havis turkmenan originon kaj regis la sudan parton de la nuna Irano, Bahrejnjon kaj Omanon. La ĉefurbo estis Ŝirazo kie vivis Sadio. Atabak estas turkdevena vorto signifanta “granda patro”.

## **Atabak Abubakr**

La reĝo samtempa kun Sadio. Li pli vastigis la regnon de la Atabakoj. Li anstataŭis sian patron Saad kaj havis filon samnoman.

## **Atabak Saad**

La princo de kies nomo venis la titolo de Sadio (“Sadi” en la persa signifas rilata al Saad). Li tre ŝatis poetojn, interalie Sasion. Kiam lia patro mortis, li estis for de Ŝirazo, kaj dum reveno por fariĝi reĝo li ankaŭ mortis.



## **Bozorgmehr**

Bozorgmehr-e Bohtagan, ankaŭ konata kiel Buzarĝomehr kaj Dadmehr, estis irana nobelo de la familio Karen, kiu oficis kiel ministro de la dinastio Sasanidoj en la 6-a jarcento p.K. . Bozorgmehr estis homo kun “esceptaj saĝeco kaj saĝaj konsiloj” de kiu restis multaj konsiloj. Lia nomo aperas en pluraj gravaj verkoj en persa literaturo, plej precipe en *Ŝahname* de Ferdoŭsi.

## **Derviŝo (sufio, sufiisto)**

Sufiismo estas Iran-Islama mistikismo, inkluzive de derviŝismo kaj koncernaj ritoj. Derviŝo (sufio, sufiisto) estas adepto de ĝia praktika rituro. Krom la priskriboj de Plena Ilustrita Vortaro, derviŝo estas preskaŭ alia sinonimo por la vortoj sufio, mistikulo, pia solulo, ermito k.s. se temas pri praktika rituro. Se temas pri nur sufiismaj kaj teozofiaj ideoj, la ulo nomiĝas Aref kaj la skolo: Erfan (io entenanta sufiismon, teozofion kaj mistikismon).

Ankaŭ, plej ofte mizera kaj malriĉa homo; islama monaĥo; homo, kiu ne interesiĝas pri manĝado, diboĉo, mono, vestaĵo kaj similaj aferoj.

## **Dirhamo** (neologismo)

Monunuo iam uzata en Persio kaj ankoraŭ en kelkaj aliaj landoj. Ĝi rilatas al la greka drakmo (draĥmo). Nun dirhamo estas uzata en sep landoj kiel ĉefa aŭ era monunuo (kvin arabaj landoj, Armenio kaj Taĝikio).

## **Emiro**

Titolo por reĝo, princo aŭ generalo en islamaj landoj.

## **Ferejdun**

Irana mita reĝo de la mita dinastio Piŝdadian. Li batalis kontraŭ la mita kruela reĝo Zahak, kaj venkinte lin fariĝis la reganto.

## **Hadito** (neologismo)

Eldiroj kaj faroj de Mohamedo aŭ ŝijaaj imamoj. Hadito estas la plej bona fonto por islamaj kredoj post la nobla Korano.

## **Haĝo**

Ĉefa pilgrimado de islamanoj al Mekko. Okazas unu fojon dum la jaro. La pilgrimado estas deviga por ĉiu riĉa islamano almenaŭ

unu fojon dum la tuta vivo. Tamen oni povas pilgrimi ekster la fiksita tempo laŭvole.

### **Harun Alraŝid (Harun-al-Raŝid en Plena Ilustrita Vortaro)**

Araba reĝo/kalifo de la abasida dinastio (766–809 p.K.). La heroo de multaj fabeloj el “La mil kaj unu noktoj”.

### **Hatam la Tajano**

Malavara araba poeto (?–578 p.K.), kiu vivis en dezerto kaj emis regali homojn. Simbolo de malavareco. Taj estas la nomo de lia tribo.

### **Heĝazo**

Parto de Sauda Arabio, etendiĝanta laŭlonge de la Ruĝa Maro (PIV). Mekko kaj Medino situas en Heĝazo.

### **Homa**

Legenda birdo, simbolo de feliĉo en la persaj kulturo kaj literaturo. Se ĝi eksidas sur ies ŝultron, tiu fariĝos feliĉa.

### **Ĥorasano**

La granda provinco de Irano. Kiam ĝi estis en sia la plej granda vasteco, ĝi inkluzivis almenaŭ partojn de Afganio kaj Turkmenio, kaj eble Uzbekio, Taĝikio, kaj Kazaĥio. La iranan provincon oni dividis antaŭ kelkaj jaroj al tri: norda, suda kaj centra (Razavi, Rezaa) Ĥorasanoj.

### **Imamo**

Estro aŭ gvidanto. La uzo de tiu vorto estas tre vasta. Kiam kelkaj islamanoj kune preĝas, unu el ili povas stari antaŭ la aliaj kiel imamo. En vendredaj publikaj preĝoj, imamo havas la saman rolon kaj ankaŭ prelegas por la publiko (vendreda imamo). Por gravaj religiuloj kaj eĉ religiuloj-regnestroj oni uzas ĝin. En ŝijaismo, krom la ĝenerala signifo de tiu vorto, ekzistas 12 imamoj kiuj estis la posteuloj de Mohamedo sinsekve.

### **Jona**

La profeto kiu pasigis tri tagojn en la ventro de fiŝego.

## **Kaabo**

La vorto en la araba signifas kubforma. Kubforma konstruaĵo meze de la granda moskeo de Mekko kiu estas la loko por la ĉefa pilgrimado de islamanoj, haĝo. Ankaŭ en la direkto de Kaabo islamanoj preĝas (Kiblo). Laŭ la rakontoj, ĝin konstruis Adamo. Alia nomo por ĝi estas Domo de Dio. Sur ĝi estas nigra silka kovrilo, nomata kurteno aŭ vestaĵo de Kaabo.

## **Karun (Koraĥo)**

Koraĥo estis riĉega avara malica persono, samtempa kun Moseo kaj laŭ kelkaj eldiroj, lia kuzo. Li ne obeis Dion kaj religion, kaj ne pagis imposton. Li eĉ akuzis Moseon pri adulto. Forta tertremo detruis lian palacon kaj mortigis lin. Li kun siaj enormaj riĉaĵoj enteriĝis kaj ankoraŭ homoj serĉas lian trezoron. Eble li estas sama kiel Koraĥo en la Sankta Biblio.

## **Kiblo**

La punkto en kies direkto islamanoj preĝas, buĉas bestojn kaj enterigas mortintojn. Dum la unuaj jaroj de Islamo, Jerusalemo estis la Kiblo, sed poste Kaabo prenis tiun rolon.

## **Kolokinto, kolocinto**

Speco de citrolo, simbolo de amareco

## **Kufa**

Urbo en Irako, kun fama granda moskeo. Kufa iam estis la ĉefurbo de la islama teritorio kiun regis la Kalifo kaj Imamo Ali.

## **Lejli kaj Maĝnun**

Fama arabdevena amrakonto kiu poste populariĝis en aliaj islamaj landoj. Lejli estis la amatino. La vera nomo de la amanto estis Kejs, tamen post ekamo oni nomis lin frenezulo (Maĝnun en la araba lingvo) kaj tiu nomo restis por li. Nezami Ganĝavi, granda persa poeto, verkis poemaron kun la sama titolo “Lejli kaj Maĝnun” pri tiu rakonto.

## **Lukman**

Li (ankaŭ konata kiel Lukman la Saĝa, Luqmaan kaj Lukman al-Hakeem) estis saĝa viro laŭ kiu la 31-a Korana ĉapitro estas

nomita. Oni opinias, ke Lukman (ĉ. 1100 a.K.) devenas de hodiaŭa Sudano. Estas multaj rakontoj pri Lukman en la persa, araba kaj turka literaturoj. Korano ne deklaras, ĉu Lukman estis profeto, sed iuj kredas tiel.

### **Mahmud (Sultano)**

La Sultano Mahmud Gaznavi (971 – 1030, Mahmud de Gazni) estis la unua sendependa kaj la plej elstara reĝo de la Gaznavida dinastio. Li estis la unua postislama regnestro kiu nomis sin Sultano. Lia regno inkluzivis orientan Iranon, nordan Baraton kaj partojn de la nunaj Afganio kaj Pakistano.

### **Mejmandi**

Hasan Mejmandi estis persa ĉefministro de la Sultano Mahmud kaj lia filo kaj posteulo la Sultano Masud (morto en 1032 p.K.). Li estis mamfrato (laktofrato) de la Sultano Mahmud. Dum 11 jaroj, li estis ĉefministro ĝis la sultano ekfuriozis kaj malliberigis lin. Post la morto de la Sultano Mahmud, la Sultano Masud liberigis lin kaj reĉefministriĝis lin. Li havis tiun postenon ĝis la morto.

### **Mekko**

Urbo en Sauda Arabio (Heĝazo), la plej sankta urbo por islamanoj. La Kaabo situas tie, kiu estas la ĉefa pilgrimejo por islamanoj. Mohamedo naskiĝis kaj profetiĝis en tiu urbo. Laŭ la rakontoj, kiam Iŝmaelo kun sia patrino trapasis la dezerton kaj li soifegis, aperis fonto en tiu loko (Zamzam) kaj iom post iom ĉirkaŭ la fonto fariĝis la urbo Mekko.

### **Muezino**

Islama kriisto, kiu anoncas preĝtempon laŭte kriante specialan tekston de sur minareto.

### **Nuŝiravan**

Ĥosro la unua (501–579 p.K.), fama laŭ la nomo Nuŝiravan aŭ Anuŝiravan (eternspiritulo), estis la 21-a sasanida persa reĝo, fama pri justeco. Li multe helpis la progreson de filozofio, literaturo kaj medicino en Persio. Tamen, li multe militis kaj etendigis la Persan teritorion, kaj mortigis aŭ senhejmigis multajn homojn. La islama profeto naskiĝis dum lia tempo.

## **Oferfesto (Korban)**

Grava festo, kies bazo estas la rakonto pri Abrahamo kaj Iŝmaelo. Dio ordonis Abrahamon oferi sian filon (estis testo de lia kredo), sed kiam Abrahamo pretis tion fari, Dio ordonis oferi beston anstataŭ Iŝmaelon. Dum la festo, oni buĉas beston kaj disdonas la viandon inter la malriĉaj, proksimaj kaj parencaj homoj, flanken metante parton por la hejmo.

## **Sasanidoj**

La lasta dinastio de Persio (224–651 p.K.) antaŭ Islamo, kaj la plej vasta post la Aĥemenidoj. Ardaŝir Babakan fondis la dinastion. La invado de la islama armeo malfondis la dinastion.

## **Scienco**

En multaj okazoj en la libro, scienco aludas al la islama teologio (Di-scienco). En la traduko, kiam la okazo permesis, ĝenerale la vorto “scienco” estis uzata. Kaj kiam aparte temis pri teologio, speciala vorto estis uzata. Por la specialisto de la islama teologio, Plena Ilustrita Vortaro uzas la vorton “Ulemo”.

## **Sciencisto**

En multaj okazoj en la libro, sciencisto aludas al islama teologo (Ulemo, Di-sciencisto). En la traduko, kiam la okazo permesis, ĝenerale la vorto “sciencisto” estis uzata. Kaj kiam speciale temis pri teologo, speciala vorto estis uzata.

## **Sep dormantoj aŭ kavkamaradoj**

Legendo, kaj kristana kaj islama, pri kelkaj kredantaj junuloj (en kristanaj tekstoj 7 sed la Nobla Korano diras, ke la nombron scias nur malmultaj) en la tempo de la imperiestro Decio kiuj endormiĝis en kavo por fuĝi de la persekuto kaj dormis tie 200 jarojn laŭ kristana rakonto aŭ 309 jarojn laŭ islama rakonto. Ili havis hundon kiu dormis ĉe la enirejo de la kavo. Laŭ ŝijaismaj rakontoj ĝi estas unu el la bestoj kiuj eniros la paradizon. Do, escepte ŝatata kaj respektata hundo.

## **Sufiismo**

Vidu “Derviŝon”.

## **Sultano**

Araba vorto por reĝo, plej ofte uzata por sendependa reĝo aŭ granda reĝo. La nomo estas populara en la turklingvaj landoj.

## **Ŝaho**

Persa vorto por reĝo.

## **Ŝahname**

La plej granda persa epopeo, verkita de Ferdoŭsi inter la jaroj 977 kaj 1010 p.K., kiu savis la persan lingvon de pereco sub la influo de la araba lingvo. Ĝi estas unu el la plej grandaj epopeoj de la mondo.

## **Ŝako**

Sadio uzas ŝakludajn terminojn por priskribi la disputon. Reĝo en la persa ŝakludo estas Ŝaho kaj Damo estas Veziro.

## **Ŝejko**

Maljuna estro de tribo aŭ vilaĝo, en la araba. Poste, oni uzis ĝin kiel titolon por ulemoj aŭ religiuloj.

## **Tranĉpuno**

Laŭ islamo, en certaj kondiĉoj oni tranĉas la man(fingr)ojn de ŝtelisto. La kondiĉoj estas: matureco, saĝeco, kompleta scio pri la aparteno de ŝtelitaĵo al alia persono, ŝtelo ne dum malabundaj jaroj, la valoro de la ŝtelitaĵo almenaŭ egala al 0,25 gramoj da oro, kaj aparteno de la ŝtelitaĵo al persono, ne al ŝtato, instituto aŭ organizaĵo.

## **Ulemo**

Vidu “sciencisto”.

## **Veziro**

Ministro aŭ fakte ĉefministro en islamaj landoj.

## **Vivakvo**

En la persa literaturo, la norda poluso estas loko de ada nokto, tre malluma, kie troveblas speciala akvo kiu donas eternecon al tiu, kiu ĝin trinkas. Aleksandro la Granda serĉis, sed ne trovis ĝin. Ĥedr estis profeto (aŭ religiulo) kiu trovis ĝin kaj post trinko vivas eterne.

### **Zahak**

Zahak estis fabela kruelega persa reĝo, sur kies ŝultroj estis du serpentoj manĝantaj ĉiutage la cerbon de du junuloj kiel sian manĝaĵon. Ferejdun ribelis kontraŭ li kaj sukcesis malliberigi lin.

### **Zakat**

Zakat estas monsumo, kiun en islamo oni devas pagi pro religia devo kiel almozon (en kelkaj landoj kaj tempoj devigan).



**S.N. Mozaffari Balouchi**  
**(Said Baluči)**

**Antologia skizo**  
**de la persa literaturo**

Tradukoj kaj klarigoj de:  
Prozspecimenoj de 33 aŭtoroj aŭ libroj (102)  
Poemspecimenoj de 24 poetoj

Pliaj detaloj: [impeto.trovu.com](http://impeto.trovu.com)



*Литературно-художественное издание*

**Саади**  
**Гулистан**

*На языке эсперанто*

Подписано в печать 27.12.2021. Формат 84х108/32.

Печать цифровая. Усл. печ. л. 6,72. Уч.-изд. л. 7,4.

Тираж 50 экз.

Издательство «Импэто», Москва, 117593, Литовский б-р 13/12.

Е-mail: [impeto@impeto.ru](mailto:impeto@impeto.ru)

Интернет-магазин: [www.lernolibro.ru](http://www.lernolibro.ru)

Отпечатано в типографии ООО «САМ ПОЛИГРАФИСТ»

г. Москва

Волгоградский проспект, 42, корп. 5